

# EL POPOLA ĈINIO

中國報道

10 1982





Olunčuna maljunulino


Nova vilaĝo de olunĉunoj

## La nova vivo de olunĉunoj

Fotoj de QU WEIBO kaj WANG SHOULIANG

La nacieco Olunĉun nombranta pli ol 3 000 membrojn estas unu el la plej malgrandaj nacimalplimultoj de Ĉinio. La olunĉunoj loĝas ĉefe en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj en densaj arbaroj de la Granda kaj Malgranda Xing'an-montaroj en la norda parto de Heilongjiang-provinco. En la malnova socio ili vivis el ĉasado. Ili sin nutris per viando de sovaĝaj bestoj, sin vestis per ilia felo, loĝis en domoj el betulaj ŝeloj kaj dormis sur malaltaj

terlitoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la popola registaro konstruis por ili novajn loĝdomojn, lernejojn, hospitalojn, vendejojn kaj amuzejojn, por ke ili fiksloĝu. Krom ĉasado, la olunĉunoj sin okupas ankaŭ pri terkulturo kaj bredado de ruĝaj cervoj, alkoj kaj makulcervoj, kiuj ĉiujare donas grandan kvanton da junaj kornoj. La disvolviĝo de la ekonomio plimultigas ilian enspezon, tiel ke ili vivas pli kaj pli bone.







Bredo de makulcervoj

Celi ĉasajon





Bela pikniko

En nova loĝejo





Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## Enhavo

### SUR LA KOVRILO:

En somera tago

Foto de YAN ZHONGYI

### SUR LA DORSKOVRILO:

Aŭtuna pejzaĝo (Olepentraĵo)

de HAO HONGZHENG

### KOLORAJ SERIOJ:

La nova vivo de olunĉunoj

Pejzaĝoj de la monto Qianshan

Fotoj faritaj de Esp-istoj

La templo Jin en Shanxi-provinco

Ruĝvertaj grupoj

### NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

En someraj tagoj

La Dua Somera Semajno de

Pekinaj Esp-istoj

Atingoj en la reguligo de la ĉina nacia ekonomio . . . . .	2
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	5
La malpeza industrio de Ĉinio en rapida disvolviĝo . . . . .	8
Nova tendenco en la eksterlanda komerco de Ĉinio . . . . .	11
NIA KULTIVEJO:	
Kiel mi instruas Esperanton al ĉinaj studentoj . . . . .	14
Amikeco per Esperanto . . . . .	16
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	20
Noviĝas la sociaj moroj de Ĉinio . . . . .	22
AMIKECO . . . . .	24
VIDINDAJ LOKOJ: Pejzaĝo de la monto Qianshan . . . . .	25
Ĉinio unuafoje sukcesis sintezi ribonukleatan acidon . . . . .	28
Fekunda grundo por kulturaj talentulojn . . . . .	30
Virino brilanta per la orienta belo . . . . .	33
Flava rubando (Novelo) . . . . .	35
KALEJDOSKOPO . . . . .	39
Dum someraj tagoj de Pekino . . . . .	40
MIA VIVO: Mi volas fariĝi justa advokato . . . . .	42
INTER NI . . . . .	44
5 000 JAROJ DE ĈINIO: La pereco de Qin-dinastio kaj la leviĝo de Han-dinastio . . . . .	45
Kontraŭ koncentriĝo de loĝantoj en grandaj urboj . . . . .	48
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	50
HISTORIAJ OBJEKTOJ: La templo Jin en stilo de ĝardeno . . . . .	51

JARABONTARIFO	Belgio	BF	180.00	Finnlando	FMK	24.00	Italio	Lit	5200	Nederlando	Gld.	12.60	Portugalio	Esc	400		
Aŭstralio	ŝA	5.70	FR Germanio	DM	10.80	Francio	FF	26.00	Japanio	Yen	1400	Nov-Zelando	NZŝ	6.70	Usono	USŝ	6.00
Aŭstrio	Sch	80.00	Britio	£	3.00	Hispanio	Pts	600	Jugoslavio	Din.	180	Svisio	SF	10.00	Kanado	Canŝ	7.20

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00

# ATINGOJ EN LA REGULIGO DE LA ĈINA NACIA EKONOMIO

**E**N la pasinteco la ekonomia konstruado de Ĉinio iris vojon de alta normo kaj multa akumulo sed malaltaj konsumo kaj efiko, tiel ke la proporcioj de la nacia ekonomio perturbigis kaj la popola vivo ne ricevis necesan pliboniĝon. Vintre de 1978 la ĉina registaro korektis la erarojn en sia laboro, kaj komence de 1979 ĝi ellaboris politikon por reguligi la nacian ekonomion. Dank' al la trijara penado Ĉinio akiris grandan sukceson en la reguligo de la nacia ekonomio, tiel ke tiu ĉi suriris vojon al sana disvolviĝo.

## LA KAMPARA EKONOMIO DISVOLVIĜAS ĈIUFLANKE


Antaŭe en la kampara produktado Ĉinio substrekis la plantadon, precipe la grenan produktadon. Tia agrikultura strukturo ne povis plene utiligi la labor-

fortojn kaj naturajn riĉfontojn. Dum la lastaj tri jaroj, dank' al praktikado de plurformaj respondecaj sistemoj en la produktado, reguligo de la kulturado de la plantaĵoj laŭ la konkretaj lokaj kondiĉoj kaj disvolvado de multspecaj ekonomioj, la agrikultura produktado akiris grandan disvolviĝon. Inter 1979-81 la areo por grenaj plantaĵoj iom reduktiĝis, tamen la produktokvanto de greno ĉiujare superis tiun antaŭ 1978. Pliproduktiĝis ankaŭ diversspecaj ekonomiaj plantaĵoj, el kiuj en 1981 la produktokvanto de kotonostis 2 967 500 tunoj, tiu de oledonaj plantaĵoj pli ol dek milionoj da tunoj, tiu de sukerdonaj plantaĵoj 36 milionoj da tunoj kaj tiu de tefolioj 342 500 tunoj, kiuj ĉiuj kreis la plej altajn rekordojn en la historio, pliiĝinte 37%-96% kompare kun 1978. La totala produktovaloro el forsta-

do, brutobredado, fiŝkaptado k. a. estis ĉ. 61.7 miliardoj da juanoj, pliiĝo de 31.1% kompare kun 1978.

La reguligo de la agrikultura strukturo kaj la ŝanĝiĝo en la produktaj rilatoj en la kamparo fariĝis movfortoj por venki naturajn katastrofojn kaj disvolvi la ekonomion. Ili altigis la ekonomian efikon de agrikulturo kaj pliiĝis la enspezon de la kamparanoj. La situacio de agrikulturo estas ege kuraĝiga, sed pro multaj katastrofoj en la lastaj jaroj, la agrikultura produktado ankoraŭ restas nestabila. La agrikultura laborproduktivo kaj la vendeblaj agrikulturaj produktaĵoj ambaŭ estas malmultaj. La povo de la agrikulturo mem plivastigi reproduktadon estas limigita, tial pluapase disvolvi la agrikulturan produktadon estas grava tasko.

*La Nankina Alkil-benzena Fabriko ĉiujare produktas 50 000 tunojn da alkila benzeno, kiuj konsistigas tri kvinonojn de la materialo por lesiva produktado de la lando.*



## LA REGULIGO AKCELIS DAŬRAN KRESKON DE LA PRODUKTADO DE ĈIUTAJ NECESAĴOJ

Antaŭe en la industria produktado oni ĉasis nur altan rapidecon kun la ŝtala industrio kiel la centro, tiel ke la proporcio inter la peza kaj malpeza industrioj grave perturbigis. En la pasintaj tri jaroj la ŝtato praktikis al la malpeza industrio la ses-privilegian principon (privilegio en provizado de energio kaj krudaj materialoj, en rime-



doj por teknika renovigo kaj reformo, en fundamenta konstruado, en monpruntado ĉe banko, en uzo de eksterlanda mono, en enkonduko de eksterlanda tekniko kaj en transportado) kaj plenenergie helpis la malpezan industrion en ĝia disvolviĝo. Ekde 1979 ĝis 1981 la produktovaloro de la malpeza industrio pliiĝis po 14% jare kaj ĝia proporcio en la totala produktovaloro de la industrio kreskis de 42.7% en 1978 ĝis 51.4% en 1981. La ĉefaj konsumaj varoj pliiĝis grandamplekse. Kompare kun 1978 la produkto-kvanto de televidiloj pliiĝis 9.4-oble, tiuj de radioriceviloj kaj fotiloj 2.5-oble, tiuj de bicikloj, kudromaŝinoj kaj brakhorloĝoj pli-ol-unuoble; ŝpinaĵo, kotona kaj lana ŝtofoj, sukero, ledŝuoj kaj cigaredoj pliiĝis je 27% ĝis 42%. En la pasinta jaro la novaj produktaĵoj provfaritaj de la malpeza industrio atingis pli ol 5 000 specojn, el kiuj plejparto estas produktata pogrande. La grandskala kreskado de la produktokvanto de ĉiutagaj bezonaĵoj liveras al la merkato abundajn varojn, kio mildigis la multjaran streĉitecon en varlive-rado.

### REGULIGO DE LA PEZA INDUSTRIO

Dum la lastaj tri jaroj la peza industrio ŝanĝis la staton de memservado, disvastigis sian servadon kaj liveris pli multajn produktaĵojn por la agrikulturo, malpeza industrio, merkato, eksporto kaj teknika reformo. Ekz., la metalurgia industrio produktis mankantajn bendoŝtalon, maldikajn ŝtalplatojn, malgrandajn ŝtalproduktaĵojn, velditajn ŝtaltubojn kaj ŝtalon por fenestrotorĉoj. En 1981 la civila mekanika industrio produktis pli ol 1 300 specojn de novaj pro-

*Brutoj de popola komunumo en la Interna Mongolio*




duktaĵoj, kiuj jam servas al la agrikulturo kaj ties flankokupoj, manĝaĵpreparo, produktado de ĉiutagaj bezonaĵoj, ŝpinado, tekstado, komercado, mediprotektaĵo, pakado ktp. La eksportitaj produktaĵoj de la mekanika kaj elektra industrioj atingis 1.64 miliardojn da usonaj dolaroj, kun pliiĝo de 1.4-oble kompare kun 1980. Grandaj precizaj maŝinoj kaj kompletaj instalaĵoj ekiris en la internacian merkaton. Laŭ la bezono de la nuna kamparo la industrio de agrikulturaj maŝinoj pliproduktis malgrandajn agrikulturajn maŝinojn kaj duonmekanikajn agrikulturajn ilojn, kies produktovaloro konsistigis ĉ. 40% de la totala produktovaloro de la agrikulturaj maŝinoj.

Samtempe kun reguligo de la produkta strukturo de la peza industrio, oni malfunkciigis kaj kunligis nombrojn da entrepre-

noj, ŝanĝis ties produktaĵan konsiston, kiuj konsumis tro multan energion, sed kies produktaĵoj malbonaj, tial ili serioze malprofitis. En la pasintaj tri jaroj tra la tuta lando pli ol ducent ferfabriketoj estis malfunkciigitaj, dum la restantaj ferfabriketoj multe plibonigis siajn laborojn en la administrado kaj tekniko kaj malaltigis la produktaĵan koston post la reguligo. En la lasta jaro 109 malgrandaj nitrogenaj fabrikoj estis malfunkciigitaj, dum la restantaj multe reduktis sian konsumon de materialo kaj energio. Ĉio ĉi montris, ke la reguligo de la strukturo de entreprenoj kaj elimino de iuj postrestintaj entreprenoj estas efika vojo por altigi ekonomian efikon.

### PLIBONIĜAS LA POPOLA VIVO

La tro alta akumulo malaltigis en la pasintaj tri jaroj. En la



*La erctransŝarĝa kajo por centmil-tonela ŝipo kun jara transporta kvanto de 20 milionoj da tunoj konstruiĝis antaŭ nelonge en la haveno Beilun, Zhenhai-gubernio, Zhejiang-provinco.*

civila enspezo la proporcio de akumulo malkreskis de 36.5% en 1978 ĝis malpli ol 30% en 1981, sekve pliiĝis la proporcio de konsumo.

Tiutempe eĉ en malfacilaj financoj kaj ekonomio, la ŝtato faris ĉion eblan por plibonigi la vivon de la popolo. En la kamparo la ŝtato levis la aĉetprezon de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaj kaj reduktis impostojn, kio pliiĝis la enspezon de la kamparanoj je 52 miliardoj da juanoj. En la urboj 26 milionoj da homoj ricevis laboron, kaj pliiĝis la salajro por plejparto de

la laboristoj kaj oficistoj kaj efektiviĝis la premia sistemo, kio pliiĝis la enspezon de la laboristoj kaj oficistoj je 40.5 miliardoj da juanoj.

Enketado al familio de komunumanoj montris, ke la neta pokapa enspezo estis 223 juanoj en 1981, kompare kun 134 juanoj de 1978, pliiĝis je 18.5% ĉiujare. Familia enketado al laboristoj kaj oficistoj montris, ke la pokapa jara enspezo estis 463 juanoj en 1981, pliiĝis je 46.8% kompare kun tiu de 1978. Subtrahinte la plian elspezon pro prezaltiĝo de ĉiutagaj bezonaĵoj la reala en-

*Loĝkvartalo en nova petrol-kemia satelita urbo 74 kilometrojn sudokcidente de Ŝanhajo*



spezo pliiĝis je 30.8%. Nuntempe multe malkreskis la nombro de malriĉaj familioj en Ĉinio. La sumo de deponita mono de urbaroj kaj vilaĝanoj en 1981 pliiĝis 1.5-oble kompare kun 1978.

Malgraŭ la rimarkinda plibonigo la vivo de la ĉina popolo ankoraŭ restas malaltnivela. Troviĝas ankoraŭ parto de la kamparanoj, por kiuj la problemo pri manĝado estas ne bone solvita. La familioj de iuj laboristoj kaj oficistoj, kiuj havas malaltan salajron, malmultan premimonon kaj pezan familian ŝarĝon, vivas kompare malfacile. Tiu stato devos esti solvita paŝon post paŝo en la venonta disvolviĝo de la ekonomio.

### **RAPIDIĜIS LA KONSTRUADO DE LA MALPEZA INDUSTRIO KAJ MULTE PLIBONIĜIS LA SERVADO AL LA POPOLA VIVO**

En la daŭro de tri jaroj la ŝtato plenenergie malgrandigis la skalon de la fundamenta konstruado. La grandaj kaj mezgrandaj konstru-projektoj de la ŝtato reduktiĝis de 1 624 en la fino de 1978 al 663 en la fino de 1981. Samtempe la ŝtato plenenergie ĝustigis la orientiĝon de investado. El la totala sumo de la investado por la fundamenta konstruado, la proporcio de tiu de la peza industrio reduktiĝis de 50.9% en 1978 al 40.3% en 1981, dum tiu de la malpeza industrio kreskis de 6.1% ĝis 10%. La proporcio de la porprodukta investo reduktiĝis de 82.6% en 1978 al 58.7% en 1981, kaj tiu de la investado de konstruado por plenumi la bezonon de la materia kaj kultura vivo de la popolo kreskis de 17.4% ĝis 41.3%.



En tiu ĉi tempo la ŝtato elpezis 29 miliardojn da juanoj por konstrui loĝdomojn. La plankareo de la nove konstruitaj loĝdomoj estas 223 milionoj da kvadrataj metroj kaj ĉ. 18 milionoj da homoj transloĝiĝis en novajn loĝejojn. La ŝtato ankaŭ plifortigis la gvidon super konstruado de kamparaj domoj kaj subtenis tion per liverado de materialoj kaj projektado, tiel ke la kamparanoj plirapide plibonigis siajn loĝkondiĉojn. En la lastaj jaroj la kamparanoj mem konstruis domojn kun sume 1.4 miliardoj da kvadrataj metroj. En la nuna Ĉinio ĉiu vilaĝano havas loĝejon de meznombro 10 kvadrataj metroj.

Krome, la ŝtato donis 4 miliardojn da juanoj por la urba publika servo kaj urba konstruado. Oni konstruis pliajn urbajn stratojn, subterajn drentubojn, plimultigis veturilojn por la publika trafiko kaj plivastigis liveradon de kranakvo kaj gaso. Oni ankaŭ plivastigis la verdan areon kaj konstruis pliajn butikojn kaj servejojn.

### LA SOLVENDAJ PROBLEMOJ

Kvankam la ĉina ekonomia reguligo akiris grandan sukceson, tamen estas malfacile solvi dum la tri jaroj la problemojn, kiuj amasiĝis en la pasinta longa tempo. Tial sur la antaŭenmarŝa vojo kuŝas ankoraŭ nemalmultaj malfaciloj, inter kiuj du estas elstaraj: Unue, la ŝtataj financoj havis deficiton en sinsekvaj jaroj. En 1979 kaj 1980 la financa defcito estis 17 kaj 12.7 miliardoj da juanoj respektive. Kvankam en 1981 ĝenerale efektiviĝis ekvilibro inter la en- kaj elspezo, tio tamen okazis surbaze de malpliigo de la enspezoj kaj malgrandigo de la elspezoj,



### ĈINIO AKIRIS SUKCESOJN EN SPACA SCIENCO KAJ TEKNIKO

Apogante sin sur la propraj tortoj, Ĉinio disvolvis spacan sciencan kaj teknikon kaj gajnis rimarkindajn sukcesojn en la pasintaj 20 jaroj. Depost la lanĉo de la unua satelito en aprilo 1970, Ĉinio lanĉis sume 11 diverstipajn satelitojn por scienca kaj teknika eksperimentado. En la lastaj dekkelkaj jaroj Ĉinio sukcesis fabriki transportan raketon de du tipoj. Nun Ĉinio faras tri-etaĝan raketon kun likva fuzaĵo, per kiu oni povas lanĉi sinkron-orbitan sateliton aŭ grandan perige-orbitan sateliton.

Ĉinio jam establis certaskalan por-satelitan lanĉejon kaj teran observan kaj direktan reton. Ĝi sukcese utiligis la spacan sciencan kaj teknikon en mezurado de tero, kontrolado de arbaro, esplorado de regiona geologio kaj hidrologio, prospektado de mineraloj, kaj en sismologio, oceanologio kaj media kontrolado.

### ĈINIO SUKCESE KULTURAS KAŬĈUKARBOJN

Ĝenerale oni kulturas kaŭĉukarbojn en malaltaj lokoj ĉe malaltaj latitudoj. Post provo Ĉinio sukcesis kulturi kaŭĉukarbojn en lokoj norde de la norda latitudo de 17 gradoj. Nun Ĉinio havas du produktajn bazojn de natura kaŭĉuko sur la insulo Hainan kaj en Xishuangbanna,

tial ĝia bazo estis nestabila. Due la energio, transportado ne konformas al la disvolviĝo de la nacia ekonomio. Dum la pasintaj du jaroj la produktado de energio malkreskis. La energio produktita en 1981 egalas nur al tiu de 1978. La povo de la fervoja transportado kaj la havena

Yunnan. Cetere oni sukcesis kulturi kaŭĉukarbojn ankaŭ en lokoj de Guangxi kaj Fujian ĉe la norda latitudo de 25 gradoj. Nun la totala areo de la ŝtataj kaŭĉukaj kultivejoj superas 354 000 hektarojn, kaj en 1981 Ĉinio produktis 128 000 tunojn da kaŭĉuko. Ĝi okupas la kvaran lokon en la mondo laŭ la areo de kaŭĉukarbaroj kaj la sesan lokon laŭ la produktokvanto de kaŭĉuko.

### PROSPERA BRUTOBREDADO DE LA INTERNA MONGOLIO

Statistiko en la fino de junio 1982 montris, ke la Interna Mongolio havas 41.8 milionojn da bovoj, ĉevaloj, kameloj kaj ŝafoj, nome je 1.5 milionoj pli multe ol en 1981. La nombro estas rekorda en la historio. Cetere la brutoj estas pli grasaj ol en la pasintaj jaroj, kaj la liveritaj lano, viando kaj lakto estas pli grandkvantaj ol antaŭe.

La ĉefaj kialoj de la prosperiĝo de la brutobredado kuŝas en tio, ke la nova ekonomia politiko stimulas la aktivecon de la paŝtistoj en la konstruado de herbejoj, kaj krome, la paŝtistoj ekaplikas sciencajn metodojn en la brutobredado.

### 16 GRANDAJ KAJ MEZGRANDAJ ENTREPRENOJ EKfunkcias









Ĉi-jare Ĉinio ekfunkciigis 16 grandajn kaj mezgrandajn entreprenojn, inter kiuj troviĝas petrolkemia fabriko, cementa fabriko, teksejo, sukerfarejo, ferminejo povanta produkti ĉiujare 1.5 milionojn da tunoj da erco kaj elekti milionon da tunoj da erco.

trafiko estis grave nesufiĉa, kio serioze malhelpis la industrian disvolviĝon. Tiukaze nur persisto en la orientiĝo de reguligo kaj kontinua penado povas solidigi kaj disvolvi la jam akiritajn atingojn kaj efektiviĝi deradikane plibonigon de la nacia ekonomio.

# KRESKO DE LA ĈINA

(1978)

Totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo (laŭ la fiksprezo de 1970)	Unuo	1978
	Miliardo da juanoj	569
Totala produktovaloro de agrikulturo	Miliardo da juanoj	145.9
Totala produktovaloro de industrio	Miliardo da juanoj	423.1





Produktokvanto de iuj ĉefaj industriaj produktaĵoj	Unuo	1978	1979	1980	1981	Plimultiĝo de 1981 kompare kun 1978
 Karbo	Miliono da tunoj	618	635	620	620	0.3%
 Nafto	Miliono da tunoj	104.05	106.15	105.95	101.22	-2.7%
 Elektro	Miliardo da kWh	256.6	282	300.6	309.3	20.5%
 Ŝtalo	Miliono da tunoj	31.78	34.48	37.12	35.6	12%
 Ŝtofo	Miliardo da metroj	11.03	12.15	13.47	14.27	29.4%
 Sukero	Miliono da tunoj	2.267	2.5	2.571	3.166	39.7%
 Bicikloj	Miliono	8.54	10.095	13.02	17.54	105.4%
 Brakhorloĝoj	Miliono	13.511	17.07	22.16	28.72	112.6%



# NACIA EKONOMIO

1981)

1979	1980	1981	Plimultiĝo de 1981 kompare kun 1978
617.5	661.9	691.9	21.6%
158.4	162.7	172	17.9%
459.1	499.2	519.9	22.9%

Produktokvanto de iuj ĉefaj agrikulturaĵ produktaĵoj	Unuo	1978	1979	1980	1981	Plimultiĝo de 1981 kompare kun 1978
 Greno	Miliono da tunoj	304.75	332.12	320.52	325.02	6.7%
 Koton	Miliono da tunoj	2.167	2.207	2.707	2.968	37%
 Oledonaj semoj	Miliono da tunoj	5.218	6.435	7.691	10.205	95.6%
 Viando de porkoj, bovoj kaj ŝafoj	Miliono da tunoj	8.563	10.624	12.055	12.609	47.2%

Popola vivo	Unuo	1978	1979	1980	1981	Plimultiĝo de 1981 kompare kun 1978
Meznombra jara enspezo de salajrulo	juano	614	668	762	772	25.7%
Vivkosta indico de salajrulo	%	100	101.9	109.5	112.3	12.3%
Plankareo de loĝdomoj por laboristoj kaj oficistoj	Miliono da kvadrataj metroj	37.52	62.56	91.7	97	108.9%

# La malpeza industrio de Ĉinio en rapida disvolviĝo

**D**E la pasintaj tri jaroj la malpeza industrio de Ĉinio rapide disvolviĝas. Ĝia totala produktovalorado levigis jaron post jaro. La totala produktovalorado de 1981 estis 105.8 miliardoj da juanoj kaj okupis duonon de la totala produktovalorado de la tuta industrio. Laŭ antaŭkalkulo, la totala produktovalorado de la malpeza industrio de 1982 plimultiĝos je 7% kompare kun tiu de 1981. Ĉio ĉi rezultis el la reguligado de la ĉina industrio kaj plenenergia disvolvado de produktado de ĉiutagaj bezonaĵoj praktikataj ekde la fino de 1978.

En la periodo de 1949 ĝis 1978, la peza industrio ricevis tro grandan ŝtatan investon kaj la malpeza industrio tro malgrandan. Pro tio, en la pasintaj 30 jaroj, la peza industrio kreskis 90.5-oble sed la malpeza nur 19.7-oble. La proporcio inter la malpeza kaj peza industrioj


serioze perturbiĝis. Multaj malpezaj industriaĵoj mankis al la merkato. Iuj produktaĵoj estis malbonkvalitaj; aliaj estis monotonaj kaj malnovaj. Tion oni nomis "La sistemo sensanĝa dum tridek jaroj". Ĝi ne povis kontentigi la bezonon de la popola vivo tagon post tago boniĝanta. En la ekonomia reguligado de la pasintaj tri jaroj, la ŝtato reduktis la skalon de fundamenta konstruado kaj pliiĝis investon kaj kreditmonon por la malpeza industrio. Pro tio rimarkinde plialtiĝis la produkto-povo de industrio produkti paperon, sukeron, salon, bieron, altkvalitan alkoholaĵon, biciklojn, kudromaŝinojn, horloĝojn, ledon, ledŝuojn, sintezan lavpulvoron, ampolojn, aluminaĵojn, meblojn kaj ĉiutagajn argilaĵojn kaj porcelanaĵojn.

Samtempe kun tio oni mallevis la disvolvan rapidecon de la

peza industrio kaj ŝanĝis ĝian servon ĉefe al si mem en servon samtempe al la agrikulturo, malpeza industrio kaj merkato. Ekzemple, metalurgiaj entreprenoj en Anshan, Wuhan, Ŝanhajo kaj Chongqing pliproduktis ŝtalbloketojn, dratojn, maldikajn platojn, ŝtalajn bendojn kaj aliajn. Iliaj funkcio, kvalito kaj speco estas taŭgaj por la uzo en la malpeza industrio. La kemia industrio pliproduktis natrian karbonaton kaj plaston, dum la mekanika industrio pliproduktis specialajn malpezajn ekipaĵojn, industriajn pneŭmatikojn, kram-pajn aparatojn, maŝinelementojn kaj akcesoraĵojn. Ŝanhajo, Tianjin, Liaoning kaj aliaj provincoj kaj urboj disponigis aron da maŝinaj fabrikoj al la malpez-industria branĉo, por ke oni pli multe produkti biciklojn, kudromaŝinojn, brakhorloĝojn k. a. La ŝtato plimultigis la provizadon de karbo, elektro, petrolo kaj gaso al la malpeza industrio. Tion enkorpigis ses-privilegia principo praktikata de la ŝtato al la malpeza industrio. Ĝi donas privilegiojn en provizo de materialoj, hejtajo kaj elektro; latent uzado, teknika renovigo kaj ekipaĵa reformo; fundamenta konstruado; banka pruntedono; uzado de fremda valuto; kaj fremdlanda avangarda tekniko kaj trafikado, kio multe helpis ĝian disvolviĝon.

En la ekonomia reguligado la ŝtato alprenis efikajn rimedojn

*Radio-registritaj kun marko "Meiduo" produktitaj de la Ŝanhaja Tria Radio-fabrika*






por disvolvi agrikulturon. Multe da provincoj kaj regionoj restarigis kaj konstruis diversajn specialajn produktaĵojn de i. a. malpez-industriaj materialoj, kiel ekzemple sukerkano, betoj, tabako, hordeo, lupoloj, ananasoj, mandarinoj, laktaj bovoj kaj kaproj, porpaperaj lignoj, fragmitoj, bambuoj kaj aromaĵoj. Tio estas bona kondiĉo por disvolvi la malpezan industrion. Ekzemple, longe dum la pasinteco al la grandaj kaj mezgrandaj sukerfabrikoj en la nordo mankis sufiĉe da betoj, sed nun betoj tre abundas. La plimultiĝo de porkofeloj akcelis la disvolvon de la fel-glua kaj gelatena industrio en iuj urboj. En la provincoj Hunan kaj Hubei la papera industrio rapide disvolviĝis dank' al pliprodukto de fragmitoj.

En financado, bankismo, en-kaj eksterlanda komercoj, materiprovizado, komunikado kaj trafikado oni alprenis aron da efikaj rimedoj por subteni la malpezan industrion. Ankaŭ iuj sciencaj institutoj kaj altlernejoj subtenas la malpezan industrion en teknologio kaj scienca esplorado.

La malpez-industria branĉo ankaŭ reguligas sian produktan strukturon. Ĉar tre granda estas la bezono de la merkato por malpezaj industriaĵoj kaj nesufiĉaj la produktopovo kaj krudaj materialoj, tial la kvanto de la produktitaj malpezaj industriaĵoj plejparte ne kontentigas la merkatan bezonon. Malgrandparte iuj malpezaj industriaĵoj superfluas pro interŝanĝo de la postulo de la merkato kaj superflua produktado. Laŭ antaŭkalkulo, la malpez-industria branĉo reduktas superfluan produktadon, dum plimultiĝas produktaĵoj mankantaj al merkato. En 1981

*Laborejo de la poliestera fabriko dependa de la Ŝanhaja Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko*



la komercaĵoj, kiuj ne sufiĉis por la merkato, ekzemple sukero, bicikloj, kudromaŝinoj, brakhorloĝoj, biero, vino, sinteza lavpulvoro, ledŝuoj, tolsuoj, glaciŝrankoj k.a., plimultiĝis je pli ol 20% kompare kun tiuj de 1980. La elektraj ventumiloj kaj lavmaŝinoj plimultiĝis respektive je 55% kaj 450%; plastajoj, ladmanĝo, alumetoj, vitraĵoj kaj sekaj piloj plimultiĝis je pli ol 10%. La Malpez-industria Buroo kaj Metiindustria Buroo de Ŝanhajo, la plej granda industria urbo de Ĉinio, laŭ la bezono de la enlanda kaj eksterlanda merkatoj, koncentras fortojn por produkti urĝe bezonatajn produktaĵojn, disvolvi fa-

majn produktaĵojn kaj redukti la kvanton de malsuperaj produktaĵoj kaj plimultiĝi la kvanton de superaj kaj mezsuperaj produktaĵoj. Ekzemple, en 1980 la malgrandaj brakhorloĝoj por virinoj plimultiĝis je 64% kompare kun tiuj de 1979, la datomontraj brakhorloĝoj je ĉ. 100%, porfamiliaj elektraj aparatoj multe pliproduktiĝis kaj ekde 1981 la procentaĵo daŭre leviĝas.

En la struktura reguligado la malpez-industria branĉo plifortigas specialan administradon kaj klopodas disvolvi ekonomian unuiĝon kaj eltrovi latentan produktan forton. Kvar specialaj tutlandaj kompanioj por tabako, salo, malpez-industria me-



*Diversaj brakhorloĝoj kun marko "Yan'an" produktitaj de la Brakhorloĝa Fabriko "Ruĝa Flago" en Xi'an*

kaniko kaj metiartajoj jam estas fonditaj. Rajtigite de la ŝtato, ili gvidas lokajn kompaniojn kaj entreprenojn por harmoniigi la produktan kaj vendan laboron. En grandaj kaj mezgrandaj urboj, kie koncentriĝas la malpeza industrio, oni faris strukturan reguligadon al la departementoj kaj entreprenoj, disvolvis specialan kunlaboron kaj ekonomian unuiĝon. Iuj eĉ organizis kompare grandskalan ekonomian unuiĝon kaj teknikan kunlaboron malgraŭ regionaj kaj entreprenaj limoj. Ekzemple, Ŝanhajo kunlaboras kun Hubei, Sichuan kaj Anhui; Jiangsu kun Shanxi; Hebei kontraktis kunlaboron interkonsenton kun la malpezaj industriaj fakoj kaj entreprenoj de Ŝanhajo kaj la provincoj Jiangsu kaj Guangdong. Per tio la malpeza industrio ricevis disvolviĝon. Nombro da entreprenoj, alpreninte la rimedojn, kiel kompensa komer-

co, prilaborado kaj ekipado, produktas malpez-industriajn produktaĵojn des pli taŭgajn por la bezono de la internacia merkato, ekzemple elektronikajn brakhorloĝojn, sportilojn, plastajojn, domajn elektrajn aparatojn, manĝaĵojn k. a. Tiuj entreprenoj plejparte havas avangardajn ekipaĵojn, teknikon kaj administrajn metodojn, pro kio estas alta la kvalito de produktaĵoj kaj multaj la specoj de produktaĵoj.

Nun la gravitpunkto de la malpez-industria branĉo jam turniĝis de la produktovaloro kaj produktokvanto al kvalito kaj specoj de la produktaĵoj. En la lastaj jaroj la socia aĉetpovo, senĉese kreskanta en la ĉinaj urboj kaj kamparo, klare inversigis sian ordon de preferoj de manĝo, vesto kaj uzo al uzo, vesto kaj manĝo, de malsuperaj al pli superaj varoj kaj fortikaj luksaĵoj. Pro tio la vendorapido

de tiuj produktaĵoj rimarkinde kreskas. La ŝtato protektas la konkuron kaj ĉiuj fabrikoj de la malpeza industrio senĉese konkuras inter si pri produktaĵaj kvalito, specoj kaj sortimentoj. Por ke poreksportaj malpez-industriaj produktaĵoj pli adaptiĝu al la bezono de la internacia merkato, diversnivelaĵaj malpez-industriaj branĉoj kaj entreprenoj ellaboris projekton por reformi produktaĵojn, serioze esplorante produktaĵajn kvaliton kaj specojn kaj bezonon de la en- kaj eksterlanda merkatoj. En la pasintaj tri jaroj la malpez-industria branĉo konservis kaj reproduktis malnovajn famajn produktaĵojn. Ĝi ankaŭ kreis aron da novaj famaj produktaĵoj. Oni sukcese provfabrikis ĉ. dudek mil specojn de novaj produktaĵoj, kiujn bonvenigas la vasta klientaro de la ĉinaj urboj kaj kamparo.

En 1981 la produktokvanto de iuj malpezaj produktaĵoj de Ĉinio jam viciĝis en la unuaj lokoj de la samspecaj produktaĵoj de la mondo. Ili estas bicikloj, kiuj atingis 17.54 milionojn, kudromaŝinoj 10.39 milionojn, fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj 3 594 milionojn, salo 18.32 milionojn da tunoj, cigaredoj 17.04 milionojn da skatoloj kaj ledo egalas al tiu de 46.15 milionoj da bovoj.

Ekde marto 1979 kreska rapideco de la tuta malpeza industrio (inkluzive de la tekstila industrio) superas tiun de la peza industrio. La proporcioj inter la agrikulturo, malpeza kaj peza industrioj en la tuta lando relative harmonias. La enspezo de la plejparto de la popolo iom plimultiĝis. La provizado de la malpezaj industriaĵoj evidente pliboniĝas, malgraŭ la prosperaj aĉetado kaj vendado en la urboj kaj kamparo de Ĉinio.



# Nova tendenco en la eksterlanda komerco de Ĉinio

**D**UM la reguligo de la ĉina ekonomio la eksterlanda komerco de Ĉinio ne reduktiĝis, sed male havas certagradan kreskon. En 1981 la totala valoro de la eksterlanda komerco de Ĉinio unuafoje superis 40 miliardojn da dolaroj. La eksporta kaj importa komerco atingis 42.3 miliardojn da dolaroj. I.a., la eksporta komerco kreskis je 12.6% kompare kun tiu de 1980 kaj la importa komerco je 2.7%. La totala valoro de la eksterlanda komerco en 1981 superis la antaŭplanitan sumon je 6%.

Ĉinaj gvidantoj foje-refoje deklaris, ke Ĉinio kontinue kaj firme plenumos la politikon malfermi sian pordon al fremdaj landoj kaj, surbaze de la principo de egaleco kaj reciprokaj utilo kaj bezono kaj pere de la internaciaj kunlaboro en komerco kaj teknika interŝanĝado, akcelos la reguligon kaj disvolviĝon de la nacia ekonomio. Nun Ĉinio havas komercan rilaton kun 174 landoj kaj regionoj de la ses kontinentoj kaj okazigis en multaj landoj ekspoziciojn pri ekonomio kaj komerco. Traktata favoreco kaj tarifita interkonsenta favoreco al Ĉinio estas faritaj de Aŭstralio, Novzlando, la Eŭropa Ekonomia Komunumo, Kanado, Japanio kaj Usono. Ankaŭ la komerco inter Ĉinio kaj la tria mondo kreskis rimarkinde, komenciĝis inter ili interŝanĝo de produktaj teknikoj kaj plimultiĝis iliaj kunlaboroj.

## REGULIGO DE LA VAR-KONSISTO

En la lastaj jaroj, dank' al la disvolviĝo de la ĉina ekonomio la konsisto de la eksportaj kaj importaj varoj certagrade ŝanĝiĝis. Ekz., Ĉinio ĉiujare eksportas pli ol 200 specojn de teo, kaj la eksportitaj porkoharoj kaj kuniĉoj konsistigas respektive 80% kaj 70% de la totala eksporta kvanto de la mondo. Ankaŭ ĉinaj drogoj estas unu el la ĉefaj eksportaj varoj. Kvankam iliaj eksportaj kvantoj ankoraŭ estas grandaj, tamen la proporcio de la pez-industriaj produktaĵoj en la totala eksportado kreskis de 25% ĝis 43.6% kaj unuafoje supe-

ris tiun de la tekstilaĵoj kaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Ekz. antaŭ du jaroj la valoro de ilmaŝina komerco inter Ĉinio kaj Meksiko estis nur 320 000 dolaroj, sed en 1981 ĝi superis 2.5 milionojn da dolaroj. En 1982 la komerca valoro estos 3.2 milionoj da dolaroj laŭ la interkonsento de ambaŭ landoj. Kun altigo de la transporta kapablo ankaŭ pliiĝos la eksporta kvanto de karbo.

En 1981 Ĉinio eksportis al Britio 195 000 brakhorloĝojn kun la markoj "Chunlei" kaj "Haiou", kies totala komerca valoro atingis pli ol 2.5 milionojn da dolaroj. Estis unuafoje,

*Pajlaj plektaĵoj liverataj al la enlanda kaj internacia merkatoj*



ke ĉinaj brakhorloĝoj aperis en la brita merkato. Ankaŭ unuafoje ekipaĵoj por malgranda hidroelektrejo fabrikitaj de Ĉinio estis eksportitaj al Usono kaj muntitaj en la hidroelektrejo Comanche en Kalifornio.

Kun malpliigo de la kapitalo por fundamenta konstruado, Ĉinio komencis enkonduki ĉefajn teknikojn kaj ekipaĵojn el eksterlando anstataŭ importi grandajn ekipaĵojn per granda kvanto da fremda valuto, ekz. la tekniko pri fabrikado de granda kombajno estis enkondukita el Usono.

Por akceli la disvolviĝon de la nacia ekonomio, Ĉinio, unuflanke, multe zorgas pri la bezono de la internacia merkato, plimultigas la specojn de eksportaj varoj, altigas la kvaliton de la superaj produktaĵoj kaj plibonigas pakadon. Aliflanke, Ĉinio metas sian atenton sur enkonduko de teknikoj pri produkto, fabrikado de ekipaĵoj kaj administrado de entreprenoj. Ĉinio ankoraŭ aktive kunlaboras kun eksterlandaj kompanioj aŭ fabrikoj por fabriki produk-

tajojn, kaj komisiis eksterlandajn entreprenojn liveri teknikon laŭ kontrakto, inkluzive de kuna ekspluatado. Tamen produktaĵoj, kiel aŭtoj, diktafonoj, fridujoj, komputiloj, estas mal multe aŭ tute ne importitaj, ĉar Ĉinio kapablos ilin fabriki.

### KONSTRUI BAZLOKOJN POR EKSPORTAJ VAROJ

Por vastigi la fonton de la eksportaj varoj kaj altigi ilian kvaliton, ekde 1972 Ĉinio konstruis 114 bazlokojn por eksportaj varoj. Troviĝas bazlokoj por eksportaj varoj de 90 specoj kaj 94 fabrikoj kaj minejoj, kiuj speciale produktas eksportajn varojn. En 1981 ili liveris al la ŝtato eksportajn varojn en valoro de 9.25 miliardoj da juanoj, kiuj konsistigas 22% de la totala aĉeta valoro de la eksterlanda komerco en tiu jaro.

Tiuj bazlokoj produktis nombron da ĉefaj varoj kaj tiuj tradiciaj kaj famaj kun loka karaktero. Inter ili estas biero el Qingdao, Shandong-provinco,

silkoraŭpoj el la urbo Jiaxing, Zhejiang-provinco, perloj el la urbo Suzhou, Jiangsu-provinco Biluochun-teo kaj arĝentaj fiŝoj de Taihu-lago, liĉioj de la urbo Huiyang, Guangdong-provinco, citrona oleo kaj ananasoj el la urbo Zhanjiang, tolaĵo el la urbo Shantou, salikokoj kaj mustelfeloj el la urbo Dalian, Liaoning-provinco, kaj tabako el la urbo Anyang, Henan-provinco.

### NOVAJ SUKCESOJ


Ĉinio estas la trideka lando laŭ la totala valoro de la eksterlanda komerco en la mondo. Por pliigi la kvanton de eksportaj varoj, en la lastaj jaroj Ĉinio speciale fondis pli ol 20 eksportajn kompaniojn por aviado, ŝipo, mekaniko, elektrono. La mekanikaj kompanioj, kiuj havas rimarkindan skalon, kompletajn ekipaĵojn kaj scienc-esploran kapablon, eksportis jare ĉirkaŭ 20 000 ilmaŝinojn de 200 specoj. La ŝip-kompanioj akceptis taskon eksporti pli ol 20 varŝipojn de 10 000 ĝis 36 000 toneloj (inkluzive de putbora ŝipo). La 27 000-tonela oceana varŝipo "Changcheng" jam estis transdonita al uzado ĉe Dalian en septembro 1981. La Ĉina Aviada Eksporta kaj Importa Kompanio ankaŭ subskribis interkonsenton pri prilaborado de surteriĝa aparato kaj kajutpordo de aviadilo, motor-elementoj kaj novtipa helikoptero per materialoj kaj desegnaĵoj liveritaj de eksterlandaj mendantoj. Ekde 1980 multaj elektronikaj fabrikoj de Ĉinio subskribis interkonsentojn kun fabrikoj kaj agentaj komercistoj el Usono, Japanio, FR Germanio kaj Hongkongo pri prilaborado kaj muntado de generatoroj, aparatoj por radioriceviloj kaj dikta-

*Jen nova produkta linio konstruita en kunlaboro de la Pekina Televidila Fabriko kaj la Elektr-objekta Kompanio Matsushita de Japanio, kiu ĉiujare povas produkti ĉirkaŭ 140 000 kolorajn televidilojn de 14-22 coloj.*





La oceana kargoŝipo "Changcheng" konstruita de la ŝipfarejo de Dalian por la ŝipkompanio Liancheng de Hongkongo estas provata.



fonoj kaj televidiloj kaj ankaŭ pri produktado de radaraj aparatoj kaj surtera satelitostacio.

Ĉar la ĉinaj elektraj produktaĵoj povas kontentigi la bezonon de eksterlandaj komercistoj, iom post iom multiĝas la nombro de mendantoj. Tajlando, Pakistano kaj la Filipinoj importas koton-takstilajn maŝinojn kaj ekipaĵojn por malgrandaj hidroelektraĵoj kaj ŝtalaj fabrikoj; kaj Usono, Japanio kaj okcidenta Eŭropo komencis aĉeti elektrajn maŝinojn de Ĉinio. Laŭ kalkulo de koncernaj personoj, en la venontaj jaroj la eksporta valoro de la elektraj maŝinoj de Ĉinio ĉiujare pliiĝos je 50%.

En la lastaj jaroj, por ke la ŝarĝa kaj malŝarĝa kapablo de la ĉinaj havenoj estu adaptita al la bezono de la disvolviĝanta eksterlanda komerco, la ĉinaj eksterlanda komerca kaj transporta institucioj aplikis multajn formojn de transportado. Ekzemple, sur la bazo de la unueca internacia fervoja transportado Ĉinio komencis kontenerizi la trafikon sur la fervojo tra Siberio. De aprilo 1980 komenciĝis la provtrafikado per konteneroj al la irana fervojo, kaj poste, al la diversaj landoj de okcidenta Eŭ-

ropo. Krome, Ĉinio establis rilaton kun koncernaj transportaj kompanioj en Svislando, Irano, FR Germanio, Finnlando, Svedio kaj Britio.

La unueca trafikado de la fervojo kaj akvovojo, kiu komenciĝis en 1977, ankoraŭ bone funkcias. Ekde la lasta duonjaro de 1980 denove disvolviĝas multformaj unuecaj transportadoj,

kaj establiĝis rilato kun kelkaj kompanioj de Japanio kaj Hongkongo. Nuntempe ankaŭ la avia transportado aktive disvolviĝas.

#### REFORMADO DE SISTEMO EN PROVADO

Por adaptiĝi al la disvolviĝo de la internacia komerco, en la

*Laboristino de la kultivejo Lujiang, Yunnan-provinco, kolektas kafgrajnojn.*



lastaj jaroj Ĉinio reformis la sistemon por la eksterlanda komerco. En la pasinteco, laŭ tiu sistemo, ĉiuj ĝeneralaj eksterlandaj komercaj kompanioj zorgis sub la unuigita gvido la eksportan kaj importan komercon. Tia administrado jam ne taŭgas por la nuna disvolviĝo de la eksterlanda komerco. En la lastaj du jaroj, por entuziasmigi la entreprenojn, la ŝtato donis la rajton administri kelkajn eksportajn varojn al la lokaj registaroj kaj koncernaj departementoj. Tiel en kelkaj industriaj departementoj, provincoj kaj urboj fondiĝis eksportaj kaj importaj kompanioj. Ŝanhajo, Tianjin, Dalian, Kantono, Qingdao, Xiamen k.a. apudmaraj urboj multe kontribuos al la eksterlanda komerco. Samtempe en la provincoj Guangdong kaj Fujian praktikiĝas aparta politiko: la ŝtato donis al ili pli da memdecidaj rajtoj en administrado de la eksterlanda komerco. La Ĉina Metalurgia Eksporta kaj Importa Kompanio praktikas la politikon kombini industrion kaj komercon, t.e. en la eksterlanda komercado, koncernaj fabrikoj partoprenas en vendado, intertraktado kaj plenumado de interkonsento. Por disvolvi la servadon en la eksterlanda komercado Ĉinio speciale fondis transportan, pakadan kaj reklaman kompaniojn.

### **KUNA ADMINISTRADO AKCELAS LA EKSTERLANDAN DAN KOMERCON**

Ekde 1979, post la publikigo de la Leĝo pri Kunadministrado de Entrepreno inter Ĉinio kaj Fremdlando, nombro da tiaj entreprenoj fondiĝis kaj akiris ekonomian efikon. La provinco

Jiangsu sukcese intertraktis 481 kunlaborajn projektojn per ĉirkaŭ cent milionoj da dolaroj. Tiuj projektoj plejparte estas de la tekstila kaj elektronika industrio kun malmulta investo, mallonga tempo de produktado kaj frua efiko. Nun la pruntmono por 200 projektoj jam estis redonita. Dank' al enkonduko de eksterlanda avangarda tekniko, ili altigis la kvaliton de siaj produktaĵoj kaj akiris rimarkindan ekonomian efikon. Ekz. la lanŝpinejo, du lantriĉoj kaj maŝinriparejo sub la Unuigita Lan-tekstila Kompanio administrataj kune de industriistoj de Hongkongo kaj la Ŝanhaja Tekstila Buroo, produktas altkvalitajn lanfadenojn kaj vestojn el kunklaj kaj ŝafaj lanoj. Ilia lanfadeno havas konkuran povon en la internacia merkato. Ĉiujare ili povas produkti 1.5 milionojn da funtoj da lanfadenoj el kunkla kaj ŝafa lano kaj 1.2 milionojn da vestoj el tia lano. Post nelonge la fabrikoj povos eksporti lanovestojn. Ĉinio, en kunlaboro kun Japanio kaj Francio, ekspluatis enmaran petrolfonton kaj per tio trovis kompare riĉajn petrol- kaj gaskampojn. La Vinfarejo de Tianjin administrata kune de Ĉinio kaj la franca financgrupo R. Martin, utiligante enkondukitajn ekipaĵojn kaj teknikojn, speciale produktas vinon por eksporti. La kvalito de la vino jam atingis la internacian nivelon de la samspeca vino en la mondo. La Ĉina Lifta Kompanio Schindel, administrata kune de la Ĉina Konstrumaŝina Kompanio kaj la koncernaj kompanioj de Svisio kaj Hongkongo, multe plibonigis sian administradon, kaj la kvalito de iliaj produktaĵoj ĝenerale atingis tiun de la unuaklasa produktaĵo.



## **KIEL MI INSTRUAS ESPERANTON AL ĈINAJ STUDENTOJ**

**E**N 1980 Esperanto estis denove instruata, kiel nedeviga dua fremda lingvo por la studentoj de la triajara klaso en la anglalingva sekcio de la fremdlingva fakultato de nia lernejo, la Orient-Ĉinia Porinstruista Universitato en Ŝanhajo. Mi denove gvidas la kurson de la Internacia Lingvo kaj penas plibonigi mian instrumetodon, por ke miaj studentoj povu lerni Esperanton pli rapide.

Por ni ĉinoj, lerni Esperanton estas multe pli malfacile ol por okcidentanoj. Oni diras, ke la malfacileco de fremdlingva lernado por la ĉinoj kuŝas en tio, ke plejparto de la lernitaj fremdaj vortoj baldaŭ forgesiĝas kaj fariĝas denove fremda al la lernintoj. Tial mia ĉefa ambicio en la plibonigo de la instrumetodo estas venki la malfacilon en la memoro de novaj vortoj kaj helpi la studentojn longe memorteni kiel eble plej multajn novajn vortojn.

Dank' al la facileco de la vortfarado de Esperanto per afiks-aldonado kaj radik-kunme-





S-ro Pandiŝo instruas Esperanton.

## de PANDIŜO

tado, mi utiligas ĝin ĝis la plej alta grado. En la komenco de ĉiu lecionhoru mi petas la studentojn traduki Esperantajn vortojn ĉinlingven kaj ĉinajn vortojn Esperanten, kion mi unue preparis en la instruplano. Ĉi tie mi citu kelkajn el ili.

Ekzemple, en la unuaj lecionoj, mi demandas al ili relative facilajn vortojn: malalta (*di*)\*, lacigi (*shipilao*), jarlibro (*nianjian*), ktp.

Jen ĉinaj vortoj tradukotaj Esperanten: *touting* (subaŭskulti), *guanzhong* (rigardantaro), *jiaopengyou* (amikiĝi), ktp.

Ĉar mi konstante donas al ili tiajn buŝajn tradukojn de vortoj ambaŭlingvaj, la studentoj baldaŭ kutimiĝas al tiaj ekzercoj kaj poste ili jam povas traduki pli malfacilajn vortojn el Esperanto ĉinlingven: mallongigo (*suo-xie*), laŭvola (*xuanxiu*) k. a. Kaj ĉinajn vortojn Esperanten kiel *meiyouchulude* (senelireja), *tingzhenqi* (aŭskultilo), *riluo* (sunsubiro), ktp.

Pro la oftaj radik-kunmetado kaj aldonado de afiksoj al malnovaj vortoj, la kursanoj trovas tion tre interesa, ĉar tiamaniere ili ne nur parkerigas grandan nombron da vortoj, sed ankaŭ povas mem fari novajn vortojn. Oni asertas, ke la studentoj en la Esperanto-kurso posedas multe pli grandan vortoprovizon ol tiuj en la kursoj de aliaj duaj fremdlingvoj.

Post kelkaj monatoj la privortaj demandoj ŝanĝiĝas al fraza tradukado, por ke la studentoj ne tediĝu pro tro ofta traduko de nuraj unuopaj vortoj. Tiam mi petas ilin traduki kompletan frazon ambaŭdirektan, ĉu el Esperanto ĉinlingven, aŭ el la ĉina lingvo Esperanten.

La dua celo de mia instrumetoda plibonigo estas kulturi la parolan kapablon de la kursanoj. Mi donas al ili du specojn de demandoj: pritekstaj demandoj kaj ĝeneralaj demandoj, tiel ke ili ne fariĝu mutaj esperantistoj.

La tria celo de mia instrumetoda plibonigo estas akcenti al la studentoj la gravecon de skriba elĉiniga tradukado, por ke ili bone sin ekipu tiuflanke, ĉar nur kiam ili povos libere traduki Esperanten el la ĉina lingvo, ili povos konigi ĉinajn aferojn al eksterlandaj samideanoj. Tial mi rigore postulas, ke la kursanoj nepre faru tre zorgeme la du tradukajn ekzercojn elĉinigajn ĉe la fino de ĉiu leciono: la unua estas fraz-traduko por praktiki la gramatikon ĵus instruitan en tiu leciono, dum la dua estas por skribe imiti la tekston de la koncerna leciono. Post la redono de la korektitaj kajeroj mi atentigas la kursanojn pri iliaj komunaj eraroj.

Kiam duono de la lernolibro estas finita, la studentoj havas

ŝancon por libera interparolo. Ili estas dividitaj en du aŭ tri grupojn, kun unu el la pli lertaj anoj kiel grupestro. Por eviti sencelan babiladon, mi elektas ĉiufoje por ili paroltemon, ĉirkaŭ kiu ili jam havas sufiĉe da uzeblaj vortoj por sin esprimi. La instruisto ĉirkaŭiras por doni al ili konsilojn kaj mankantajn vortojn. En la komenco la studentoj estas iom timemaj, sed post kelkfoja praktikado ili al-kutimiĝas kaj komencas libere interparoli en Esperanto.

Ĉar miaj kursanoj estas studentoj de la triajara klaso en la anglalingva sekcio de la fremdlingva fakultato, ili jam posedas sufiĉan scion de tiu eŭropa lingvo. Surbaze de preparado, ili mem legas la vortliston kaj klarigas la tekston. Dum la leciono mi nur korektas iliajn erarojn, aldonas pliajn necesajn klarigojn kaj atentigas ilin pri gravaj punktoj de la gramatiko. La ceterajn ekzercojn en la lernolibro mi utiligas diversmaniere, ĉu per buŝa respondo, ĉu per skriba respondo sur la nigra tabulo, ĉu per demando kaj respondo inter la studentoj ktp.

Dum la instruado, mi de tempo al tempo avertas ilin, ke kvankam kun posedo de la angla lingvo ili povas lerni Esperanton pli facile ol tiuj kiuj ne povoscias iun ajn okcidentan lingvon, tamen ili devas ĉiam zorgi, ke ili nepre ne konfuzu la Esperantajn vortojn kun la anglaj. Ekzemple, la Esperanta "larĝa" signifas la anglan "broad" anstataŭ "large", kiu estas Esperante "granda". La Esperanta "placo" signifas en la angla "a square" anstataŭ "a place", kiu estas Esperante "loko". La Esperanta "kopio" signifas en la angla lingvo "reproduction" anstataŭ

“a copy (of a book)” kiu estas “ekzemplero” en la Internacia Lingvo. Ili ne misuzu “de” por “da” en “glaso da akvo”, “skatolo da ĉokoladoj” ks., ĉar la du prepozicioj havas malsamajn signifojn. Tian ĉi eraron uzantoj de la angla lingvo facile faras.

Krome, mi ĉiam admonas la kursanojn, ke ili ne blinde imitu anglajn esprimojn. La angla “as. . . as possible” devas skribiĝi en Esperanto “kiel eble plej. . .”. Oni evitu la duoblajn objektojn kiel “donaci lin libron” aŭ “montri ilin la vojon”, kiuj estas ridindaj. Ni esprimas la dativon per “al + nominativo”.

Mi emfazas la zorgan uzon de la refleksivo “si”. Aparte mi atentigas ilin pri la Zamenhofa uzo de “al si” anstataŭ “sia” rilate la korpoparton, kiel “ĉi kombis al si la harojn”, “li lavis al si la manojn” ktp.

La supre-menciitaj instrumentodaj plibonigoj estas rudimentaj. Mi sincere atendas komentojn kaj kritikojn de la tutmondaj samprofesiuloj por plibonigi la instrumentodon al la orientaj komencantoj.

*\* Ĉi-sube ĉiuj kursivaj vortoj estas ĉinaj vortoj transskribitaj laŭ la latinigita han-lingva alfabeto. De 1979 EPC uzas tiun ĉi alfabeton por transskribi ĉiujn ĉinajn proprajn nomojn.*



LILIANA PALCZEWSKA:

# AMIKECO PER ESPERANTO

**E**N 1975 mi esperantistiĝis kaj tuj komencis labori en la estraro de la Pola Esperanto-Asocio, en mia urbo Lodzo, granda industria urbo kun preskaŭ 900 mil loĝantoj. Unue mi gvidis la kulturalan sekcion, kaj post unu jaro mi fariĝis vicprezidantino de tiu ĉi vigla kaj sufiĉe granda asocio, nun nombranta 1 300 membrojn.

Mia unua vojaĝo pere de Esperanto estis en 1976 al Jugoslavio, kie mi vizitis la Esperantan Kampadejon en la pitoreska Primošten kaj faris inter geesperantistoj el 16 landoj miajn unuajn paŝojn kiel freŝbakita esperantistino. Dum du semajnoj mi vivis en varma kaj amika etoso, uzante la Internacian Lingvon por niaj ĉiutagaj bezonoj kaj konversacioj inter la reprezentantoj de Jugoslavio, Aŭstrio, Francio, Germanio, Italio, Svislando kaj aliaj landoj. En romantika pejzaĝo, ĉe blua maro, dronante en la maro de amikeco mi komencis ami Esperanton kaj pli bone

kompreni la signifon de la lingvo.

Post unujara korespondado kun itala samideano, mi estis invitita al Italio en 1977. Julie mi forflugis de Varsovio al Milano, kie atendis min mia amiko. Mia dusemajna restado en la suna Italio impresis min tiel forte, ke mi komencis skribi taglibron pri miaj ĉiutagaj impresoj kaj travivaĵoj en tiu pitoreska lando. Mia amiko loĝas en Sanremo, iama ŝtata kuracloko por reĝoj kaj imperiestroj, hodiaŭ por ŝtataj eminentuloj kaj diplomatoj. Ĉiutage li kun sia edzino akompanis min en aŭtomobilo al diversaj urboj kaj urbetoj. Mi vizitis ankaŭ la belan, antikvan urbon Firenze, poste Modena, en kiu loĝas mia dua korespondamiko, Bolonia kaj Milanon. En diversaj urboj mi vizitis esperantistojn kaj en Milano mi eĉ vizitis E-klubon. Riĉplena de diversaj impresoj kaj kun nova inspiro por la E-laboro mi revenis al la patrujo.

Verŝajne mi estas bonŝanculino, ĉar la sekvantan jaron mi





*La aŭtoro sur la insulo Capri*

denove ricevis inviton al Italio, sed jam de aliaj amikoj. Ĉi-foje mi flugis al Romo kaj post la vizitado de la antikva ĉefurbo, kune kun miaj amikoj mi veturadis per aŭtomobilo al la suda parto de Italio, al la urbo Bari. Tie mi konatiĝis kun aktivaj esperantistoj kaj pasigis agrablajn tagojn en amika rondo. Neforgeseblaj estis por mi la vesperoj, dum kiuj grupeto de gesamideanoj kolektiĝis ĉe unu aktivulo, kiu posedas belan loĝejon kun granda teraso, kie ni gaje babiladis sub la stelplena ĉielo. En unu vespero mi estis invitita de la tuta E-grupeto al speciala fiŝrestoracio ĉe la maro. Per 5 aŭtomobiloj ni veturis 10 km. de Bari al loko, kie atendis nin jam preparitaj tabloj por 22 personoj. Fariĝis agrabla vespero kaj min multe plezurigis kaj kortuŝis zorgo de ĉiuj, ke mi havu plej bonajn impresojn. Dum la vespero mi multe rakontis pri E-movado en mia lando, mi deklamis versaĵojn kaj ni kune kantis. Varma sento fluis en mian koron, sento de amo kaj

admiro por miaj novaj, karaj geamikoj.

Dum la sekvantaj du semajnoj mi vizitis, kune kun miaj akompanantoj Napoli, la ĉarman insulon Capri kaj la same belegan insulon Ischia. Mi vizitis ankaŭ Pompei, elfosaĵon de urbo roma-

na, ekzistanta antaŭ dumil jaroj kaj detruita en erupcio de Vezuvio. Poste mi vizitis Paestum. Tie estas antikvaj grekaj konstruaĵoj, tre similaj al la konstruaĵoj, kiuj troviĝas sur la Akropolo de Ateno. Mia 3-semajna restado finiĝis denove en Romo kaj adiaŭante miajn karajn amikojn, mi diris: "Ĝis la revido post du semajnoj en Varna."

Jes, Varna — mia unua mondkongreso. Alvenis preskaŭ 5 000 geesperantistoj el 50 landoj kaj eĉ 9 miaj gekorespondantoj. Mi aŭdis kaj legis multe pri kongresoj, sed nun mi scias, ke oni devas mem tion travivi! Troviĝante en varma kaj amika internacia familio mi sentis min tre feliĉa kaj mi ne sciis, ĉu partopreni interesajn prelegojn, ĉu aliajn aranĝojn, ĉu nur simple babiladi kun miaj malnovaj kaj nove ekkonitaj amikoj. Do, vespere mia kapo ĉiam nur lacege zumis pro tro da impresoj ricevita dum la

*S-ino Liliana Palczewska (la unua de dekstre) kun japana, germana kaj aliaj geamikoj en Stokholmo*



tuta tago, sed tiu ĉi lacego estis agrabla, ĉar ĝi estis miksitaj kun ĝojo kaj feliĉo.

Inter miaj 9 gekorespondantoj troviĝis ankaŭ mia svisa amiko. Ni pli frue, koresponde interkonsentis nian komunan veturadon al Pollando kaj mi pro tio speciale alvenis al Varna per aŭtomobilo kun mia edzo. Tuj post la fino de la kongreso ni triope forveturis kaj laŭplane vizitis ĉiujn liajn geamikojn loĝantaj en socialismaj landoj. Nia kuna vojaĝo daŭris du semajnojn kaj ni havis survoje diversajn gajajn travivaĵojn. Ĉiuj liaj konatoj akceptis nin plezure kaj mi akiris novajn amikojn. Finfine mi havis feliĉon gastigi mian amikon dum dek tagoj en mia hejmo. Ĉe la adiaŭo mia amiko diris: “Do, kara Liliana, ĝis la revido venontjare en Svislando.”

Kaj vere denove mia sekvanta vojaĝo efektiviĝis. Mi restis ĉifoje eĉ ses semajnojn en la lando de horloĝoj, kaj estis ravita de la beleco de svisaj urbetoj, lazuraj lagoj kaj la fieraj Alpoj. Mia amiko kun sia edzino, ankaŭ perfekta esperantistino, loĝas en malgranda, sed pitoreska urbeteto, al kiu venadas dum preskaŭ tuta jaro multe da turistoj el diversaj landoj. Ĉar mia amiko estas instruisto, li do havis liberan tempon por akompani min. Ĉiutage mi veturadis per telferoj, seĝliftoj kaj aliaj montarvagonaretoj, ankaŭ per specialaj poŝtbusoj, trajnoj kaj ŝipoj. Ne eblas priskribi ĉion, kion mi vidis kaj vizitis. Mi ankaŭ multe grimpis, ĉar mi ege ŝatas montojn.

Poste ni triope veturis al Lucerno por partopreni la mond-

kongreson, kiu, laŭ mi, estis brile organizita. Granda ĝojo kaj plezuro estis por mi konatiĝi kun ĉinaj esperantistoj. Nia amikeco komenciĝis surstrate, dum la ekskurso en Lugano. Kelkaj ĉinaj samideanoj faris foton kun la memortuko de la kongreso, kaj kiam mi preterpasis ilin, hazarde mi estis invitita por la komuna foto. Ankoraŭ poste mi havis eblecon paroli kun ili. Kaj ekde tiam mi vigle korespondadas kun du ĉinaj samideanoj, interŝanĝas librojn kaj spertojn pri E-movado el niaj landoj. Mi ricevas la interesan kaj belan revuon “El Popola Ĉinio” kaj dank’ al Esperanto mi pliriĉigis mian antaŭan mizeran konon pri Ĉinio, kaj hodiaŭ mi povas facile diskuti kun ĉinaj gesamideanoj pri ilia lando. Kompreneble, mi sopiras kaj revas viziti iam ankaŭ la interesan kaj belan Ĉinion. Eble iam miaj revoj realiĝos. . .

Post ĉiuj miaj revenoj el eksterlando mi faris prelegojn montrante belajn lumbildojn por nia membraro, kelkfoje eĉ por neesperantistoj, por ke ili eksciu kion oni povas travivi pere de Esperanto kaj kion oni perdas ne konante tiun lingvon. Apartenante, de kelkaj jaroj, al “Pasporta Servo”, mi gastigis multajn esperantistojn el diversaj landoj en mia hejmo. Intertempe mi ankaŭ partoprenis diversajn enlandajn aranĝojn kaj libertempojn, ekzemple nian faman feriadon en montara regiono, nomatan “Ora Pola Aŭtuno”. Al ĝi venadis ĉiujare ĉirkaŭ 400 geesperantistoj el diversaj landoj.

Mia entuziasmo por Esperanto ĉiam pli kaj pli kreskas kaj in-

pektas multajn homojn por nia movado.

Delonge mi revis viziti la belan Hispanion, kaj kiam mia amikino Jadwiga Gibczynska, esperantistino-aktorino, faris en 1981 al mi proponon vojaĝi kaj prezenti teatraĵeton kune kun ŝi en la pitoreska lando, mi ĝoje akceptis ŝian proponon.

Dum 32-taga restado mi vizitis Madrid, Córdoba, Sevilla, Granada, Malaga, Barcelona, Sabadell, Zaragoza, Toledo kaj Segovia, ne kalkulante ankoraŭ malgrandajn urbetojn, al kiuj kondukis nin hispanaj gesamideanoj.

Ĉe ĉiuj stacioj atendis kaj bonvenigis nin hispanaj esperantistoj kaj kondukis nin al niaj gastigantoj. La helpo de esperantistoj ĉiulokaj estis por ni grandvalora. En diversaj E-kluboj estis ĉiam ĉio preparita por niaj prezentaĵoj. En la urbo Zaragoza mi eĉ estis en lernejo, en kiu infanoj lernas Esperanton kaj mi kune kun la instruisto gvidis unuhoran Esperantan lecionon. Kortuŝa kaj neforgesebla estis por mi la amikeco de hispanaj esperantistoj, kaj mi pliriĉigis je kelkaj novaj amikoj.

Kaj nun en 1982 mi intencas partopreni la kongreson en Belgio. Kaj mi denove ricevis inviton viziti Francion.

Jes, mia 7-jara esperantista vivo estas riĉa kaj Esperantujo fariĝis kvazaŭ mia dua patrujo. Ofte homoj demandas min, kion donis kaj donas al mi Esperanto. Kaj mi entuziasme respondas: “Esperanto donis al mi ĝojon kaj feliĉon, la plej grandan trezoron — sinceran kaj veran amikecon de multaj homoj sur la tero.”



# En someraj tagoj


Fotoj de YAN ZHONGYI

Somere en Pekino oni provizas ĉiujn fabrikojn kaj oficejojn per necesaj ekipaĵoj por ke la laboroj iru glate. La loĝantoj pasigas somerajn tagojn diversmaniere. Jen fotoj, kiuj vidigas parton de ilia vivo.

Sub la arda suno


En korto





Glaciaĵo plej ŝatata de infanoj


“Panjo instruas min naĝi.”



Kiel agrable sur lago!








Akvomelono, unu el la ŝatataj someraj fruktoj







En somera mateno





**ATEN-**

**TU!**



**EPĈ**

## Flugos al la tuta Ameriko

Dum longa tempo ni sendis nian gazeton per ŝipo al niaj legantoj en Norda Ameriko kaj Latin-Ameriko, kaj ili ricevis ĝin post minimume du monatoj pro la longa veturado. Por ke nia gazeto ĝustatempe atingu iliajn manojn, ni decidis ĝin sendi aerpoŝte ekde la 11-a numero de 1982 sen pliigo de la abonkosto, pri kio ni interkonsiliĝis kun la Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (Guoji Shudian) kaj ricevis ties aprobon. Tiun specialan aranĝon ni faros konsiderante aparte la amerikajn abonantojn, kiuj certe ĝojos pro tio.

### PLIMULTIĜOS KOLORAJ BILDPAĜOJ

Laŭ la peto de niaj legantoj pliriĉigi la bildpaĝojn, ni decidis plimultiigi la kolorajn bildojn je kvar paĝoj ekde la unua numero de 1983. Tiam la legantoj vidos pli da koloraj bildoj pri ĉinaj pejzaĝoj, la vivo de la ĉina popolo kaj la kulturo kaj arto de Ĉinio.

### ABONU KAJ ABONIGU

Ekde la 1-a de novembro ni komencos varbi abonantojn por la jaro 1983. Ni petas niajn perantojn en diversaj landoj energie varbi abonantojn por nia gazeto. Ni kore antaŭdankas ĉiujn helpantojn kaj rekompencos ilin per donaco kiel antaŭe.

**LA RED.**

La 10-an de sep. 1982

## ESPERANTO-ASOCIO DE LANZHOU FONDITA

La 1-an de aŭgusto pli ol 110 esperantistoj de la urbo Lanzhou ĉeestis la inaŭguron de la asocio.

Lanzhou en la provinco Gansu estas la plej granda urbo en la nord-okcidenta parto de Ĉinio. En la pasinteco tie estis preskaŭ nenia Esperanto-aktivado. En la pasintaj du jaroj, subtenate de provincaj kaj urbaj gvidantoj kaj koncernaj institucioj, aro da junaj esperantistoj funkciigis ok Esperanto-kursojn, eldonis la Esperantan revuon "Vojo" kaj faris diversajn aktivadojn por diskonigi la lingvon. Ĉio tio metis bazon por la fondiĝo de la asocio. Wei Zhaoxiong, vicedestro de la Informa Departemento de la Urba Partia Komitato de Lanzhou, kaj Du Fugong, rektoro de la Komerca Instituto de Lanzhou, ĉeestis la kunvenon. La kunveno aprobis la statuton de la asocio kaj unuanime elektis Lu Wanyi kaj Wang Yunxin prezidanto kaj vicprezidanto, kaj Zhang Bing ĝenerala sekretario.

## "VERKOJ DE VERDA MAJO" ELDONITA EN PEKINO

Okaze de la sepdeka datreveno de la naskiĝo kaj la 35-a datreveno de

la forpaso de la fame konata japana esperantistino Verda Majo, internacia pacbatalanto kaj fidela amiko de la ĉina popolo, la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis la libron helpe de la japana esperantisto s-ro Miyamoto Masao. La libro entenas verkojn kaj tradukojn de Verda Majo. Ĵelezo, vicprezidanto de ĈEL, kiu estis malnova amiko de Verda Majo, verkis por la libro antaŭparolon, en kiu li detale prezentis la aŭtoron. La libro estas bindita kaj broŝurita. Pri la eldono donis informon la plej granda ĉina ĵurnalo "Renmin Ribao" kaj la anglalingva ĵurnalo "China Daily".

## JAPANAJ ESPERANTISTOJ EN PEKINO

Post sia partopreno en la 67-a Universala Kongreso de Esperanto, 22 japanaj esperantistoj kaj Esperanto-simpatiantoj estrataj de s-ino Isobe Yukiko gastis revenvoje en Pekino de la 6-a ĝis la 10-a de aŭgusto kaj estis varme akceptitaj de Pekinaj samideanoj. La gastoj kun granda intereso vizitis la Someran Palacon, la Imperiestran Palacon, la Grandan Muron kaj unu el la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio. Posttagmeze de la 7-a la Ĉina Esperanto-Ligo, la Redakcio de EPĈ, la Esperanta Sekcio de Radio Pekino, la Esperanta Sekcio de la Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (Guoji Shudian) kaj parto de la membroj

de la Pekina Esperanto-Asocio kunidis kun la japanaj esperantistoj en intima atmosfero. ĈEL donacis al ĉiuj gastoj po unu ĵus eldonitan libron "Verkoj de Verda Majo". Ĉinaj kaj japanaj samideanoj reciprokis donacojn. La suba foto montras la kunsidejon.

## POR DISKONIGI ESPERANTON EN GUILIN

La 27-an de junio 20 esperantistoj de la Esperanto-grupo de Guilin kunverda stelo sur la brusto servis ĉe la bordo de la lago Ronghu por diskonigi Esperanton. Ili respondis al preterpasantoj diversajn demandojn pri Esperanto kaj lernigis al iuj gejunuloj la Esperantan alfabeton kaj ofte uzatajn vortojn.

## ESPERANTO-PAROLADA KONKURSO EN HUANGSHI

Por kuraĝigi Esperanto-kursanojn kaj membrojn de la Esperanto-Asocio de Huangshi bone lerni la lingvon, la asocio okazigis sian unuan paroladan konkurson la 25-an de julio. La konkurso enhavis interpretadon, respondadon kaj prelegadon. Ĝin partoprenis 86 homoj, inter kiuj 18 estis premiitaj. La asocio decidis okazigi tian konkurson unufoje ĉiujare.

## ESPERANTO-KURSOJ EN LA PROVINCO ANHUI

En la someraj ferioj la Esperanto-Instituto de la provinco funkciigis en la urboj Bengbu kaj Anqing kaj la gubernioj Chaoxian kaj Lujiang naŭ Esperanto-kursojn, kiujn partoprenis pli ol 500 personoj. La kursojn gvidis kursanoj, kiuj bone lernis en la progresiga Esperanto-kurso de la Universitato de Anhui.

## ESPERANTO-EKSPOZICIO EN WUXI

Esperanto-grupo de la Kultura Domo de Wuxi aranĝis Esperanto-Ekspozicion de la 10-a ĝis la 15-a de julio. La ekspozicion vizitis pli ol 1 300 personoj.



## ESPERANTO-EKSPOZICIO FONDITA EN HUAIDE

La 20-an de junio fondiĝis Esperanto-Instituto en la gubernio Huaide, Jilin-provinco. La inaŭguron ĉeestis vicsekretario de la Gubernia Partia Komitato kaj aliaj gvidantoj. Tong Zhiqin, vicestro de la gubernio, funkcias kiel ĝia honora prezidanto, kaj Liu Wei, bofrato de Verda Majo, fariĝis ĝia konsilanto.

## “RENMIN RIBAO” RAPORTIS PRI LA 67-A UK

La 24-an de julio la ĉina ĵurnalo “Renmin Ribao” raportis la ĉefan programon de la kongreso sub la titolo “Baldaŭ okazos la 67-a UK” kaj aperigis ĝian emblemon. La 2-an de aŭgusto la ĵurnalo denove raportis pri la kongreso kaj aktivadoj de la Ĉina Esperanto-Delegacio sub la titolo “La 67-a UK okazis en Belgio”.

## JUBILEA KUNORDIGA KOMITATO

La 30-an de majo 1982 okazis en Münster (FRG) kontakt-kunveno, ĉe kiu estis reprezentitaj 18 asocioj aŭ instancoj. La ĉefa decido estis la starigo de Jubilea Kunordiga Komitato prepare por la festado kaj informado pri la Jubilea Jaro 1987.

Kroma rezulto de la kunveno estis la fondo de provizora laborgrupo, kiu konsistas el T. Bormann, R. Corsetti, H. Frank, I. Lapenna, G. Maertens kaj H. Sonnabend. Tiu grupo kolektos proponojn pri agadoj rilate al la Jubileo, ellaboros skizon de gvidlinioj por agado, klopodos aligi pliajn organizaĵojn al JKK kaj kunvokos la sekvantan kunsidon.

## INFORMO EL NOV-ZELANDO

La 47-a Kongreso de la Nov-Zelanda E-Asocio okazis de la 6-a ĝis la 10-a de januaro 1982 en la loĝdomo “Te Kaihanga” en Christchurch. Ĉeestis 34 personoj inkluzive de s-ino C. Thornton el Ipswich, Anglio.

S-ino Rita Aagaard (Auckland) parolis pri la Universala Kongreso

en Brazilio kaj montris belajn lumbildojn. S-ro Fred Wood (Auckland) raportis, ke s-ino Yvon Canty, kiu mortis en 1981, postlasis \$ 10 000 al la Esperantomovado, sed oni ankoraŭ ne decidis kiamaniere uzi la testamentaĵon.

La venonta kongreso okazos en januaro 1983 en Masterton (Norda Insulo).

## LA 23-a AŬSTRALIA E-KONGRESO

Sepdek jarojn post la okazigo de la 1-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Adelajdo, okazis la 23-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso inter la 2-a kaj 9-a de januaro 1982 en la sama urbo.

En sia parolo al la kongreso, la vicguberniestro de Suda Aŭstralio Sir Walter Crocker diris: “Mi salutas en la nomo de la Reĝino kaj de Sud-Aŭstralio la 23-an Aŭstralian Esperanto-Kongreson. Mi deziras al vi plenan sukceson en via laboro. Mi esperas kun vi, ke Esperanto floros kaj ke ĝi estos baldaŭ akceptita kiel la Internacia Lingvo. Vivu Esperanto!”

Pri la Jubileo de Esperanto en 1987 okazis vigla diskuto. Raporton pri la agado de AEA dum 1980-81 prezentis la sekretario, s-ro Jack Fallu. Li diris interalie, ke grava afero, kiu meritas specialan men-

cion, estas la starigo de la Nacia Esperanto-Biblioteko en Kanbero, dank’ al la iniciatemo de s-ro Ralph Harry. Tiu biblioteko certigas, ke Esperanta literaturo estas kaj estos ĉiam havebla al esperantistoj en Aŭstralio.

## LA 30-A KONGRESO DE ESPE- RANTISTOJ EN KANSAJO

La kongreso estis okazigita la 12-an kaj 13-an de junio en Takatuki, Osaka-gubernio, Japanio. Ĝin partoprenis 365 ges-anoj ne nur el la regiono sed ankaŭ el diversaj lokoj de la lando, kaj plie eksterlandanoj el Argentino, Brazilo kaj Nov-Zelando buntigis la etoson. Prelegoj de Ulrich Lins, germano, pri “Kion germanoj diskutas pri Japanio?” kaj de Georgo Bondone, argentinano, pri “Kantoj en Argentino” elvokis la intereson de la aŭskultantaro. La estro de “Ludovikito” aperis la unuan fojon antaŭ la esperantista publiko.

## LA 70-A DATREVENO DE LA FONDIĜO DE LA E-GRUPO DE BOLOGNA

La festo pri la 70-a datreveno de la fondiĝo de la E-grupo de Bologna en Italio okazis inter la 21-a kaj 23-a de majo ĉi-jare kun la ĉeesto de pluraj eksterlandanoj, kies plejparto venis el Zagrebo — la jugoslavia urbo ĝemeligita al Bologna. Inter ili estis dek fervojistoj oficiale invititaj.

*La ĉeestantoj de la 30-a Kongreso  
de Esperantistoj en Kansajo, Japanio*





## Noviĝas la sociaj moroj de Ĉinio

**E**N marto ĉi-jare Ĉinio kondukis la kampanjon de la Nacia Monato por Socialisma Etiko, kaj post tio Ĉinio decidis preni ĉiun marton kiel Nacian Monaton por Socialisma Etiko. La kampanjo celas ŝanĝi kiel eble plej frue la malbonajn soci-morojn postlasitajn de la dekjara kaoso de la kultura revolucio, krei puran medion, starigi bonan sociordon kaj plibonigi la servadon.

En tiu monato, la tuta popolo, ĉu junuloj ĉu soldatoj, ĉu oficistoj ĉu aliaj, iris sur la stratojn por servadi al la socio. Dank' al tiu faro la konstruado de spirita civilizacio, kies ĉefaj punktoj estas kuraĝigoj al civilizacio, ĝentileco, moralo, bonordo kaj higieno kaj beloj en lingvaĵo, konduto, animo kaj medio, estis puŝita al alta tajdo. La klopodoj de la vastaj amasoj certgrade purigis multajn urbojn. Nemalmultaj ŝtataj institucioj, fabrikoj, lernejoj kaj butikoj faris entuziasman arbarizadon kaj beligadon. Samtempe reboniĝis la socia ordo kaj la sinteno de la servistoj en komerco, trafikado

kaj servaj profesioj. Formiĝas novaj moroj. Ĉi-sube ni prezentas kelkajn malgrandajn okazaĵojn.

### KORTUŜA FERVORO

En la kampanjo de la Nacia Monato por Socialisma Etiko, la Kvina Magazeno de Changchun, la ĉefurbo de la provinco Jilin, elmetis al sia servo la devizon "La kliento, la servo kaj la reputacio en la unua loko". Iun tagon komizoj el la tekstilaja fako de la magazeno faris enketon en vilaĝoj. Oni demandis la enketantojn, ĉu la magazeno povos helpi al iu laboristino, kiu bezonas ŝuojn kaj vestaĵojn de granda mezuro. La enketantoj opiniis, ke ili devas solvi por ŝi la malfacilon, kvankam ilia fako ne vendas ŝuojn, nek vestaĵojn. Ili decidis mendi por ŝi ŝuparon kaj vestojn de granda mezuro. Por kontentigi la laboristinon, la grupo sendis al ŝi ŝtofpecojn de sep specoj por ŝia elekto. Post semajno la laboristino respondis al la grupo. En la letero ŝi diris: "Viaj letero kaj ŝtofpecoj tre kortuŝis min. Mi

montris la leteron al miaj parencoj kaj amikoj, kaj ili ĉiuj laŭdis vian faron. En la pasintaj ok jaroj, de post kiam mi atingis la aĝon de 15 jaroj, mi neniam vestis min per vestaĵoj el belaj ŝtofoj. Sed nun mi, kiu antaŭe ofte portis virajn vestojn, povos surhavi decajn virinajn vestojn." Aldone ŝi petis, ke la magazeno pretigu grandmezuran veston por ŝia fianĉo, kiu altas 1.92 metrojn. Post nelonge ŝi ricevis la deziratajn vestaĵojn. Plena de dankemo ŝi telefonis al la magazeno, ke ŝi edziniĝos en julio kaj tiam ili portos la vestaĵojn por la geedziĝa ceremonio, kaj ŝi promesis sendi al la magazeno bombonojn. (Estas kutimo en Ĉinio, ke novgeedzoj disdonas bombonojn al siaj parencoj kaj amikoj. — Trad.)

Tiaj fervoraj servoj estas tre oftaj. En la urbo Jiamusi, Heilongjiang-provinco, 190 mil junuloj organizis sin en ĉ. ses mil helpogrupeojn. Ili volonte donas helpon al la tuta urbo. La ses gejunuloj de la 23-a Grenvendejo de la urbo donas helpon al 17 familioj de martiroj, militis-

*Servistoj de la flughaveno Baiyun, Kantono, bone servas pasaĝerojn.*



*Balaistinoj antaŭ la Pekina Stacidomo*




toj kaj seninfanaj maljunuloj. Ili portas al la lastaj grenon, purigas iliajn domojn, lavas iliajn vestojn kaj preparas por ili manĝaĵojn. Demandite pri la motivo, la junulino Jiang Libo diris: “Vidante la kadukajn maljunulojn venantaj por aĉeti grenon, mi ofte pensis, kion mi devus fari, se ili estus miaj gepatroj.”

### CIVILIZITA STRATO

La strato Dongmalu en la urbo Shijiazhuang, Hebei-provinco, estas civilizita strato. Tie kaj la strato kaj la domoj estas puraj. Ĉe la strato loĝas pli ol 22 mil homoj kaj 144 familioj estis honoritaj kiel “Familio Bona en Kvin Flankoj” (en civilizacio kaj ĝentileco; en respekto al maljunuloj kaj amo al infanoj; en akordiĝo kun najbaroj; en familia harmonio kaj en pureco kaj higieno) kaj 35 kortoj estis honoritaj kiel “Civilizita Korto”. La loĝantoj amas civilizecon kaj akordiĝon, montrante tute novan spiritan fizionomion.

Sed antaŭ kelkaj jaroj multaj familioj de tiu ĉi strato vivis malakorde kun siaj najbaroj pro provizado de akvo kaj elektro aŭ pro familiaj konfliktoj (konfliktoj inter bopatrino kaj bofilino, kvereloj inter geedzoj k. s.). Kaj la loĝantara komitato devis fari grandan klopodon por pacigi ilin.

Ekde la pasinta jaro la loĝantara komitato faris enketon pri 450 familioj, helpis al la neakordiĝantaj geedzoj, malpacaj najbaroj, familioj malsukcesintaj en edukado de siaj infanoj kaj junaj deliktuloj. Samtempe la komitato honoris la harmoniajn geedzojn kaj homojn respektantajn maljunulojn kaj amantajn infanojn. La loĝantara komitato mobilizis la loĝantojn por difini



*Konduktoro Liu Wang (en la antaŭo) de la trolebusa linio 107 faras purigadon kune kun trolebusistino.*

detalajn kriteriojn de “Familio Bona en Kvin Flankoj” kaj disciplinojn de “Civilizita Korto”. Cetere la komitato fondis kulture domon kaj biblioteketon, kiuj fariĝis tre bonvenaj al senlaboraj gejunuloj. Rapide malmultiĝis junaj deliktuloj.


### MORALIĜO DE JUNULOJ

La dekjara kaoso konfuzis la homojn en distingo de bono kaj malbono kaj putrigis la sociajn morojn. Parto de la junuloj ne povis diferencigi pravon kaj malpravon. Ja tia estis la juna konduktoro Liu Wang de la trolebusa linio 107 en Pekino. Diplomite el supera mezlernejo, li ne povis tuj trovi okupon kaj dum tiuj senlaboraj tagoj li estis infektita de malbonaj moroj. Post kiam li fariĝis konduktoro, li ŝatis stratulaĉajn vestaĵojn kaj hararanĝojn. En sia trolebuso li krude traktis la pasaĝerojn, ofte kverelis kun ili kaj eĉ insultis ilin, sed li tamen opiniis sin eleganta kaj brava.

Por helpi lin, lia gvidanto metis lin kaj aliajn du pliaĝajn kolegojn en la saman grupon.

La du kolegoj laboras diligente kaj konscie. En la komenco, kiam liaj du kolegoj purigis la trolebuson, li fumadis apude. Sed post kelka tempo li eksentis honton kaj komencis kunagi kun ili. Kiam Liu faris ian bonan aferon, la gvidantoj senprokraste laŭdis lin kaj faris al li پسigan demandon: “Kian konduton plej respektas la publiko?” Komence oni lasis lin observi kaj praktiki en la trolebuso por ke li diskutu kun ili pri la vidaĵoj. Liu trovis, ke liaj fasono kaj kruda sinteno estas malagrablaj al la publiko. Sekve li forzasis siajn lipharojn, detranĉis sian longan hararon kaj multe mildigis sian tonon. Maljunulojn li helpas iri el la trolebuso kaj al virinoj kun infanoj li cedigas sidlokon. Foje iu virino alkuris por atingi la trolebuson kaj Liu atendis ŝin tenante la pordon malferma. La virino tre dankis lin kaj poste skribis al la Pasaĝertrafika Buroo de Pekino por refoje esprimi sian dankon. Liu Wang rimarkis la ŝanĝiĝon de interrilatoj inter si kaj la pasaĝeroj, kaj sentis la respekton de pasaĝeroj





## **EKSPOZICIO DE ĈINSTILAJ PENTRAĴOJ EN BRITIO**

La Ekspozicio de Ĉinstilaj Pentraĵoj estis malfermita ĉe la Reĝa Arta Societo en Londono la 8-an de julio kaj ricevis varman aprobon de britaj artistoj kaj diversrondaj personoj.

Ĝi eksponis cent pentraĵojn de kvin famaj ĉinaj pentristoj, Wu Changshuo, Huang Binhong, Fu Baoshi, Chen Zhifu kaj Pan Tianshou, el la tempo de 1886 ĝis 1966. La brita eksĉefministro Edward Heath tondis la rubandon en la malferma ceremonio. Li diris, ke aprezi ĉinajn artaĵojn estas honoro por angloj. Ankaŭ la ĉina ambasadoro al Britio, Ke Hua, ĉeestis la malferman ceremonion.

## **EKSPOZICIO DE ĈINAJ INFANAJ PENTRAĴOJ EN FILADEFIO, USONO**

La Ekspozicio de Ĉinaj Infanaj Pentraĵoj por celebri la 300-an datrevenon de la konstruo de Filadelfio estis solene malfermita en la Ĉina Kultura Centro de Filadelfio la 28-

al lia afabla servo. Nun li estas avangarda laboranto en sia grupo kaj estis honorita de pasaĝeroj kiel "plej ĝentila kondukto".

Ĝuste tia konduto ŝanĝis la sociajn morojn. Iun tagon, venis al iu restoracio de Dandong (urbo en Liaoning) tri junuloj. Emociiĝinte pro la afabla servado de kelneroj, ili skribis en la notkajero de la restoracio: "Ni tri estis ĵus liberigitaj el mallibe-

an de junio. Pli ol 200 personoj ĉeestis la malferman ceremonion.

Ĝi eksponis 80 pentraĵojn, kiuj estis pentritaj de infanoj 5-15-jaraj el diversaj lokoj de Ĉinio.

## **LA KANTO-DANCA ENSEMBLO DE TIANJIN AL BRITIO KAJ IRLANDO**

La Kanto-danca Ensemblo de Tianjin, estrata de komponisto Cao Huoxing, kun 25 membroj veturis al Britio, la 3-an de julio, por partopreni tie en la Internacia Muzika Festivalo de Llangollen, "La Mondo de Muzika Arto kaj Danco" kaj la Internacia Folkloro Festivalo de Billingham, kaj la Internacia Folkloro Kunveno de Mallow en Irlando.

## **LA ŜANHAJA SURDAMUTULA TEATRO TURNEAS EN JAPANIO**

Invitite de la japana "Leotoda Asocio", la Ŝanhaja Surdamutula Teatro kun 15 membroj veturis al Japanio, la 25-an de julio, por partopreni la Sepan Japanan Muzikan Festivalon okazigitan en Nara kaj turnei en la urboj Chiba, Kioto, Myazaki.

## **LA KANTO-DANCA ENSEMBLO DE XINJIANG AL TURKIO KAJ MAROKO**

La ĉina Kanto-danca Ensemblo de Xinjiang turneis en iuj urboj de

rejo. Nin surprizis la drasta ŝanĝiĝo de la sociaj moroj en la urbo. Via afabla servo al la popolo edifis nin. Ni imitos vin kaj estos utilaj al la popolo."

## **MALGRANDA OKAZAĴO**

Kompreneble, la unumonata kampanjo pri konstruo de spirita civilizacio ne povas radikale ŝanĝi la sociajn morojn. Jen malbona konduto okazinta en la monato: Paro da geamantoj iris manĝante glaciaĵojn. Forman-

Turkio kaj Maroko inter la 24-a de junio kaj la 28-a de julio, post kiam ĝi invitive partoprenis la 10-an Internacian Istanbulan Artan Festivalon. La folkloraj programeroj de la ensemblo, kiuj spegulas la vivon de la ĉinaj nacimalplimultoj kaj riĉas je naciecaj stiloj, gajnis varman laŭdon de la spektantoj.

## **ANTIKVAJ ĈINAJ LOTUSSEMOJ FLORAS EN JAPANIO**

Antaŭ tri jaroj la ĉina urbo Dalian donacis pli ol dek lotussemojn antaŭ ĉ. 1 200 jaroj al sia ĝemela urbo Kitakyushu en Japanio. La Sinteza Agrokultura Centro de la urbo faris ĝerman eksperimenton al kvar el la semoj. En aprilo pasintjare unu el ili ĝermis kaj elkreskis tri floroj en junio ĉi-jare.

## **LA KNABO ALIMUJIANG GAJNIS ORAN MEDALON PRO PENTRADO**

En januaro ĉi-jare la pentraĵo "Granda Tapiŝo" de la 14-jara uĝura knabo Alimujiang gajnis oran medalon en la Internacia Ekspozicio de Infanaj Pentraĵoj okazigita en Dakka, la ĉefurbo de Bangladeŝo. La pentraĵo prezentas per kvin grupoj da homfiguroj la scenon, ke uĝuraj kamparanoj aĉetas tapiŝojn en foiro. Ĝi havas fortan vivetason kaj nacian stilon.

ĝinte la glaciaĵojn, la junulo tenis la malplenan skatoleton en la mano. Kaj tiam lia amatino sugestis al li: "He, forjetu tuj! Ne zorgu tian kaj tian 'monaton'." Post momenta hezito la junulo rigardis ĉirkaŭen kaj embarasite ĵetis la skatoleton teren.

La vortoj "civilizacio kaj ĝentileco" nun estas tre konataj por la ĉinoj. Sed la supra malgranda okazaĵo atentigas, ke oni devas fari grandegan klopodon por fari ĉiun homon civilizita kaj ĝentila.



# Pejzaĝo de la monto Qianshan

de CAO BAILONG

**L**EGENDO diras, ke en la plej malproksima antikveco iu feino, nomata Jicui, volis brodi lotusojn sur la kolorajn nubojn kaj per tiuj brodaĵoj ornamu la homan mondon. Sed kiam ŝi estis brodanta la 999-an lotuson, ŝi senatente faligis la brodilon en la intermonton kaj la rokfen-do estis inkrustita per la falinta brodilo. Poste tiuj broditaj lotusoj turniĝis en montpintojn. Por rememori la feinon oni eknomis tiujn pintojn Qianshan. (En la ĉina lingvo “Qianshan” signifas “mil montoj”. — Trad.) Kaj kun tempopaso tiu regiono fariĝis fama pitoreskejo de la duoninsulo


Liaodong en la nordoriento de Ĉinio.

Forlasinte la ŝtaturbon Anshan, la aŭto portas onin ĝis la monto Qianshan post ĉirkaŭ 40-minuta veturado. Vidate de malproksime, alte leviĝas la montpintoj unuj post aliaj, similaj al ovalaj petaloj. Sur la fono de la densa arbaro ili kreas la impreson kvazaŭ miloj da lotusoj flus sur verda maro.

Enirinte la montregionon kaj suprengriminte laŭ la montŝtuparo, oni atingas terason, kie kaŭras ronda rokego kaj tri ses-flankaj pagodoj. Sur la

rokego videblas tri ĉizitaj ĉinaj ideografiaĵoj signifantaj “Teraso de Feoj”. Ĉirkaŭe prosperas verdaj antikvaj pinoj. Multaj turistoj tie ripozas kaj fotas. Pli suprasidas la Taoisma templo Amitabho, konstruita en Tang-dinastio (618-907 p.K.). En ĝia ĉefa halo troviĝas skulptita statuo de Laŭzi, la fondinto de Taoismo. Ĉe la kulmino de la templo staras tre impone la Domo Ĉielimperiestra. Ĉe ĝia okcidenta kru-tajo en la vento dancas iu malgranda pino, nur unu metron alta kaj malpli ol dek centimetrojn dika. La pino kreskas en la roka fendo jam ĉirkaŭ 400

## LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Changchun
3. Shijiazhuang
4. La monto Qianshan
5. Shaanxi-provinco
6. Henan-provinco
7. Anhui-provinco
8. Jiangsu-provinco
9. Hebei-provinco
10. Taiyuan
11. Suzhou



jarojn. Oni nomas ĝin Povra Pino.

Ju pli supre, des pli mallarĝa kaj kruta fariĝas la montvojo, kie povas grimpi nur unu persono. Tie sur la krutajo troviĝas ok ĉizitaj piedsignoj. Oni devas rapide grimpi paŝon post paŝo. Kiam oni rigardas de tie malsupren, iliajn okulojn trafas animskua abismo. Malantaŭ tio kaŭras kelke da rokegoj, kiuj obstrukcas la vojon. Inter ili estas mallarĝa fendo, kie oni devas trapasi kun etenditaj brakoj sin premante al la rokmuro kaj antaŭen moviĝi paŝon post paŝo. Ĝin forlasinte, la turistoj devas forte kapti la surrokan kavon per unu mano kaj la feran ĉeneron per la alia kaj energioplene salti supren por atingi la lokon "Tuj sub la Ĉielo". De tie oni povas plu grimpi supren, sin apogante al la fera balustrado, kaj atingi "Super la Ĉielo". Rigardante de tie oni vastigas sian vidkampon antaŭ la ondantaj montoj en la senlima verdaĵo.

Malsuprenirinte de la norda deklivo de la "Super la Ĉielo", trapasinte viadukton, oni sin trovas ĉe abrupta krutajo. Pri tio cirkulas la onidiro, ke Li Shimin (599-649 p.K.), imperiestro de Tang-dinastio, iam svingis sian veston ĉi tie, pro kio oni nomas ĝin Altaĵo por Vestosvingo.


Pli norde de tie, postlasinte zigzagan vojeton kaj trapasinte groton dek metrojn altan, oni vidas papag-forman rokegon pli ol dek metrojn altan, rekte leviĝantan sur la ŝtona pinto, t. e. Papag-rokego. Nordokcidente de ĝi estas la montpinto Kuŝanta Tigro. Sude de ĝi sole staras kabano rigardanta al profunda intermonto. Proksime al la kabano troviĝas rokfendo kaŭzita de la ŝanĝiĝo de terkrusto. La fendo estas malpli ol unu metron larĝa, ĉirkaŭ dek metrojn profunda kaj pli ol tridek metrojn longa. Ĉe la fundo de la rokfendo estas deklivo kun 138 ŝtupoj. Se oni staras sur la fundo kaj levas sian rigardon, oni trovas, ke inter la

altegaj krutajoj videblas nur strio da ĉielo. Legendo diras, ke la feino Jicui perdis sian brodilolon ĝuste en tiun ĉi fendon.

Sube de la Strio da Ĉielo staras ŝtona montpinto kun giganta ronda roko sur sia kresto kvazaŭ tuj falonta. Oni nomas ĝin Senradika Roko. Ĉe la piedo de la montpinto estas ŝtonkaverno kondukanta de la nordo al la sudo. Interne de ĝi ripozas 18 arhataj statuoj.

Fininte sian vojaĝon en la templo oni povas viziti alian belan budhisman templon — la faman templon Drakfonto kun akvo enfluanta de ekstere. Oni diras, ke imperiestro Li Shimin siatempe trinkis ĉi tie la fontakvon kaj multe admiris ĝin. De tio la templo ja ricevis sian nomon. (En la feŭda socio de Ĉinio oni prenis drakon kiel simbolon de la imperiestro. — Trad.) La templo enhavas sume 17 konstruaĵojn rampantajn sur la montodeklivo. Oni lokis ilin simetrie, kio donas al la rigardantoj bonordan kaj perfektan impreson. Interne de la templo recitas sutron la budhanoj.


#### *La Senradika Roko*



La kulmino de la monto Qianshan nomiĝas Fea Teraso, 700 metrojn alta super la marnivelo. Legendo diras, ke antaŭ tre tre multaj jaroj tie la feoj ludis ŝakon kaj ĝis hodiaŭ ankoraŭ postrestas ŝtona ŝaktabulo. De tie oni povas rigardi la foran maron Bohai kaj la proksiman ŝtalarbon Anshan.

Laŭ statistiko, sur la monto estas 180 vidindaj lokoj. Por viziti ilin ĉiujn kompreneble ne sufiĉas unu tago. Tial multaj el la turistoj tranoktas en la hotelo apud la monto, banas sin per varma fontakvo kaj sin pretigas por vojaĝo en la sekva tago.

# Pejzaĝoj de la monto Qianshan



Fotoj  
de QU WEIBO

Ĉe la loko "Super  
la Ĉielo"






Ĉarmaj montpintoj



Ŝtona Pagodo





Interroka vojeto

Kioskoj en pinaro  
kaj cipresaro



# FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Brazilaj araoj en usona parko  
de **IVAN DORETTO** (Brazilo)



Ruĝigintaj folioj de aceroj en Kohrankei,  
gubernio Aiĉi

de **M. NIWA** (Japanio)



**CELEBRANTE LA 70-AN  
DATREVENON DE LA  
NASKIĜO KAJ LA 35-AN  
DE LA FORPASO DE  
VERDA MAJO  
(1912 — 1947)**

**LA ĈINA ESPERANTO-ELDO-  
NEJO APERIGIS KOLEKTON  
DE ŜIAJ ESPERANTAJ VER-  
KOJ KAJ TRADUKOJ**

## **Verkoj de VERDA MAJO**

Verda Majo estas fama japana esperantistino, internaciisma batalanto kaj granda amiko de la ĉina popolo. En 1937 ŝi venis al Ĉinio kaj kune kun la ĉina popolo ŝi oponis kaj batalis kontraŭ la agresa milito fare de la japanaj militaristoj kontraŭ Ĉinio. Kiamaniere ŝi, kiel japanino, povis vivi kaj labori en Ĉinio batalanta kontraŭ japanaj agresantoj? Malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj ŝi faris meritan kontribuon al la progresema afero de la homaro kaj la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj. La libro enhavas ĉiujn jam trovitajn ŝiajn Esperantajn verkojn kaj tradukojn, kun enkonduko de Jelezo. Estas enmetitaj ankaŭ kelkaj valoraj fotoj pri ŝi.

La libro estas frukto de internacia kunlaborado. En la kompilado s-ro Miyamoto Masao kaj aliaj kelkaj esperantistoj en Japanio donis grandan helpon.




**Numero: 10-Es-1653**  
**Formato: 148 x 210 mm.**  
**510 pĝ. bind.**  
**Prezo £4.20 US\$8.50**  
**RMB¥13.00**

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**  
**Peranto de EPC**


aŭ **Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj**  
**(GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**



# Ĉinio unuafoje sukcesis sintezi ribonukleatan acidon



*Sciencistoj de la Ŝanhaja Filio de la Ĉina Akademio de Sciencoj diskutas pri la eksperimenta rezulto.*



*Produktoj de la sintezita ribonukleata acido konservataj en centrifugaj tuboj*

**K**IAL gefiloj similas al siaj gepatroj? Post longa esplorado sciencistoj fine malkovris la sekreton: Tio estas rezulto de interefikado de diversaj nukleataj acidoj — la bazo de hereda materio en la korpo de estaĵo, kaj proteinoj. Esplorado de nukleataj acidoj ne nur havas gravan teoriant signifon por pluaŝe koni heredecon kaj aliajn fenomenojn de la vivo, sed ankaŭ estas tre grava por solvi praktikajn problemojn en industrio, agrikulturo kaj medicino. Post la esplorado de dek tri jaroj, ĉinaj sciencistoj la unuaj en la mondo sukcesis sintezi ribonukleatan acidon — gistan alanan transigan RNA. Tiu sukceso akcelis la esploron de reakcioj de nukleataj acidoj kaj ilenzimoj, kaj diversaj medikamentoj de nukleata acido inkluzive de tiuj kontraŭ tumoroj kaj virusoj.

La origino de vivo estas grava temo esplorata en multaj landoj. Por tio sciencistoj ĉiamaniere klopodas por sintezi vivipovan materion el neorganika kombinaĵo.

Frue en 1828 germana sciencisto Friedrich Wöhler la unua en la mondo sintezis la organikajn ureojn kaj per tio rompis la absolutan limon inter neorganikaĵo kaj organikaĵo. Post pli ol cent jaroj, t.e. en 1965, ĉinaj sciencistoj la unuaj en la mondo sintezis vivihavan kristalon de bovina insulino. Tiu sukceso markis gravan paŝon de la homaro en la procedo por koni la vivon.

Pli ol du jarojn post tio komenciĝis en Ŝanhajo esplorado de arta sintezado de ribonukleata acido. Nukleata acido estas makromolekula kombinaĵo kun komplika strukturo. Ĝia molekulezo estas multe pli granda

kaj ĝia strukturo multe pli komplika ol bovina insulino. Ĉar ĝi havas acidecon kaj estis unue trovita en ĉela nukleo, oni nomas ĝin nukleata acido. Pro la malsameco de ĝia konsisto oni dividas ĝin en ribonukleatan acidon kaj deoksiribonukleatan acidon.

La ĉefa funkcio de nukleata acido estas decidi la heredon de vivaĵo. Ĝi povas konservi "ĉiujn donitaĵojn de heredo" de diversaj vivaĵoj kaj transdonas ilin al iliaj idoj dum la generado. Ĝi "transdonas tiujn donitaĵojn parte", ekzemple iu infano similas al sia patrino je la okuloj kaj al sia patro je la buŝo ĝuste pro tio, ke la nukleata acido, kiu rilatas la okulojn, estas transdonita de la patrino kaj tiu rilata al la buŝo estas transdonita de la patro. La alia grava funkcio de nukleata acido estas direkti kaj partopreni sintezadon de proteinoj en vivaĵoj. Sen nukleata acido ne estas proteino. Ankaŭ aliajn funkciojn havas nukleata acido.

La nukleata acido sintezita de ĉinaj sciencistoj konsistas el 76 nukleotidoj, inter kiuj estas kvar ordinaraĵoj specoj kaj sep raraj specoj. Post centoj da esploradoj dum multaj jaroj ĉinaj sciencistoj mem preparis tiujn 11 specojn de nukleotidoj, dek specojn de il-enzimoj de ribonukleataj acidoj kaj koncernajn kemiajn reakciilojn. Ili sintezis nukleotidojn en pecetojn per la metodoj de organika kemio kaj enzimo kaj poste faris el ili duonmolekulojn entenantajn respektive 35 kaj 41 nukleotidojn. La 20-an de novembro 1981 la ĉinaj sciencistoj finis la lastan sintezadon. Ili ankaŭ sukcesis en la postaj kvin ripetitaj eksperimentoj.

## NI FUNEBRAS

## KAJ

## KONDOLENCAS



*S-ro Fujio Egami*

Prof. d-ro Fujio Egami, prezidanto de Japana Esperanto-Instituto, forpasis la 17-an de julio, 1982. Li estis ankaŭ membro de Honora Patrona Komitato de UEA kaj estis tutmonde konata kiel pioniro de biokemio. Li ĉiam restis fidela esperantisto depost kiam li lernis la Internacian Lingvon en 1928.

Ni esprimas nian sinceran kondolencon al JEI kaj la

familio de prof. d-ro Egami. Lia forpaso signifas grandan perdon ne nur por la japana sed ankaŭ por la ĝenerala Esperanto-movado. Kiel veterana esperantisto kaj eminenta sciencisto inter niaj vicoj li ĉiam meritas nian respektan rememoron.

**Ĉina Esperanto-Ligo**  
**Redakcio de EPC**

La sintezita ribonukleata acido havas la saman kemian strukturon kiel natura molekulo kaj kompletan aktivecon de vivaĵo, kaj vivforton akcepti alaninon kaj miksi ĝin en proteinojn. Tial oni povas diri, ke la sintezita ribonukleata acido efikas same kiel la natura.

La sukceso akiriĝis ja ne facile. Antaŭ dek tri jaroj, kiam komenciĝis la laboro, ĝin ĝenis multaj malfaciloj. Ekzemple, sintezado de nukleata acido bezonis nukleotidojn kiel materialojn, tamen tiam mankis al Ĉinio tiurilata industrio. La ĉinaj sciencistoj do decidis mem fari ilin. La fama biokemiisto Wang Yinglai, kiu gvidis siatempe la esploradojn de insulino, kaj organika kemiisto Wang You fariĝis estro kaj vicedro de la grupo por es-

plori nukleatan acidon. Profesoro Wang Debao, specialisto de tiu fako, persone donis al ĝi direktadon. Post longa klopodo ili fine elfaris grandan kvanton da nukleotidoj, il-enzimoj kaj kemiaj reakciiloj kaj per tio kontentigis la bezonon de la esplora laboro. Malgraŭ sennombraj malfaciloj la laboro neniam haltis ĝis sia plena sukceso.

La partoprenantoj de la esplorado bone kunlaboris, respektante unu la alian. Kiam okazis kontraŭdiroj dum diskutado pri la projekto kaj rimedoj de la sintezado, ili disvolvis demokration kaj decidis la solvojn post diversaj eksperimentoj. Ĝuste per tiu rigora sinteno al sciencoj la ĉinaj sciencistoj sukcesis en la sintezado de ribonukleata acido.



## 65-a DATREVENO DE LA FONDIĜO DE LERNEJO

Ordinara estas datreveno de la fondiĝo de mezlernejo, do ŝajne nemenciinda. Sed la 65-a datreveno de la fondiĝo de la mezlernejo Shiyán, dependa de la Pekina Porinstruista Universitato, vekis ĝeneralan atenton pro la ĉeestado de multaj famaj fakuloj, ĝiaj ekslernantoj.

La 9-a de majo ĉi-jare estis serena kaj agrabla tago. De la frua mateno aro post aro da ekslernantoj torentis el diversaj lokoj al la granda placo de la lernejo. Post longa disiĝo la malnovaj kunlernantoj sentis apartan ĝojon pro la renkontiĝo. Ili varme manpremis unu al la alia kaj reciprokis salutojn.

Kune festis la datrevenon pli ol kvarmil instruistoj, lernantoj, ekslernantoj kaj gastoj. Inter la ĉeestantaj ekslernantoj estis aerodinamikistoj, geologoj, tritik-bredistoj, okulistoj, edukistoj, pentristoj, reĝisoroj, ĵurnalistoj kaj aliaj.

Tiutage sennombraj gratulaj telegramoj kaj leteroj el diversaj lokoj de la lando flugis al la lernejo. La 82-jara edukisto Zhou Sisong, unu el la plej malnovaj diplomitoj, speciale sendis monon el Nankino, por ke oni aĉetu en lia nomo por la lernejo du ĉinajn cipresojn.

## RIMARKINDA DISVOLVIĜO

La lernejo estas unu el la ĉefaj mezlernejoj de Pekino. Ĝi, konstruita en 1917, estis knabina mezlernejo dependa de la Pekina Porinstruista Universitato. Ĝi ĝuas reputacion de serioza instruado kaj modesta laborstilo. La lernejo jam elkulturis multe da promesplenaj personoj. Tamen dum la multaj jaroj antaŭ la Liberiĝo en 1949 ĝi disvolviĝis malrapide pro malfavoraj politikaj cirkonstancoj kaj manko de monrimedoj. Tiam la lernejo okupis areon de ĉirkaŭ 6 000 kvadrataj metroj kaj havis nur 17 grupojn kun 653 lernantoj kaj malpli ol 10 000 ekzemplerojn da libroj en la biblioteko.

XIAO QIN:

# FEKUNDA KULTURI



De post la naskiĝo de la nova Ĉinio la lernejo akiris rapidan disvolviĝon. Nun ĝi okupas areon de proksimume 30 000 kvadrataj metroj kaj havas 28 grupojn en kiuj lernas 1 520 geknaboj. Ĝia biblioteko havas 70 000 ekzemplerojn da libroj. En la lernejo estas kemia, fizika kaj biologia laboratorioj kun kompare kompletaj ekipaĵoj.


Lastajare, helpate de Unesko, la lernejo paŝon post paŝo modernigis sian instruadon. Ĝi jam starigis aŭdovidan ĉambraron kiu estis ekipita per kompleta kolora televidoregistrila sistemo. La aŭdovida ĉambraro konsistas el kvin klasĉambroj kun 300 sidlokoj taŭgaj por lekci kaj elsendi la vidoregistraĵojn.

En la lernejo estas du instruadomoj kaj unu loĝdomo por la lernantoj. Antaŭ nelonge oni konstruis du loĝdomojn kun 90 apartamentoj por instruistoj kaj oficistoj. Dank' al tio pliboniĝis la loĝkondiĉoj de plejparto de la instruistoj.

## BONEGA INSTRUADO

Laŭ la eduka orientilo ellaborita de la ŝtato la lernejo donas al la lernantoj ĉefe moralan, intelektan kaj fizikan edukon, kaj samtempe edukon belartan kaj laborkapabligan. En la edukado ĝi kaj heredas kaj disvolvas la

*Instruistino kun postlernohora grupo pri fiziko*



# GRUNDO POR TALENTULOJN



bonan tradicion kaj faras kuraĝajn esploron kaj kreadon.

Estas kompare alta la nivelo de ĝiaj instruistoj, kiuj laboras tre konscie. Ĉiuj instru-grupoj senescepte aktive faras reformon al la eduko kaj esploron pri novaj edukaj teorio kaj leĝo. En la lastaj jaroj la instru-grupo de la ĉina lingvo kaj literaturo kompilis instrumaterialojn por ĉiuj klasoj de la mezlernejo. La materialoj celas kulturi verkan kapablon de la lernantoj surbaze de legado kaj memlernado sub direktado de instruistoj.

La matematika instru-grupo praktikas inspiran edukon, por ke la lernantoj mem trovu vojon por solvi la demandojn surbaze de kompreno de la formuloj kaj la rezona procedo. Samtempe ĝi okazigas diskutadon pri matematiko kaj eldonas matematikan gazeton por inokuli al la lernantoj la kapablon kaj intereson memstudi matematikon.

Estas konate, ke fiziko estas eksperimenta scienco. Tial por levi la instruan kvaliton la instruistoj pri fiziko ĉiam prezentas la eksperimentojn antaŭ la lernantoj kaj postulas, ke ili mem faru laŭ la lernolibroj. Oni malfermas la fizikan laboratorion en tri posttagmezoj ĉiusemajne, por ke la lernantoj faru planon kaj eksperimenton en postlecionaj horoj.



*Lernantoj faras kemian eksperimenton.*

## POST LERNOHORAJ

La lernantoj havas postlernohorajn grupojn pri astronomio, konstruo de aviadilaj modeloj, biologio, radio, geografio kaj geologio, kaligrafio, literaturo kaj arto. Helpate de la instruistoj aperis en la lernejo multaj geknaboj-amatoroj de scienco, literaturo kaj arto. La geknaboj de la astronomia grupo observas stelojn kaj lunan eklipson en la profunda nokto kaj fotas astronomiajn fenomenojn. La biologia grupo iras antaŭurben por kolekti specimenojn kaj fari enketon semajnfine aŭ ferie. La "Raporto pri la akvaj plantaĵoj en la ĝardeno Yuanmingyuan", verkita de la lernanto Zhou Sicheng, estis honorita per duaklasa premio pri la scienc-teknikaj traktaĵoj de la geknaboj de Pekino. Ankaŭ geknaboj kun arta talento povas disvolvi sian genion. Mi prenu kiel ekzemplon la knabinon Liu Chunyan. Ŝi ludis ĉefrolon en la fabela dramo "Neĝulino", kaj dublis en la angla televida dramo "David Copperfield". Alia lernanto Li Hao ludis la rolon de Wangzai

en la televida dramo "La Hundo Saihu".

La lernejo ĉiam donas sufiĉan atenton al la korpa ekzercado de la lernantoj. Ĝi posedas kompletajn ekipaĵojn por korpoekzercado kaj donas al la geknaboj rigoran trejnadon. Ĉiujare ĝi okazigas printempan kaj aŭtunan sportkunvenojn. Ĝi sendas siajn teamojn partopreni ankaŭ la urban kaj distriktan sportkunvenojn. Ĝia flugpilka teamo akiris grandajn sukcesojn en la urba kaj landskala konkursoj de geknaboj dum multaj jaroj. En 1978 tiu teamo gajnis la ĉampionecojn viran kaj virinan en la Mezlerneja Flugpilka Konkurso de Pekino. En 1980 ĝia vira teamo gajnis la duan lokon en la landskala junula kaj geknaba konkurso "Pokalo Antaŭensalto" kaj du el ĝiaj ĉefaj membroj partoprenis en la monda flugpilka konkurso inter mezlernejanoj en 1980.

## POR ESTI BONA LERNANTO

Same kiel aliaj mezlernejoj de la lando, la lernejo Shiyan ĉiujare premias lernantojn bonajn





*En kunveno Gu Fei dankas la lernejajn gvidantojn, instruistojn kaj kunlernantojn pro ilia helpo al ŝi.*

en la ideologio, studo kaj fiziko-kulturo. Ĝi postulas, ke la lernantoj havu noblan idealon, altan moralon, studu diligente, pene sin ekzercu, respektu la instruistojn kaj amu la lernejon.

Nobla idealo inspiras la lernantojn konscie studi kaj sin ekzerci fizike. Plejparto el ili studas bone. En 1981 94.5% de ĝiaj abiturientoj sukcesis en la ekzameno por la superaj lernejoj kaj plejparto el ili eniris la Universitaton Qinghua, la Pekinan Universitaton, la Pekinan Porinstruistan Universitaton, kaj aliajn universitatojn unuaklasajn en la lando, kiel Fudan kaj Nankai.

Inter la lernantoj estas ekstreme malmultaj malobservantoj de la ŝtata leĝo kaj lerneja regularo. Ili okupas nur 0.1% de la totala nombro de la lernejoj. En la unua semestro de la pasinta jaro iu lernanto senkaŭze forestis de la leciono, sed kritikite, tre rapide korektis siajn erarojn. Printempe ĉi-jare iu en aŭtobuso fripone tondis la veston de knabino kaj estis kondamnita al reedukejo de geknaboj por ricevi kontrolan edukon.

### LERNEJO — GRANDA FAMILIO

La instruistoj kaj lernantoj traktas unu alian intime, kio

estas la bona tradicio de la lernejo. Iu knabino diplomitiĝonta donacis belan albumon kun fotoj de ĉiuj siaj kunlernantoj al sia maljuna fraŭlino-instruistino, kiu dediĉis sian tutan vivon al la eduka afero. Ŝi korduŝiĝis ĝis larmoj, legante la surskribaĵojn: “Ni, kvindek lernantoj, ĉiuj estas viaj filinoj.” Nu, alia ekzemplo el la lernejo estas tiu de iu instruisto, kiu suferas de hipoglicemio. Ĉiufoje antaŭ lia lekcio la geknaboj metas lignan seĝon kun dika kusenno malantaŭ la podion kaj tason da sukera teo sur la tablon kun paperslipo. Sur la slipo estas skribite: “Bonvolu sidiĝi, nia kara instruisto! Trinku teon, kaj parolu mallaŭte.”

Komence de junio ĉi-jare subita katastrofo trafis la familion de Gu Fei, lernantino de la lernejo. Likis botelego de likvigita petrol-gaso kaj de tio estiĝis incendio. Brulmortis ŝiaj gepatroj, forbrulis la domo kaj la tuta posedaĵo. Post la malfeliĉa okazaĵo la tuta lernejo montris al ŝi grandan simpatian kaj donis grandan zorgon. La instruistoj kaj lernantoj donacis al ŝi monhelpon unuj post aliaj. En kelkaj tagoj oni donacis al ŝi sume ĉirkaŭ mil juanojn. La geknaboj malavare donis al ŝi sian poŝmonon akumulitan dum longa

tempo. La kunlernantoj donacis al ŝi ankaŭ aliajn objektojn, inter kiuj troviĝas pli ol 50 someraj ĉemizoj kaj jupoj. Unu kaj duonan monatojn la 304-a Hospitalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo senkompense resanigis ŝian 12-jaran fratinnon, Gu Zhengrong, duono de kies korpo estis brulovundita dugrade profunde. La lernejo faris escepton akcepti Gu Zhengrong kiel internulinon de la unua klaso. La magistrato sendis ŝian 9-jaran fratinnon kiel internulon al iu fama elementa lernejo. Iu instruistino volonte adoptis Gu Fei. En la unuaj tagoj post la katastrofo ĉi tiu instruistino, maltrankvila pri ŝia sano, portis ĉiutage al Gu Fei boligitan bovinan lakton. Ĉio ĉi tre kortuŝis la 16-jaran knabinon. Ŝi diris emocie: “Mi perdis miajn gepatrojn, sed niaj socio kaj lernejo ja similas al varma familio, kio donis al mi plenan fidon al la nova vivo.”



# Virino brilanta per la orienta belo

— Pri la ĉina kore-nacieca dancistino Cui Meishan

**E**STIS komenciĝonta la vespero de dancosolo de Cui Meishan.


Mallumiĝis la lampoj en la halo de la Nacimalplimulta Kulturdomo de Pekino. Oni mallalutetis, rapide legis la programon. Atendis la rigardantoj. La anoncistino malantaŭ la kurteno kapsignis al Cui Meishan kaj facilpaŝe iris al la antaŭscenejo, kun profesia rideto.

Flanken tiriĝis la kurteno. Fasko da lamplumo falis sur virinon en bela antikva ĉina jupo. Ŝi tenis pozon profunde dorman. En muziko ŝi vekigis el la dormo. Ŝi svingis la manikojn kaj sin turnadis kun blanka kolombo en mano. . . Jen la danco "Rido de la Oriento", kiu originas el la statuoj en la 259-a kaverno de la ŝtonkavernaro Dunhuang rigardata kiel la orienta Mona Lisa. La danco, karakterizita per la mistereco de la orienta arto, per mildeco kaj

pensemo, montras la sopiron de orienta virino al paco kaj feliĉo. Se Leonardo da Vinci ankoraŭ vivus, li certe admiradus ŝin kaj farus por ŝi portreton.

En la vespero Cui Meishan prezentis dancojn de diversaj stiloj, inter kiuj troviĝis la nova kore-naciecaj dancoj "Sincera Amo" kaj "Longtambura Danco", pro kies prezentado ŝi fariĝis internacie fama, la "Sakuro", kiu montras japanajn gustojn, kaj la "Knabino apud Nilo" plena de egipta festa gajeco. Ŝi gajnis aplaŭdadon de la rigardantoj per sia lerteco kaj ritmo de dancmovoj kaj per sia forta arta infekto.

La sukceson de sia eminenta dancarto ŝi ŝuldas al sia diligenteo. Somere de 1934 ŝi naskiĝis en malgranda vilaĝo en suda Koreio. Ŝia patro, popola artisto, apenaŭ povis vivteni la familion per dancado dum migrado. Ankaŭ ŝia patrino estis lerta dan-



*Cui Meishan en prezentado de la "Longtambura Danco"*

cistino. Ŝi havas tri fratojn kaj unu fratinton. Kvankam multe suferanta, la familio neniam submetiĝis al la mizera sorto. Eĉ en siaj plej malfacilaj tagoj ili ne ĉesis kanti. Ili vivis la vivon de malriĉa artisto.


Kiam ŝi havis sep jarojn, ŝia tuta familio migris en nordorientan Ĉinion, kaj pasigis plurajn militajn jarojn. Ili migradis en alta montaro kaj fine fiksigis en iu urbeto. Kiam la familio ekhavis iom pli facilan vivon, la gepatroj sendis ŝin al lernejo. En la lernejo ŝi enviciĝis inter la plej elstaraj lernantoj, sed ŝi montris grandan intereson pri dancado. Foje ŝi partoprenis en amuza kunveno aranĝita de la lernejo. Aŭdinte rapidan, ritman tamburadon, ŝi ne povis sin deteni, tuj saltis sur la scenejon kaj ekdancis. Ŝiaj liberaj, facilaj dancmovoj forte mirigis ŝiajn kamaradojn kaj instruistojn.

"Vi certe fariĝos dancistino," ŝia instruisto diris al ŝi ŝerce kaj



*La danco "Blanka Pavo" montras la amon de taja knabino al la vivo.*





*Cui Meishan en Singapuro*

iom esperige, kiam ŝi malsupreniris la scenejon.

Ŝi ne atendis, ke realiĝis la ŝercaj vortoj. Nelonge poste, kiam la fama korea majstro-dancistino Cye Seng Hi planis fondi en Pekino kurson de dancarto, ŝi elektis kiel kursanon tiun knabinon el fora regiono en nordorienta Ĉinio. Fruprintempe de 1951 la knabino adiaŭis sian patrinon kun larmoplenaj okuloj kaj vojaĝis al Pekino. Tiam ŝi aĝis apenaŭ dek sep jarojn.

La trejnado estis severa kaj teda, kaj tian kurson ŝi neniam imagis. Ĉiutage ŝi devis preni naŭ lecionojn, preskaŭ ne povante reakiri spiron. Nokte ŝiaj kamaradoj kuŝiĝis kaj endormiĝis, sed ŝi kaŝe ploris sub la litkovrilo. En ŝian kapon venis eĉ ideo forkuri. Tamen, kiam la unuaj sunradioj enrigardis en ŝian ĉambron tra fenestro, ŝi ellitiĝis kun kunpremitaj dentoj kaj iris, kiel kutime, al la lecionoj de trejnado. En la tagoj, en kiuj ŝi ŝvitis kaj larmis, ŝi iom post iom ekkonsciis tian simplan veron, ke ĉia sukceso postulas penadon kaj ju pli multe ŝi lacas, des pli granda estos la ebleco por ŝi realigi la esperon. Tia doloriga hardado fine faris ŝin obstina kaj donis al ŝi konvinkon nemalhaveblan

por tiu, kiu volantas sin dediĉi al arto.

Post unu kaj duona jaroj ŝi estis diplomita kaj eklaboris en la Centra Ensemblo. Ĝia vicestro Dai Ailian, eminenta edukistino-dancistino, baldaŭ rimarkis ŝian talenton.

En 1956 la Ĉina Ensemblo provludis la "Dancon de Pavoj". Por prepari ĉefdancistinon, ĝiaj gvidantoj faris elekton el multaj aktorinoj. Ili trovis, ke Cui Meishan estas la plej taŭga el ĉiuj. Ŝiaj esprimriĉaj dancmovoj estis tiel altiraj, ke ŝi tuj konkeris la rigardantojn. En la Sesa Internacia Junula Festivalo okazinta en Moskvo en 1957 la ĉina delegacio prezentis la "Dancon de Pavoj" kun ŝi kiel ĉefdancistino. Kiam finiĝis ŝia prezentado, en la Granda Teatro de Moskvo, tuj leviĝis surdiga manklakado kaj aklamado. La programero gajnis la oran medalon.

Tamen tio estis nur komenco.

Cui Meishan sensaciis la dancistan rondon de Pekino per la jenaj dancoj: la koreaj "Longtambura Danco", "Prikanto de Riĉa Rikolto" kaj "Ĝojo", la ujuraj "Danco kun Teleroj" kaj "Tamburada Danco", la mongo-

la "Danco kun Lanternoj" kaj dancoj hindaj kaj pakistanaj. Nemalmultaj el ili gajnis premion pro alta tekniko en la lando. Ŝi vizitis multajn landojn. Ŝi interparolis, pere de danco, tiu bela lingvo, kun pacamantoj de diversaj haŭtkoloroj. Eksterlandaj amikoj laŭdis, ke ŝi brilas per la orienta belo.

La kurteno ĉiam kovras alian flankon de la vivo de artistoj, t.e. ties penigan ekzercadon. En la "Longtambura Danco" oni faras kvardek sep turniĝojn, kaj por certigi sukceson sur la scenejo, oni devas turniĝi eĉ duoble pli multe dum ekzercado. Ĉe la komenco de sia ekzercado Cui Meishan faris nur dekelkajn turniĝojn kaj tio jam kaŭzis al ŝi kapturton kaj naŭzon. Plie, ŝi provludis kun peza tamburo kaj ne povis stari sur la piedoj, perdante ekvilibron. Ŝi falis kaj stariĝis denove. Ŝi ne ĝemis pro vundiĝo de sia genuo. Leviĝis la kurteno kaj la spektantoj vidis ŝiajn lertajn, mirindajn turniĝojn tiel facilajn kiel zefiro, tiel molajn kiel surfo. Ordinare ŝi longe staris antaŭ spegulo por observi kaj ĝustigi ĉiun sian dancmovon. Eĉ vojirante, ŝi utiligis sian ombbron por fari reĝustigojn.

Post ŝia prezentado mi venis malantaŭ la scenejon. Tiam ŝi estis demetanta kostumon antaŭ spegulo. Vidante ŝin iom laca, mi min ĝenis intervui ŝin. Mi subite ekpensis: kio sekvos el ŝia diligenteco? La primitivaj dancoj de niaj antikvuloj fariĝis belaj desegnaĵoj sur argilaj potoj kaj rokmuĵoj. Ilia brilo ne perdiĝis, kvankam jarmiloj forpasis. Iliaj nomoj restas nekonataj, tamen la posteuloj heredis de tio riĉan havaĵon: sento de belo, forto de amo, admiro al la vivo kaj fido pri la homa civilizacio.



La inaŭguro de la Dua Somera Semajno aranĝita de la Pekina Esperanto-Asocio


## La Dua Somera Semajno de Pekinaj Esp-istoj

Fotoj de CHUN KE

La partoprenantoj en la parko Beihai







Esperanta konversacio inter partoprenantoj




Junaj esperantistinoj lernas dum la semajno.




Knabino faras demandon al s-ro Geoffrey Sutton post lia prelego "Unu Eŭropa Esperantisteco".





Zeng Hojaŭ, vicprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, rakontas al s-ro Sandy Gilmour, kiel disvolviĝas la Esperanto-movado en Pekino.



Jin Ziguang (la dua de dekstre), vicprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, konigas la Someran Semajnon al s-ro Sandy Gilmour, raportisto de NRK

La Pekina Esperanto-Asocio aranĝis en sia urbo la Duan Someran Semajnon de la 25-a ĝis la 31-a de julio ĉi-jare, kiun partoprenis pli ol kvardek esperantistoj. Dum la semajno la partoprenantoj havis interesajn aktivadojn. Ili vizitis la pitoreskan parkon Beihai. La brita esperantisto Geoffrey Sutton faris prelegon laŭinvite. S-ro Sandy Gilmour, raportisto de la Nacia Radiodisaŭdiga Kompanio de Usono, filmis scenojn el iliaj aktivadoj por televida programero.

La mongola esperantistino Has (meze staranta en robo) rakontas pri la vivo de fama mongola verkisto.








Knabinoj kantas Esperante.



Murgazeto de partoprenantoj



Partoprenantoj



# Flava Rubando

(NOVELO)

de Cheng Naishan

Ilustritaj de Zhao Longyi

**E**N amuzkunveno por bonvenigi novlernantojn nia klaso prezentis la usonan popolkanton "Flava Rubando". La ĥoron gvidis Zhu Mei. Ŝi staris ĉe la antaŭo, en nova jaketo el ruĝa kvadrata kordurojo kaj nova paro da ŝuoj. Brilis ŝia vizaĝo.

*"Ligu flavan rubandon ĉirkaŭ la maljuna kverko,*

.....

*Mi restos en la buso, forgesos nin, metos la kulpon sur min*

*Se mi ne vidas flavan rubandon ĉirkaŭ la maljuna kverko."*

Tre simpla estis ŝia voĉo, eĉ kelkajn notojn ŝi faris ne ĝuste, tamen la kanto sentigis indulgemon, sopiron kaj sinceran amon, kaj ĝuste tio estis la spirito de la kanto!

Mi bone memoris, ke kiam mi ĵus fariĝis ĉefinstruisto de tiu klaso, ĝia eksinstruisto diris al mi montrante foton de Zhu Mei: "Malgraŭ ke ŝi estas knabino, ŝi vin konsternos, ja kaprica knabino!" La patro de Zhu Mei punlaboris en iu kultivejo pro malversacio, kaj ŝia patrino reedziniĝis al alia, forlasinte ŝin. De tiam ŝi devis vivi ĉe siaj geonkloj, kiuj tute ne zorgis ŝian edukon. Tio tamen ne vekis ĉe mi atenton. Mi ekrigardis la knabineton

kun du maldikaj harligoj en la foto kaj silentis.

Ekster mia atendo ŝi surprizis min en la unua semajno post la komenco de la nova semestro. Dum mi skribis sur la nigra tabulo, pum! malfermiĝis la pordo kaj entrudiĝis ŝi, osteca, en senkoloriĝinta pantalone kaj iom flaviĝinta blanka ĉemizo kun longaj manikoj en varmega tago. Ŝia librosako estis plenplena. Ŝi montris nenian honton malgraŭ sia malfruiĝo.

"Miaŭ" aŭdiĝis el ŝia tablo kaj tuj ektumultis la klasĉambro. Mi kolere rigardis ŝin kaj ankaŭ ŝi malcedeme fiksas sian rigardon sur mi.

Daŭre miaŭis la kato kaj la tuta klaso dronis en kompleta malordo. Mi alpaŝis kaj elprenis el ŝia tablo la librosakon. Ho, en ĝi kaŝiĝis kato! Mi abomene kaptis la malgrasan kateton kaj pretis ĝin eljeti eksteren tra la fenestro.

"Vi!" ŝi, kiel kolerigita strigo, provoke ĵetis al mi ferocajn rigardojn. "Ĝi naskiĝis nur antaŭ kelkaj tagoj. Ĉu vi volas ĝin ĵetmortigi?" Kvankam ŝi tre malĝentile sin tenis kontraŭ mi, tamen ŝia vorto iom min atentigis, ke tio, kio baraktas en miaj manoj, estas viva estaĵo. Mi

do remetis la katon en la sakon kaj ordonis alian lernanton porti ĝin al mia kabineto.

Post la leciono, tuj kiam mi envenis en la kabineton, mi vidis, ke instruistoj ludas kun la kateto ĉirkaŭ mia tablo. Iu eĉ donis al ĝi bovlon da lakto, kaj ĝi lekis kun apetito.

"Kiel aminda estas la kateto!" diris iu instruisto karesante ĝin.

"Hm, tamen ĝuste pro tiu aminda kateto malordo regis dum duono de leciono!" ankoraŭ ne kvietiĝis mia kolero. Tiam mi rimarkis, ke la pordon preterpasis Zhu Mei, tial mi vokis ŝin enveni per malvarma tono.


"Ha, vi prenas la klasĉambrom kiel bestoĝardenon?"

"Mi ne havas lokon por ĝin teni. Mia onklino malpermesas al mi havi katon. Ŝi certe ĝin forĵetus, se mi restigus ĝin hejme," ŝi diris kun rigardo najlita sur la kateto. Ŝia voĉo montris ŝian deprimiĝon, kio draste kontrastis kun ŝia kutima barbareco.

"Ne tenu, se ŝi malpermesas!"

"Ĝi tiam mortos! Mi trovis ĝin ĉe rubejo. Sen siaj gepatroj ĝi certe mortos. Krome. . ." ameme ekkaresante la kateton ŝi daŭrigis: "mi





*Zhu Mei mallaŭte demandas: "Instruisto, ĉu vi havas poŝtranĉilon ĉe la manoj? Bonvolu noĉi mian alton sur la stango kaj mi skribos tion al mia patro. . ."*

volas kunulon." Ŝia tuta kapo ŝvitis eble pro mensostreĉiĝo, eble pro portado de pantalono kaj ĉemizo kun longaj manikoj en tia sufoka tagvarmo.

"Ĉu vi havis katon antaŭe?"

"Jes! Mia patro tre ŝatis katon . . ." Subite fermiĝis ŝia buŝo.

"Kion ni faru kun tiu kateto?" mi demandis ŝin pretervole per tono de konsiliĝo kun ŝi. "Malgraŭ ĉio vi devas ne kunporti ĝin al la lernejo ĉiutage. Nu, mi iru konsiliĝi kun via onklino kaj diru, ke ĝi estas al vi konfidita de la biologia grupo de nia klaso. Ĉu bone?"

"Tre . . . tre bone." Ŝi levis la kateton kaj firme premis ĝin al sia sino: "Finfine vi havas hejmon." La kateto rigardis ŝin per gagatnigraj okuloj, ĉe ĝiaj buŝanguloj ankoraŭ gluiĝis gutoj de lakto. Tiam mi, viro malfacile ekscitebla, sentis varmon en mia gorgo.

"Vi estas helpema, instruisto. Se vi bezonos mian helpon estonte,

diru al mi rekte," ŝi diris al mi, forironte, starigante sian dikfingron. Ej, la knabino kompatinda, sed ne aminda.

Mi decidis viziti ŝian familion.

"Mi jam estas sufiĉe okupita de miaj propraj kvar gefiloj, ŝia patro tamen altrudis ŝin al mi. Kaj nun ŝi venigis la katon, kia ĝenaĵo!" grumblis al mi ŝia onklino.

"Simple diru jes aŭ ne! Kial vi mencias mian patron?" kolere diris Zhu Mei.

"Via patro ne indas la nomon de homo . . ."

"Se vi denove mencias mian patron, . . ." minacis ŝi kolera kiel strigo. Mi haste puŝis ŝin en ŝian ĉambbron.

Zhu Mei ofendite sidiĝis ĉe la litrando kun la kateto en siaj brakoj. En ŝia tre malgranda ĉambro troviĝis preskaŭ neniuj mebloj, la unusola ornamaĵo en ĝi estis foto sur la

muro, en kiu estis juna viro kun graseta knabineto en la brakoj.

"Via patro?" mi atente pririgardis la foton. Li, kun harmoniaj vizaĝtraĵoj kaj larĝaj ŝultroj, ridetis al sia filino. El lia rigardo videblis profunda amo kaj zorgemo . . .

"Via patro tre amas vin," diris mi pretervole.

Ŝi unue surpriziĝis kaj poste mallaŭte respondis: "Jes, li tre amis min, kiam mi estis malgranda. Li nepre kontentigis min, kiam mi ion petis."

Tion dirante, ŝi skuettis siajn nigrajn plastajn sandalojn kun ligiloj rompigitaj pro malnoveco de la plasto. La knabinoj jam ne plu portis tian elmodaĵon. "Rigardu!" ŝi portis el murangulo bambustangon antaŭ min. En malhela lumo mi vidis, ke sur la stango gravuriĝis signoj kaj datoj.

"Jen signoj faritaj de mia patro por registri mian alton en malsamaj aĝoj. Vidu, kiel malalta estis mi tri-jara. Mi forte ekkreskis en la aĝo de ses jaroj. Kiel rapide mi kreskis en tiu duonjaro. Sep-jara, ok-jara . . ."

"Tre zorgema estas via patro."

"Se li estus zorgema, li ne naskigus min. Li estas kvazaŭ tiu kato, kiu naskis la kateton, sed lasis ĝin ekster sia zorgo. . ." Ŝi mordadis al si la lipojn kaj ŝia voĉo iom sufokiĝis.

"Vi estas ankoraŭ juna kaj la estonta vivo longa." Vere, kion mi diru ankoraŭ?

"Mi rapide kresku, por pli frue eklabori kaj vivteni min mem." Ŝia voĉo fariĝis pli kaj pli mallaŭta, kvazaŭ ŝi ne parolus, sed preĝus. Mi pardonis ŝin kaj decidis reĝustigi ŝin, la distorditan arbidon. Ŝi devus havi ĝojan vivon same kiel aliaj knabinoj kaj ŝi havis tiun rajton.

Sed la afero iris neglate.

Iutage la instruisto de la ĉina lingvo kolere tiris ŝin al mia knabineto, kulpigante ŝin pri tio, ke ŝi

dissiris la kajeron por eseoj kaj rifuzis verki.

“Mi . . . mi ne volas skribi!” obstinis Zhu Mei.

Mi malfermis la ŝiritan kajeron kaj vidis titolon “Mia familio”, kiu tamen estis forstrekita per dika streko.

“Mi havas nenion por skribi.” Ŝia voĉo fine fariĝis profunda singulto.

“Vi havas.” Mi ekmemoris la stangon, sur kiu ŝia patro registris ŝian alton, kaj la okulojn rigardantajn ŝin kun profunda amo en la foto.

“Kion?” ŝi rigardis min kun larĝe malfermitaj okuloj.

Mi volis diri “vian patron”, ĉar mi kredis, ke ŝia patro, kiu punlaboras en la malproksima Qinghai, certe pensas pri ŝi kun pento. Mi jam volis diri tion, sed fine ĝin anstataŭis la jeno:

“Kiam vi plenkreskos, vi rimarkos, ke multaj prizorgas vin. Kompreneble la vivo ne ĉiam estas bela. Brava homo ĉiam kuraĝas alfronti kaj ne evitas ĝin. Vi skribu pri via nuna vivo . . .”

Hazarde mi aŭdis el radiodisaŭdigo la usonan popolkanton “Flava Rubando”. Mi estis tuj ravita de ĝi. Ĝi estis bela poemo pri liberigita kondamnito, kiu ne kuraĝis enpaŝi en sian domon . . .

Mi ne scias, kial tiu kanto ofte memorigis al mi pri la patro de Zhu Mei.

Baldaŭ estis venonta la Kanta Konkurso, kiu okazas unufoje ĉiujare en nia lernejo. Ĉi-foje mi rekomendis al miaj lernantoj la kanton “Flava Rubando”. La kortuŝa rakonto tuj interesis la lernantojn. Kun granda atento ili foje kaj refoje aŭskultis la surbendigitan kanton. Estas nepre necese havi gvidanton, se oni volas prezenti ĝian apartan guston, sed neniu volis elpaŝi por ludi la rolon. Kion fari?

“Se vi ne malŝatas mian malbonan voĉon, do mi ludu!”

Kiu? Zhu Mei! Ŝi aplombe starigis en miraj kaj dubaj rigardoj de la kunlernantoj.

La provludado iris glate. Kvankam Zhu Mei ne prononcis tiel ĝuste, tamen ŝia aplombo kaj senĝeno pruvis, ke eble nur ŝi sola taŭgas por ludi la rolon.

“Ĉu vi sopiras al via patro?” mi demandis ŝin foje post provludo.

Ŝi singarde ĵetis rigardon al mi, sed nenion diris.

“Eble li tre sopiras al vi, ĝuste kiel en la kanto . . .”

“Mi havas nian rilaton kun li, li estas aĉulo,” ŝi respondis kun voĉo malforta kaj hezita.

“Skribu al li por esprimi vian zorgon.”

“Tamen. . . li ankoraŭ punlaboras. . .”

“Jes, li ja faris malbonon, tamen ni devas kredi, ke li korektos sian eraron. Nun li estas sola, neniu pri li zorgas kaj neniu lin bezonas, same kiel vi iam sentis.”

Ŝi silentis.

*Zhu Mei ĝoje diras al siaj kamaradinoj, ke ŝia nova jaketo kaj novaj ŝuoj estis aĉetitaj de ŝia patro dum irado al prezentado.*



“Ne estas eraro montri al sia karulo indulgemon kaj pardonon. La sinteno sin gardi kontraŭ ĉia danĝero estas vera egoismo.”

Larmoj torente fluis de sur ŝiaj vangoj kaj ŝi mallaŭte demandis: “Instruisto, ĉu vi havas poŝtranĉilon ĉe vi? Bonvolu noĉi mian alton sur la stango kaj mi skribos tion al mia patro. . . Mi diros ankaŭ, ke mi rolos kiel korifeo de nia klaso.”

Ŝi multe kreskis, jam atingis 1.62 metrojn.

En la tago de la prezentado, informiĝinte, ke nian ĥoron gvidos la fame konata kaprica knabino, ĉiuj atendis nian elmontrandon kun malpacienco. Sed de la komenco de la kunveno ni ne vidis ŝin. Pro tio nia programero foje kaj refoje prokrastiĝis. Ni ne trovis ŝin eĉ kiam nia ĥoro devis prezenti la lasta. Sen la gvidanto la kanto montriĝis tre rigida kaj sengusta.

“Vi!” kriis mi en la sekva tago, kiam mi renkontis ŝin en la koridoro, “vi ja estas kaprica!”

“Mi ne volis kanti, do kion vi farus al mi?” ŝi malcedeme diris



kaj ĵetis al mi kaj la ĉeestantaj kunlernantoj malicajn rigardojn. Post tio ŝi foriris kun la eluzitaj plastaj ŝuoj sur la piedoj.

Ĝuste en tiu vespero mi ricevis la leteron el la provinco Qinghai: “. . . Kun granda emocio mi ricevis la leteron de mia Mei. Ŝi diris, ke vi proponis al ŝi skribi la leteron, vi estas bonkora. Mi tre bedaŭras pri mia eraro, kaj nun mi hontas skribi al ŝi. Tamen mi kredas, ke certe venos la tago, kiam mi revenos por vidi ŝin. Mi skribos al mia filino, kiam mi ricevos meritatestilon. . . ” La letero estis skribita ne bonorde, el kio klare videblis lia doloro pro pento. En la fino de la letero li skribis: “Mi sendas dek juanojn, por ke ŝi aĉetu veston. Eble ŝi bezonos ĝin dum la prezentado.” Nur tiam mi komprenis, kial Zhu Mei evitis la prezentadon. Ĉu ŝi kun la vesto paliĝinta pro

lavado kaj la eluzitaj plastaj ŝuoj povus enviciĝi inter tiuj bele vestitaj kunlernantoj? Ĉu la digno de knabino permesus tion? Tamen mi riproĉis ŝin.

Post kelkaj tagoj, kiam mi enmanigis al ŝi la dek juanojn kaj la leteron, ŝi retiris sian manon post la dorson kaj fiksitis malamikan rigardon al mi: “Kion tio signifas?”

“Prenu! Tio estas perlaborita kaj sendita de via patro. Iru aĉeti veston plaĉan al vi. Vi povas fieri diri, ke tio estas aĉetita de via patro. Vi certe bezonos ĝin dum la prezentado!”

“Sed. . . ” ŝi honteme mallevis sian kapon: “tio tro malfruiĝis, ĉar la prezentado jam forpasis.”

“En la venonta amuzkunveno por bonvenigi novajn lernantojn ni denove kantos kaj ankaŭ vi gvidos la ĥoron.”

“Tiu paro da nigraj ŝtofaj ŝuoj kaj korduroja ĵaketo estis aĉetitaj de mia patro. Li estis premiita pro teknika renovigo. Baldaŭ oni antaŭdate liberigos lin. Li promesis aĉeti por mi ankoraŭ paron da ŝuoj kiel la viaj. Li certe revenos por min renkonti!” eksonoris la ĝoja voĉo de Zhu Mei en la koridoro post kelkaj monatoj. Ĉi-foje la knabino ne mokis ŝin, ĉar ili sciis ke tio estas vero.

Printempo venis kaj prezentiĝis fine nia programero en la amuzkunveno.

*“Ligu flavan rubandon ĉirkaŭ la maljuna kverko.*

. . . . .

*Nun la tuta buso estas gaja, kaj mi ne povas kredi.*

*Mi vidis cent flavajn rubandojn ĉirkaŭ la maljuna kverko.”*

*(Daŭrigo de p. 43)*

tagonismaj. Ili faris memkritikon kaj fine interpaciĝis.

Mi havas harmonian familion. Mia edzo Yao Zhaohui estas kvin jarojn pli aĝa ol mi. Li laboras kiel instruisto en la Pekina Politika kaj Jura Instituto kaj kromlaboras kiel advokato. Ni lernis en la sama klaso de la instituto kaj same ŝatis pilkludon kaj muzikon. Kun samaj intereso kaj karakteroj ni havis intiman rilaton jam en la instituto. Ni helpis unu la alian en la laboro. Kiam mi ne estis certa pri iuj kazoj, mi konsiliĝis kun li. Lia teoria nivelo estas pli alta, sed mi havas pli multe

da praktika sperto. Nia solfilino Yao Han, naskita en 1960, nun lernas fremdan lingvon en universitato. Ŝia studado estas tre bona. Influate de ni, ankaŭ ŝi ŝatas muzikon. Nia filino multe helpas nin en la hejmo. Post studo ŝi faras preskaŭ ĉiujn dommastrumajn laborojn kiel preparado de manĝo, vestolavado kaj aĉetado de ĉiutagaj necesajoj. En ripoza tempo ni ŝatas kune aprezi muzikon. En ferioj aŭ festoj ni ofte iras al parko kaj iafoje vojaĝas al turismaj lokoj.

Ni loĝas en apartamento kun du ĉambroj, kaj ĉirkaŭ ĝi kreskas multaj arboj kaj gazonoj. La medio estas bela kaj kvieta. Ni enspezas monatan salajron de ĉ.

160 juanoj kaj subvencion de 20 juanoj. Ĉiumonate ni elspezas 5.6 juanojn por la doma lupago, 5 juanojn por la kranakvo kaj elektro, 75 juanojn por manĝaĵoj, poŝmonon de 50 juanoj, subvencias mian patrinon je 15 juanoj kaj deponas 30 juanojn. Nia vivo apartenas al la mezgrada nivelo en Ĉinio. Ni jam havas televidilon, stereofonian radiomagnetofonon, fridujon kaj lavmaŝinon, kiuj nun ankoraŭ apartenas al la kompare multekostaj elektraĵoj por ĉinaj familioj. Se ni havus plian ĉambron, ni estus pli kontentaj. Nun la ŝtato konstruigas loĝdomojn ĉie en Pekino, do nia deziro povos esti plenumita en la estonteco.



## TANG-DINASTIA POEMO GRAVURITA SUR HARO

Novembre de 1981 Shen Weizhong, duaklasa majstro-metiartisto de la Metiarta Instituto de Suzhou, gravuris sur haro kvin milimetrojn longa Tang-dinastian poemon kun dudek ok ĉinaj ideografiaĵoj. Oni povas klare vidi la ideografiaĵojn per mikroskopo, kiu pligrandigas la objektojn kelkdekoble.

De la antikveco Ĉinio havas miniaturan gravurarton. Longa poemo estas gravurebla sur eburo en grandeco de rizgrajno.

## VORTOJ GRAVURITAJ SUR HORIZONTALA SEKCO DE HARO

En majo 1982 Shen Weizhong gravuris sur horizontala sekco de haro du ĉinajn ideografiaĵojn signifantajn bonan aŭguron, kiuj far-

iĝas klaraj sub mikroskopo, kiu pligrandigas la objektojn ducentoble.

Kapharo estas mola tubo, kies horizontala sekco prezentas formon de ringo, kun epidermo sur la ekstera surfaco, kun medolo interne kaj kun neregula fibra substanco en la mezo. La sekco estas apenaŭ tiel dika kiel dekonono de tiu de kudrilo. Ne estas facile gravuri sur ĝi. Sed Shen sukcesis post serioza studado kaj plurfoja provado.

## GRAVURAJŬO SUR HARO DE PANDO

Xu Dalin, laboristo de la Brodarta Instituto de Suzhou, gravuris sur haro de pando kvin ĉinajn ideografiaĵojn Xiong Mao Chuan You Yi (pando amikigas). La gravuritan haron forte brakumas skulptita ebura pando stara, kiu estas tre interesa kaj plaĉa, kiam mikroskopo faras ĝin klare videbla. La haro estis prenita de la korpo de Wei Wei, pando de la Ŝanhaja Akrobata Trupo. Simila al kapharo de homo, ĝi estas mola tubo kovrita de loza fibra substanco kaj epidermo. La gravuro sur haro de pando estas multe pli malfacila ol tiu sur kapharo de homo, ĉar la diametro de panda haro estas nur duono de tiu de homa kapharo.


## ANTIKVA ŜIPO SKULPTITA EL OLIVA KERNO

Dong Lansheng, juna metiartisto de la Metiarta Esplora Societo de Suzhou, skulptis el oliva kerno antikvan ŝipon imititan laŭ la ŝipo, per kiu la bonzo Jian Zhen vojaĝis orienten al Japanio. La skulptita ŝipo, en formo de arko, kun du plumblovitaj veloj, estas tridek ok milimetrojn longa kaj dek ses milimetrojn alta. Sur ĝi troviĝas tridek kvin grandaj kaj malgrandaj homfiguroj.

Sub granda lupeo klare videblas dek unu maristoj ĉe la pruo farantaj streĉan preparan laboron: iuj observas la ĉielon, aliaj direktas siajn okulojn al onĉanta maro kaj triaj malligas kablonojn por levi ankron. . .


En la mezo de la ŝipo estas du etaĝaj domoj sur la ferdeko, kun gravuritaj balustradoj kaj desegnitaj kolonoj. La arkforma tegmento estas kovrita de tegoloj en grandeco de truo de kudrilo. Ĉe ambaŭ flankoj de la ĉambroj estas po kvin malgrandaj fenestroj, kies latiso-stangetoj estas tiel maldikaj kiel moskita kruro. Oni povas tre facile malfermi ĉiun fenestron, se oni milde movas ĝin per kudrilo. En la kajuto sidas kaj staras dekelkaj bonzoj. En la ĉefĉambro trankvile sidas Jian Zhen kaj liaj du disĉiploj kun manoj kunmetitaj.

Ĉe la pobo iu juna bonzo blovas aeron en fornon por prepari teon. Du maljunaj ludas ŝakon kaj aliaj du interesplene rigardas apude.



*La vortoj "bona aŭguro" gravuritaj sur horizontala sekco de haro*

*Ŝipo skulptita el oliva kerno, imite laŭ la antikva ŝipo per kiu la bonzo Jian Zhen vojaĝis orienten al Japanio*





**L**A arda suno alte staras sur la ĉielo. Varma vento trablovas la stratojn. Iras homoj kun ĉapelo, sunombrelo aŭ ventumilo. Virinoj portas jupon aŭ maldikan duonmanikan robon. Vendistoj de malvarmaj trinkaĵoj iras de loko al loko surstrate. Jen varmega somero regas en Pekino.

La matenaj horoj estas la plej bonaj en someraj tagoj, kiuj havas temperaturon de pli ol 35°C. Se oni frue leviĝas kaj promenas ekstere, oni vidas kuradon, naĝadon, gimnastikon kaj skermadon ĉe stratoj, sur placoj kaj en parkoj. Dum tiu tempo arbaretoj montriĝas pli viglaj. Sur arbo pendas ruĝa flageto. Multaj mezaĝuloj kaj emeritaj maljunuloj faras tie spirajn ekzercojn sub gvido de unu aŭ du personoj. Oni kutimiĝas enspiri freŝan aeron kaj malstreĉi sian korpon antaŭ laborado. Ili bone komprenas la veron "Vivo dependas de movado."

La grandaj parkoj de Pekino komencas akcepti vizitantojn je duono post la kvina matene kaj finas la akceptadon je la deka nokte. Ĉi-jare ili havas pliajn plezurboatojn kaj tetrinkejojn. Oni pasigas agrablan someran tagon en la pitoreska Somera Palaco en la okcidenta antaŭurbo de Pekino, kie ili promenas sur la ombroriĉa monto Wanshou kaj remas en la ondetanta lago Kunming, ĝuante belajn pejzaĝojn. De la lastaj du jaroj urbanoj multe plantis arbojn kaj herbojn kaj herbokovris tridek naŭ lokojn taŭgajn por ripozo aŭ promeno. Tie ofte kunestas maljunuloj kun birdkaĝo.

En kvietaj lokoj iom for de la movoplenaj stratoj iuj junuloj ekzercas sian voĉon. Inter ili tro-

viĝas profesiaj aktoroj kaj ankaŭ tiuj, kiuj diligente ekzercas sin por trapasi eniran ekzamenon al arta lernejo. Tie sidas aliaj junuloj voĉlegantaj fremdan lingvon. En Ĉinio estas troveblaj milionoj da junuloj lernantaj fremdajn lingvojn. Dum la pasintaj jaroj ankaŭ Esperanto fariĝis unu el la lingvoj ŝatataj de junuloj. Ili konscias, ke la Internacia Lingvo estas ŝlosilo por akiri pli da scioj.

Naĝamantoj frue iras por vicatendi biletan. En la parko Taoranting troviĝas tri subĉielaj naĝejoj, el kiuj la plej granda kun ses basenoj okupas areon de 63 000 kvadrataj metroj. Pli ol tri mil homoj povas naĝi samtempe en la ses basenoj, kiuj ĉiutage akceptas pli ol 15 000 naĝantojn. La naĝejon oni provizis per lignaj ŝtuparetoj, pendantaj ŝnuroj por grimpado, paraleloj kaj similaj por la korpa ekzercado de naĝantoj. Gajaj knabinoj naĝadas en la klara akvo, forgesante la someran varmegon.

Ĉiumatene, antaŭ la oka horo en ĉiuj ĉefaj stratoj aperas fluoj da aŭtoj, bicikloj kaj motorcikloj. El fluo de biciklantoj, kiuj penas superi unu alian, klare videblas ŝanĝiĝo de Ĉinio. Pliparto de la virinoj, grize kaj blue vestita antaŭ kelkaj jaroj, hodiaŭ portas modajn vestojn.

La ĉina tekstila ministro diris, ke ŝi strebas al akcelo de la tekstila industrio, por ke oni sin vestu pli bone, pli bele. La someraj vestoj montras, ke ŝiaj vortoj realiĝas iom post iom. Ĉi-somere sole en la butikoj ĉe la strato Qianmen troviĝas tri mil specoj de virinaj vestoj, inter kiuj la roboj, striktaj senmanikaj ĉemi-

ZHANG QINGZHEN:

# Dum tagoj de

zokaj maldikaj kotonaj ĉemizetoj estas ŝatataj de junaj virinoj.

En butikoj oni vendas grandan kvanton da someraj necesajoj el diversaj lokoj de suda Ĉinio. Estas montrataj paperaj ombreloj el Fujian kaj Hunan, matoj el Jiangsu kaj Zhejiang, bambuaj kurtenoj el Henan kaj pajlaj ĉapeloj el Shandong. Rapide elĉerpiĝas diversaj perle ornamitaj sandaloj el Xiamen, Fujian-provinco. Estas bonvenaj ankaŭ la originalaj paperaj ventumiloj el Fujian kaj Hunan kaj palmaj ventumiloj el Guangdong kaj Sichuan.

En julio, la plej favora tempo por la vendistoj de akvomelonoj, oni starigas vendobudojn ĉe plej diversaj stratetoj kaj migrigas triciklojn por oferti. En la pasinta jaro oni liveris al la merkato nur pli ol 30 000 tunojn da akvomelonoj. Sed ĉi-jare la liverokvanto de akvomelonoj plimultiĝis je duono. Ankaŭ la vendokvanto de persikoj kaj pomoj estis pli granda, ol tiu en 1981. En la merkaton venis ankaŭ vinberoj el aliaj lokoj kaj fruktoj produktitaj en Pekino mem.

La someran etoson vidigas legom-vendejoj ambaŭflanke de stratoj. Ili montras tomatojn, kukumojn, melongenojn, fazeolojn

# someraj Pekino

kaj kapsikojn kun tre plaĉaj koloroj ruĝa, verda kaj viola.

En la ŝtataj butikoj oni vendas legomojn kaj fruktojn laŭ la prezoj fiksitaj de la urba komerca departemento, ĉu en la ĉefsezono ĉu en la aliaj sezonoj. Tamen ekzistas malmultaj butikoj, kiuj propravole altigas prezojn. Por bridri prez-altigon kaj peti la klientojn fari kontrolon, la Pekina Vesperjurnalo anoncas, de tempo al tempo, la fiksitajn prezojn de iuj ĉefaj legomoj.


Ekde junio la fabrikoj, minejoj kaj institucioj de Pekino havigas feriojn al modelaj, avangardaj laboruloj kaj iuj mezaĝaj kaj maljunaj salajruloj, por ke ili somerumu en la pitoreskejoj Beidaihe, Chengde kaj Taishan aŭ aliaj lokoj. En julio la mezkaj elementlernejoj komencas ferii. La urba eduka departemento aranĝas por ili someran kampaĉon por aernaviga, marnaviga kaj geologia aktivadoj.

Kiam la taga temperaturo leviĝas ĝis ĉirkaŭ 37°C, iuj fabrikoj rearanĝas laborhorojn por protekti la sanon de laboristoj kaj garantii ilian sekurecon. La muldistoj, forĝistoj kaj varmotraktistoj de nemalmultaj maŝinaj fabrikoj komencas labori je la deka nokte. La Pekina Manĝaj-fabriko provizas iujn fabrikojn per sodakvo, kaj aliaj fabrikoj mem faras refreŝigajojn.

La junuloj kaj maljunuloj havas sian apartan vivmanieron. Ekzemple, multaj maljunuloj rigardas sodakvon, kafon kaj sukron de fruktoj kiel modernajn trinkaĵojn, kiuj ilin ne interesas. Ili havas kutimon babili ĉe kvadrata tableto kun tekruĉo metita sub stratlampo proksime al sia hejmo. Aliaj maljunuloj ludas ŝakon sub stratlampo. Dum junuloj, precipe geamantaj paroj, ŝatas promeni en parko aŭ sur strato aŭ ĝui malvarmajn trinkaĵojn en butikoj. Laŭ ili, biero havas pli grandan altirforton ol la verda teo. En la kuranta jaro oni fondis ankoraŭ unu bierfarejon en Pekino. Kaj la jara produkto-kvanto de biero en la tuta urbo atingis 60 000 tunojn, iom pli multe ol antaŭe, tamen tiu kvanto ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la klientoj.

Tio tamen estas nur malgranda problemo. Oni montras grandan malkontenton pri siaj malbonaj loĝkondiĉoj. Kvankam oni starigis nombron da etaĝdomoj en la lastaj jaroj, tamen nemalmultaj homoj devas daŭre loĝi en malgrandaj domoj pro tio, ke oni neglektis dom-konstruadon dum longa tempo. Kaj krome la nombro de la loĝantaro kreskis tro rapide. Somere estas sufoko kaj varmege en la malvastaj ĉambroj tiel ke oni preferas sidi ekster sia domo por havi bonan ripozon.

En someraj tagoj la grandaj parkoj de Pekino aranĝas diversajn amuzajn aktivadojn por vizitantoj, ekzemple, projekcii filmojn sub la libera ĉielo kaj prezenti operojn, dramojn kaj humorajn dialogojn. Oni povas akiri eniran bileton kontraŭ nur 15 cendoj. Multaj homoj tiel pasigas varmajn, tamen agrablajn noktajn horojn.







# MI VOLAS FARIĜI JUSTA ADVOKATO

de ZHOU NAXIN

*La 48-jara Zhou Naxin estas unu el la unuaj advokatoj nomumitaj en Pekino. Si nun estas estro de la civila grupo de la Pekina Jura Konsilio kaj komitatano de la Jura Konsilantaro de la Tutlanda Federacio de Revenintaj Elmigrintaj Ĉinoj. Si estas vaste konata pro sukcesaj pledoj por akuzitoj kaj pacigoj de civilaj disputoj.*

La Red.

Frue en la tempo, kiam mi lernis en mezlernejo, mi jam deziris esti advokato. Tiam ĉiuj noveloj, romanoj kaj filmoj pri advokatoj havis por mi apartan logon. Mi tre admiris la sintenon, konduton kaj elokventon de advokatoj. En 1951 mi sukcese trapasis la eniran ekzamenon por la jura fakultato de la Pekina Universitato. Mi ankoraŭ klare memoras mian tiaman ĝojon pro vizito al tiu altlernejo fame konata en- kaj eksterlande, precipe pro vizito al la jura fakultato longe aspirata de mi.

*Zhou Naxin pledas por akuzito en tribunalo.*



Post unu jaro mi lernis en la Politika kaj Jura Instituto de Pekino pro la ŝtata reorganizado de la altlernejoj. De 1954, kiam mi diplomitiĝis el la instituto, mi okupiĝas pri juraj laboroj.

La ĉinaj advokatoj estis alte taksataj de la Partio kaj ŝtato. Ili ofte havas ŝancojn por partopreni en diversaj aktivadoj. En la pasintaj jaroj mi invitite partoprenis en kunsidoj por revizii la Kriminalan Proceduran Kodon kaj la Kriminalan Kodon, kaj ellabori la regularon pri privataj loĝejoj. Krome, mi dekelkfoje akceptis alilandajn jurajn delegaciojn kaj advokatajn delegaciojn kaj prezentis al ili la leĝojn kaj advokatan sistemon de Ĉinio.

La civitanoj ĝenerale volas inviti advokatinon kiel sian apologiiston aŭ juran konsilanton. Mi estis multfoje petita plenumi tian rolon. En la fino de oktobro 1979 mi estis invitita al distrikta tribunalo de Pekino kaj pledis por akuzito. Li estis juna sporta instruisto de mezlernejo. Iun antaŭtagmezon la instruisto kritikis lernanton pro lia malobservo de la disciplino, sed ĉi tiu ne akceptis la kritikon. Koleriĝinte, li donis al tiu du batojn. Post-

tagmeze la lernanto sentis doloron en la subventro kaj enhospitaliĝis. Post pli ol unu monato li mortis. La prokurora organo procesis kontraŭ li al juĝejo pri vundado.

Antaŭ la juĝado mi estis komisiita kiel advokato de tiu akuzito. Mi detale esploris ĉiujn koncernajn materialojn, intervidiĝis kun la akuzito kaj faris sesfoje enketojn al la koncernaj kuracistoj kaj flegistinoj de la malsanulejo kaj medicinaj specialistoj. Mia esplorado montris, ke la lernanto suferis kronikan granulocitan leŭkemion, kiu kaŭzis al li pliiĝon de sangplatoj kaj fine pulman embolozon.

Dum mia pledo en la tribunalo mi diris: "Tio, ke la akuzito kiel popola instruisto batis lernanton, estas ago atencanta la rajton de civitano kaj absolute nepermesebla. La bato akcelis pli fruan estiĝon de la malsano de la lernanto. Pri tio la akuzito devas respondi kriminale. Sed la enketo kaj medicina analizo montris, ke la morto de la lernanto ne estis kaŭzita rekte de la batoj sed estis akcidento." Pro tio mi petis, ke la tribunalo kondamnu la akuziton al malpeza puno.

La tribunalo sufiĉe konsideris

mian pledon kaj fine kondamnis la akuziton al dujara kondiĉa libereco kun unujara enkarcerigo en okazo de kondiĉorompo. La ĉeestantoj diris: "La advokato pledis prave kaj la tribunalo kondamnis juste."

Laŭ mia opinio la popola advokato devas havi tre grandan respekton al la faktoj, leĝoj kaj akuzitoj. Tial, kiam mi traktas kazon, mi ne nur serioze esploras kaj analizas la materialajn kaj skribajn atestaĵojn kaj identigojn de jurmedicinaj ekspertizistoj, sed ankaŭ interparolas kun la akuzito, faras diversajn enketojn kaj analizas, ĉu la originaj materialoj identas kun tiuj akiritaj de mi mem. Kiam la kazo estis tre urĝa, en sinsekvaj tagoj mi laboris pli ol dek horojn ĉiutage. Kiam mi aŭtentikigis la kazon kaj helpis la tribunalon fari justan kondamnon, mi sentis senkomparan ĝojon. Nur tiam mi sentis min tre laca. Sed ofte okazis, ke antaŭ ol mi povis ripozi, alia kazo jam atendis min.

Krom traktado de kriminalaj kazoj, mi ankoraŭ devas trakti multajn ĉiutagajn laborojn, ekz., fari jurajn konsilojn, verki diversajn akuzajn paperojn kaj aliajn jurajn dokumentojn, komisiite trakti civilajn procesojn, respondi leterojn kaj helpi koncernajn instituciojn trakti disputojn.

La ĉinaj advokatoj estas ŝtataj juristoj. Ili ne akceptas private komisionojn aŭ honorarion, sed laboras sub la gvido de la jura konsilio. Akuzitoj povas peti iun ajn advokaton kiel sian ple-danton. Ĉar ili ne konas advokatojn, ili ĝenerale prezentas al la jura konsilio sian peton. Por bone trakti kazon, post kiam advokato estas komisiita trakti kazon, li devas fari seriozajn es-

plorojn kaj analizojn kaj poste koncernaj advokatoj diskutas pri la kazo. En pledo ni observas la principon preni la faktojn kiel bazon, kaj la kodojn kiel normon kaj ĉiamaniere protektas la laŭleĝajn rajtojn kaj interesojn de la akuzito. La mono ne estas efika por la ĉinaj advokatoj en ilia pledo.

Nun Pekino, kun naŭ milionoj da loĝantoj, havas 153 profesiajn advokatojn kaj 150 kumulajn, inter kiuj du kvinonoj estas virinoj. La 19 distriktoj kaj gubernioj de Pekino nun jam havas ĉiu sian juran konsilion. En la pasintaj jaroj la Pekina magistrato aplikis multajn rimedojn por kulturi advokatojn: fondiĝis vespera jura universitato kaj kursoj kun diversaj specialaj temoj. Ĉi-jare la Pekina magistrato pliiĝis la monsumon asignitan por juraj laboroj, kio kreis favorajn kondiĉojn por la juraj laboroj.


La Pekinaj juraj konsilioj ĉiutage akceptas preskaŭ cent popolanojn. Unufoja konsilo postulas pagon de 0.5 ĝis tri juanoj. La konsilioj rilate al postuloj de

maljunuloj pri vivtenado fare de la gefiloj estas senpagaj.

La ĉinaj advokatoj prenas interpacigon kiel gravan rimedon por solvi civilajn disputojn. Lastatempe mi traktis eksedziĝan kazon. La viro estas docento kaj la virino instruistino de teknika lernejo. La geedzoj ofte havis malsamajn opiniojn pri ekonomiaj problemoj kaj eduko al la filo kaj pro tio kverelis. Tial ili devis vivi apartigite unu de la alia. La edzo postulis eksedziĝon, sed la distrikta juĝejo kondamne malpermesis tion. Li, malobservante la kondamnon, procesis kontraŭ tio al la Pekina Meznivela Popola Juĝejo. La edzino petis min kiel sian advokaton. Mi kaj la advokato komisiita de la edzo faris enketojn kaj poste interŝanĝis opiniojn dufoje. La faktoj montris, ke la geedzoj havas bonan bazon por kunvivado. Kaj ilia amsento tiam estis ne tute rompita. La duflankaj advokatoj unue faris admonojn respektive al ili kaj poste longe parolis kun ili. Dank' al tio la geedzoj ne plu estis an-

(Daŭrigata sur p. 38)

### *La familio de Zhou Naxin*







## LA ENHAVO VEKAS ADMIRON KAJ ESTIMON

Mi abonas jam tiun altvaloran revuon "El Popola Ĉinio" dum pluaj jaroj kaj konsideras ĝin tre instrua kaj instiga. La enhavo ĉiam vekas en mi admiron kaj estimon. Fotoj, bildoj kaj koloroj ravas min kaj mi rigardas ilin kun granda plezuro. Ĉiam, kiam mi okazigas ekspozicion en nia urbo, viaj revuoj unikaj estas kuŝantaj sur tablo kaj admirataj de multaj eĉ neesperantistoj.

de EINIHOVICI IDYSS  
(Aŭstralio)

## EPC EVIDENTE PLIBONIĜAS

Antaŭ ĉio mi volas diri, ke EPC estas nun evidente pli kaj pli boniĝanta en diversaj punktoj. Unue, la koloraj paĝoj plibeligiĝas kaj sufiĉe allogas la okulojn de la legantoj, due, la prenitaj temoj aŭ problemoj en la artikoloj pli fariĝas nuntempaj, ekzemple la problemoj de la naskolimigo, kaj trie, "Espnovajoj" estas pli riĉa per diverslandaj Esp-aferoj. Mi kore alte estimas la pozicion de EPC en la tuta Esperantujo en la nuna tempo, kaj kredas, ke ĝi pli kaj pli progresos kaj prosperiĝos.

de MACUDA KASUNORI  
(Japanio)

## GRAVA EDUKA ROLO

Multe helpas, ke la enhavo estas apogita per taŭgaj kaj altiraj ilustraĵoj koloraj kaj nigraj, kaj tio ne nur plibeligas la gazeton, sed ankaŭ faras ĝin des pli komprenebla.

Via revuo tre abunde pritraktas la rolon de Esperanto, faras tion en ĉiu numero. Tio ĝojigas kaj ekscitas nin, ke ni ne restu malantaŭe sed kune paŝu.

Mi volas substreki, ke via revuo ludas gravan edukon rolon. Ĝi ne nur instruas kaj informas pri multaj temoj kaj atingajoj, sed ankaŭ modeligas al leganto kiel li mem devus konduti kun siaj gepatroj, parencoj, gekolegoj kaj aliaj, akurate labori, ne trompi kaj mensogi, unuvorte, esti vere honesta homo kaj civitano. Tiamaniere via gazeto fariĝas pli kaj pli vere utila helpilo por tiuj esperantistoj, kiuj okupiĝas pri edukado de infanoj kaj junularo. Ili povas ĉerpi el ĝi pluajn trafajn ekzemplojn.

de STEFAN MOTYKA  
(Pollando)

## "MIA VIVO" — NOVA RUBRIKO

Mi ŝatas kompreneble ĉiujn artikolojn en la revuo. Lastatempe aperis la nova rubriko "Mia Vivo", kiu estas vere interesa, ĉar mi tre ŝatas legi artikolojn pri la ĉiutaga vivo de ĉinoj kun plej diversaj profesioj, kaj ĝojigas min ankaŭ tio, ke vi nuntempe aperigas novelon en ĉiu numero.

de J. H. ERIKSEN (Danlando)

## KUIRA ANGULETO ESTAS UTILA

Interesa estas la artikol-serio de Ba Hong "5 000 Jaroj de Ĉinio". En tiuj artikoloj tre plaĉas al mi la maniero, laŭ kiu la aŭtoro rakontas la ĉinan historion. Li vere rakontas pri homoj kun iliaj pasioj, ĝojoj, venkoj kaj venĝoj. Tiuj homoj ordinare agis pro diversaj kialoj.

Tre interesaj kaj gravaj por esperantistoj devas esti leteroj kaj artikoloj pri Esperanto kaj la tria mondo. Ekzemple la artikolo de Zhang Qicheng en la 5-a numero. Mi konsentas kun la asertoj kaj konkludoj de la aŭtoro. Ĝuste tiaj artikoloj devas atentigi esperantistojn pri la ŝanco de Esperanto en la tria mondo, ke ni tiun ĉi ŝancon ne perdu.

Tre utila estas la kuira anguleto. Ja kuiranto multe parolas pri nacia kulturo. Mi kuiris farĉitajn fun-

gojn, kaj la rezulto estis bongusta. Mi multe aŭdis pri orientaj senvindaj pladoj, kiuj gustas kiel viandaj. Ĉu vi povas priskribi iun similan pladon?

de PIOTR RADEJ (Pollando)

## NEOLOGISMOJ NENECESAJ

La enhavo de "El Popola Ĉinio" estas tre varia. Ĉiu povas trovi ion laŭ sia gusto aŭ interesiĝo. La aspekto estas ne laŭ la lasta modo, sed tio estas pli laŭdinda ol kritika. Krei laŭ modaj principoj ja facile kondukas al efektivigo de degeneraĵoj. Vi atingis stilon de klareco. La teksto kaj bildoj estas tiel kunaranĝitaj, ke ĉiu paĝo formas klaran bildon, agrablan al la okulo. La koloraj bildoj sendube estas juveloj de presarto.

Mi ĉerpis kelkajn neologismojn el diversaj legaĵoj: ascendi, eskalo, konsilio, printo, rungo. Por la plimulto el la esperantistoj ĉi tiuj vortoj estas enigmaj. Tio certe ankaŭ validas rilate al tre multaj eŭropaj esperantistoj. Tuj (eventuale helpe de la kunteksto) ili komprenas la signifon, kiam oni parolas pri: supreniri (supreniĝi), ŝtupetaro, konsilantaro, fotaĵo (kopio pozitiva), ŝtupeto.

La nenecesaj neologismoj sendube fortimigas novajn esperantistojn, kiuj lernis, ke en Esperanto eblas kunmeti la lingvajn elementojn kaj tiel akiri terminojn por ĉio ajn. Trovante multajn malklarajn neologismojn en siaj legaĵoj, la novalenintoj sentas sin trompitaĵ.

de J. S. VEEN (Nederlando)

## MANKAS MULTE DA HUMURO

Estus pli bone laŭ mia opinio rakonti ankaŭ pli multe da kuri-ozaĵoj kaj humuraĵoj ĉiutagaj, ĉar mi kredas, ke mankas hodiaŭ multe da humuro.

de MIGUEL A. MARTIN  
(Hispanio)



# La pereco de Qin-dinastio kaj la leviĝo de Han-dinastio

de BA HONG

**P**OST la unuigo de Ĉinio la Unua Imperiestro de Qin-dinastio plurfoje inspektis la landon por fortikigi la ŝtatan unuigon kaj montri sian dignon. En la jaro 210 a. K. li mortis pro malsano en inspektado. Lia favorata kortegano Zhao Gao, profitante la ŝancon, faris puĉon. Li falsis imperiestran edikton, murdiŝ la kron-princon Fusu kaj surtronigis Huhai, la lastan filon de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio.

La Dua Imperiestro de Qin-dinastio estis malklar-kapa kaj kruela. En la entombigo de la patro li ordonis enfermi en la maŭzoleo ĉiujn konstruantojn. Li mortigis siajn 22 gefratojn kaj ekzekutis tiujn korteganojn, kiujn li suspektis. Li daŭre konstruigis la palacon Epang kaj aliajn grandajn konstruaĵojn. Li koncentris 50 000 militistojn por defendi la ĉefurbon Xianyang kaj servi al li dum ĉasado. Kiam mankis al ili provianto kaj soldo, ili rekviziis grenon kaj monon en najbaraj gubernioj, kio malsatigis la popolanojn 300 kilometrojn for de la ĉefurbo. Ĉie sur

la vojoj estis eskortataj punatoj kaj sur stratoj kuŝis amaso kaj amaso da kadavroj. En la lando viroj ne povis terkulturi kaj virinoj ne povis ŝpini aŭ teksi. La popolo ne toleris vivi sub lia despota regado. Revolucio kovita de kampanoj fine eksplodis dek monatojn post la surtroniĝo de la Dua Imperiestro de Qin-dinastio.

## LEVIĜO EN DAZEXIANG

En la jaro 209 a.K. la prefekto de Yangcheng (sudoriente de la nuna gubernio Dengfeng en Henan-provinco) sendis du oficirojn eskorti 900 rekviziciitajn laborulojn al la nordo por milita servo. La oficiroj elektis du el la laboruloj por gvidi la eskortatojn. La du elektitoj estis Chen Sheng kaj Wu Guang, respektive kampara dungito kaj malriĉa kampano antaŭ tiam.

Kiam la eskortatoj trapasis Dazexiang (sudoriente de la nuna gubernio Suxiang en Anhui-provinco), pluvegis. La vojo estis superakvita kaj netrapasebla, pro kio ili ne povis atingi la celokon en la limdato. Pro tio

ili devis esti punotaj je senkapigo laŭ la leĝo de Qin-dinastio. Sekve Chen Sheng kaj Wu Guang sekrete konsiliĝis pri kontraŭrimedo.

Post kelkaj tagoj iu eskortato aĉetis fiŝojn kaj rimarkis en unu fiŝo pecon da silkaĵo kun la vortoj "Reĝiĝos Chen Sheng". Ĉiuj miris pro tio. En la nokto oni vidis lumon en dia templo en proksima arbaro kaj aŭdis kvaŭvulpan krion: "Prosperos la granda regno Chu kaj reĝiĝos Chen Sheng." La eskortatoj vekigis de la dormo kaj kaŝe diskutis pri tio. Ĉio ĉi estis planita kaj aranĝita de Chen Sheng kaj Wu Guang.

Iun tagon la du oficiroj ebriĝis de alkoholaĵo. Wu Guang intence incitis ilin, el kiuj unu vere koleriĝis, batis Wu Guang per bastono kaj elingigis sian spadon. Wu Guang perforte deprenis lian spadon kaj mortigis lin. Kaj Chen Sheng mortigis la alian oficiron.

Chen Sheng kunvokis la eskortatojn kaj diris al ili: "Nian alvenon prokrastis la plu-

## EPCĈ FARIĜU LA REVUO DE ĈIUJ ESP-ISTOJ

Por mi, okcidentano, mi deziras, ke EPCĈ informu nin pri la E-movado en Ĉinio kaj ankaŭ en Japanio kaj aliaj aziaj landoj. Faru ĉion, por ke EPCĈ fariĝu la revuo de ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo; ĉina revuo, sed malfermita al la tuta mondo. Tial, ĝi devas iĝi ĉiam

malpli politika propagandilo.

de JEAN-MARC DERZELLE  
(Belgio)

## KOMPARCIFEROJ ASPEKTAS TEDAJ

Nemalofte mi trovas la tekstojn tro pezaj pro eble nenecesaj detaloj. Ekz: EPCĈ n-ro 3-a, p. 5. "En la lasta tagdeko de oktobro 1981 Hao Jianxiu diris en la Teknikintersanĝa

Kunveno por Junaj Spinteksistinoj okazigita de la Ministerio de Tekstila Industrio, ke. . ." Tion ĉi oni eble povus anstataŭigi per: "Lastjare, Hao Jianxiu diris, ke. . ."

Mi ja scias, ke Ĉinio, kiel ĉiuj landoj, progresas sur ĉiuj kampoj, sed la nombraj komparciferoj estas al mi kelkfoje tedaj.

de JEAN LOUIS CLAUDEL  
(Francio)



vego kaj pro tio oni nin kondamnos al senkapigo. Eĉ sen tio granda parto de ni mortos survoje. Ni viroj devas riski nian vivon por fariĝi famulo. Ĉu estas destinita la sorto de la reĝoj, markizoj, generaloj kaj ministroj?" Poste ili ĉiuj ĵuris al la ĉielo, ke ili unuanime kunlaboros por renversi Qin-dinastion. Ili elektis Chen Sheng kaj Wu Guang kiel siajn gvidantojn. Poste ili tuj okupis Dazexiang kaj konkeris sinsekve najbarajn urbojn. Ĉirkaŭaj kamparanoj unuj post aliaj aliĝis al la ribelanta armeo. Rapide grandiĝis tiu kamparana armeo.

Post kiam la ribelanta armeo atingis la gubernion Chenxian (nun la gubernio Huaiyang en Henan-provinco), ĝi fondis tie la unuan kamparanan ŝtaton Zhangchu. Chen estis elektita kiel la reĝo, sub kies alvoko la kamparanoj de diversaj lokoj kaj la antaŭaj nobeloj de la ses pereigitaj regnoj ribelis unuj post

aliaj. Inter la potencaj ribelantaj armeoj estis tiu sub Xiang Yu en Wu (nun la gubernio Wuxian en Jiangsu-provinco) kaj tiu sub Liu Bang en Pei (nun la gubernio Peixian en la sama provinco).

La ribelantaj armeoj en pluraj kolonoj marŝis al la centro de regado de Qin-dinastio. Inter ili tiu gvidata de Zhou Wen multe venkis kaj senĉese grandiĝis. La armeo rapide havis mil militĉarojn kaj centmilojn da soldatoj. Ĝi marŝis ĝis loko najbara al la Qin-dinastia ĉefurbo Xianyang.

La reganta kliko kun la Dua Imperiestro de Qin-dinastio kiel la ĉefo tiam estis tre konsternita. Ĝi koncentris centmilojn da sklavoĵoj, kiuj konstruis la palacojn, kaj organizis ilin en armeon per amnestio. La armeo faris fortajn atakojn al la ribelantaj armeoj.

La ribelanta armeo de Zhou Wen batalis sola sen helpoj de

amikaj trupoj kaj malvenkis en granda batalo, pro kio li sin mortigis kaj lia armeo disiĝis.

La armeo de Qin-dinastio, ekspluatante sian venkon, atakis la armeon de Wu Guang, kiu tiam splitiĝis. Wu Guang estis mortigita de siaj subuloj. Lia armeo paralizigis kaj post nelonge estis disbatita de la armeo de Qin-dinastio.

Poste Qin-armeo atakis la centron de la ribelantoj, Chenxian. Ankaŭ Chen Sheng estis mortigita de perfiduloj. Lia ribelo daŭris ses monatojn ĝis la mortigo. Sed la kontraŭdespota torento estis nehaltigebla.

### LA BATALO INTER LIU BANG KAJ XIANG YU

Post kiam la armeoj de Chen Sheng kaj Wu Guang malsukcesis, la ribelantaj armeoj gvidataj de Liu Bang kaj Xiang Yu fariĝis ĉefaj fortoj kontraŭ Qin-dinastio. Por renversi la regadon

*Ribelo gvidata de Chen Sheng kaj Wu Guang*



de Qin-dinastio, ili interkonsentis, ke tiu, kiu unue eniros en la regionon Guanzhong (nun la meza parto de Shaanxi-provinco, kie situis la ĉefurbo Xianyang de Qin-dinastio), estos reĝo.

Liu Bang bone traktis la polon kaj la kapitulacintajn generalojn. Li proklamis abolon de la rigoraj leĝoj de Qin-dinastio kaj difinis leĝon mortigi murdinton kaj puni vundinton kaj ŝtelinton. Lia agmaniero ricevis subtenon de la popolo kaj paralizis la registaran armeon. Tiel li facile konkeris Xianyang. Tiam la Dua Imperiestro de Qin-dinastio jam estis mortigita de Zhao Gao kaj la imperiestra nevo Ziyang surtroniĝis. Kiam la armeo de Liu Bang atingis Xianyang, Ziyang tuj kapitulacis.

Tiam la ribelanta armeo gvidata de Xiang Yu atingis Julu (nun la gubernio Pingxiang en Hebei-provinco) por ataki la ĉefan forton de la registara armeo. Post kiam la ribelanta armeo transpasis la riveron Zhanghe, Xiang Yu ordonis dro-nigi ĉiujn ŝipojn kaj frakasi ĉiujn kuirilojn kaj manĝilojn, kaj ordonis ke ĉiuj militistoj kunportu nur tritagajn manĝaĵojn, por esprimi, ke ili ne revenos vivaj, antaŭ ol ekstermi la malamikojn. La ribelantoj batalis brave kaj fine ekstermis la ĉefan forton de la malamikoj post 9-taga intensa batalo.

Post pli ol unu monato la armeo de Xiang Yu venis al Hongmen (oriente de la nuna gubernio Lintong en Shaanxi-provinco) najbare al Xianyang. Tiam li rompis la interkonsenton, "kiu unue eniros en la regionon Guanzhong, estos reĝo" kaj intencis ataki la armeon de Liu Bang. La milita situacio

*Xiang Yu sin mortigas ĉe Wujiang-rivero.*



tiam estis malfavora al Liu Bang. Por eviti konflikton, li iris al Hongmen por paciĝi kun Xiang Yu. Konsilisto diris al Xiang Yu, ke li mortigu Liu Bang en la bankedo, sed Xiang Yu hezitis pri tio. Rimarkinte la fiintencan, Liu pretekste foriris.

Post kelkaj tagoj la militistoj de Xiang Yu eniris en la ĉefurbon Xianyang. Tiam Xiang Yu okupis regantan pozicion. Li sin titolis superreĝo Xichu kaj komandis la tutan landon. Post nelonge li instalas 18 reĝojn. Liu Bang estis titolita reĝo Hanwang super la feŭdo en Sichuan.

Xiang Yu mortigis multajn homojn kaj senbride prirabis la polon en Xianyang. Li forbruligis la palacojn de Qin-dinastio, inkluzive de la palaco Epang. La incendio daŭris pli ol tri monatojn. Ĉe la forlaso de Xianyang li forrabis ĉiujn riĉaĵojn kaj virinojn en la palacoj.

Post la feŭdado eksplodis separatisma milito. Ĉar Liu Bang nomumis kaj promociis siajn bonajn subulojn, premiis la meritofarantojn kaj amnestiis la malliberulojn, tial li gajnis la koron de la popolo. Dume Xiang Yu ĵaluzis kontraŭ eminentuloj pro ilia talento kaj praktikis nepotismon. Tial la milita supereco transiris iom post iom al la flanko de Liu Bang.

En la jaro 201 a. K. la armeo de Xiang Yu estis sieĝita de la armeo de Liu Bang en Gaixia (sudoriente de la nuna gubernio Lingbi en Anhui-provinco). Tiam Xiang Yu havis malgrandan armeon kaj la provianto elĉerpiĝis. Li trovis nenian eliron kaj sin mortigis ĉe la rivero Wujiang (nordoriente de la nuna gubernio Hexian en Anhui-provinco).

Gajninte la militon, Liu Bang imperiestriĝis en la jaro 202 a. K. kaj tiel fondis Han-dinastion.



# KONTRAŬ KONCENTRIĜO DE LOĜANTOJ EN GRANDAJ URBOJ

Konstruado de urbetoj estis problemo nemulte atentata. Nun arkitektoj, ekonomikistoj kaj sociologoj de multaj landoj esploras ĝin kiel gravan temon.

## SEKVAJOJ DE KONCENTRIĜO DE URBAJ LOĜANTOJ

De post la dudekaj jaroj, precipe dum la pasintaj tridek jaroj, la loĝantaro de la mondo draste kreskis de 2 500 milionoj al 4 400 milionoj. Pro rapida disvolviĝo de modernaj scienco kaj tekniko, industria produktado kaj urbaj servoj, la urba loĝantaro de la mondo pliiĝis de 690 milionoj en 1950 al 1 900 milionoj en 1980.

Kvankam la loĝantaro de iuj evoluintaj landoj kreskis malrapide, tamen la nombro de urbanejoj multe grandiĝis. Dum la periodo de 1950 ĝis 1980, la urba loĝantaro de Francio kreskis de 55.4% al 78.3%; tiu de Usono de 64% al 82.7%; tiu de FRG de 70.9% al 86.4%; tiu de Sovetunio de 39.5% al 65%.

Ĝenerale la nombro de loĝantoj de la disvolviĝantaj landoj kreskas pli rapide ol tiu de la evoluintaj landoj, kaj rapide multiĝas ankaŭ iliaj urbanejoj. Ekz., la urbanejoj de plejparto de la latinamerikaj landoj jam konsistigas pli ol 50% de la totala loĝantaro de la koncernaj landoj. Krome, en iuj landoj la urbanejoj koncentre loĝas en grandaj urboj. Ekz., Meksiko havas 70 milionojn da loĝantoj, inter kiuj pli ol 14 milionoj loĝas en ĝia ĉefurbo.

La rapida kreskado de la urba loĝantaro kaŭzis al multaj urboj malfacilecon de loĝado kaj trafiko, seriozan median polucion, plimultiĝon de krimuloj kaj aliajn sekvaĵojn. En la pasintaj kelkaj jaroj, superaj socitavoluloj en iuj evoluintaj landoj transloĝiĝis en la kamparon proksime al la urboj. Sed, pro la streĉiĝo en la petrola provizo iuj el ili revenis al la urboj.

Por likvidi sekvaĵojn kaŭzitaĵn de koncentriĝado de urbaj

loĝantoj multaj landoj aplikis diversajn rimedojn, ekz., plibonigi publikajn instalaĵojn de urboj, plifortigi la urban trafikadministradon, sekurigi la socialan ordon. Sed tiuj rimedoj ne helpis al fundamenta solvo de la problemo. La plej bona solvo estas konstruado de urbetoj en la kamparo, por ke tie oni havu bonan loĝmedion kun modernaj instalaĵoj, tamen sen la mankoj de urbegoj.

## MALSAMAJ MANIEROJ EN KONSTRUADO DE URBETOJ

Ĉiu lando havas sian propran metodon por konstrui urbetojn en la kamparo.

Iuj socialismaj landoj, kiuj efektivas plan-ekonomion, havas tre favorajn kondiĉojn por laŭplane konstrui urbojn kaj urbetojn en la tuta lando. Ekz., en la komenca periodo post la liberiĝo Rumanio havis 236 urbojn kaj pli ol 13 000 vilaĝojn, sed 65% de la industria produktado de la lando koncentriĝis en Bukareŝto kaj aliaj du grandaj urboj. Por racie disloki la produktajn fortojn, por industriigi kaj urbigi la landon, jam dekomence la rumana registaro difinis la principon konstrui ne urbegojn sed urbetojn. En la pasintaj tridek jaroj estis konstruitaj cent urbetoj, kaj en la lastaj dek jaroj ĉiujare konstruiĝis kvin urboj. Pli ol ses milionoj da kamparanoj jam fariĝis loĝantoj de la urbetoj. Tio estas granda sukceso por Rumanio kun 22 milionoj da loĝantoj.

*Parto de la urbo Tulcea, Rumanio*



Inter la evoluantaj landoj, Japanio metis grandan atenton sur sintezan konstruadon de la lando kaj ekvilibra disvolvo de urboj kaj vilaĝoj. En 1962, 1969 kaj 1977 ĝi trifoje ellaboris "planon por sinteza ekspluatado de la tuta lando" kun la celo limigi blindan ekspansion de urbegoj, raciigi la industriajn dislokiĝon kaj akceli ekspluatadon de post-restintaj regionoj. En 1970 oni komencis eksperimentadon urbigi la kamparon. Ĝis 1977 oni konstruis 430 urbetojn kaj post 1978 konstruos 450 urbetojn. La konstruadon oni faras kombine kun tiu de la kampoj, trafikaj rimedoj, publikaj instalaĵoj kaj medio.



*La nova fiŝista vilaĝo de la Fiŝprodukta Brigado Shima en Longhai-gubernio, Fujian-provinco, Ĉinio*

Jam en la kvindekaj jaroj Usono levis la demandon pri konstruado de urbetoj. En 1968 la usona parlamento aprobis "Leĝon pri Konstruado de Novaj Urboj", kaj la federa registaro fondis kompanion por konstrui novajn urbojn. Ĝi konstruis 63 novajn urbojn ĉiun kun 20 000 loĝantoj. En 1980 la nombro de usonaj kamparanoj konsistigis nur 17% de ĝia totala loĝantaro. Por tiu lando kun malmultaj kamparanoj la tasko "urbigi la vilaĝojn" estas preskaŭ plenumita, tamen la loĝantaro de urbegoj ne reduktiĝis kaj ĉiaj problemoj implikas homojn kiel antaŭe.

Por plibonigi la loĝkondiĉojn de la kamparo kaj najli tie la produktajn fortojn, la sovetunia registaro prezentis en 1968 la sloganon: "Reformu la nunajn urbetojn de la tuta lando en novajn perfektigitajn per diversaj instalaĵoj". De post tiu jaro Sovetunio okazigas ĉiujare kunvenon por kontroli tiun laboron. Ĝis 1980 Sovetunio jam faris reformajn projektojn al 42 000 el pli ol 45 000 centraj

urbetoj. La nove konstruitaj loĝdomoj en la kamparo de Sovetunio dum la jaroj 1969-1979 okupis ĉ. 330 milionojn da kvadrataj metroj, kaj tie plimultiĝis instalaĵoj por kultura vivo, publikaj servoj kaj aliaj uzoj.


Ekde la sepdekaj jaroj iuj disvolviĝantaj landoj faris klopodojn por plibonigi loĝadon en la kamparo. Ekz., la pakistana registaro fondis 615 servocentrojn en la kamparo. Ĉiu centro havas administran institucion, komercan centron, bazon, bankon, kuracejon kaj aliajn instalaĵojn. Al multaj disvolvi-

ĝantaj landoj mankas teknikaj fortoj kaj kapitalo, tial konstruado de urbetoj en la kamparo estas ankoraŭ ne metita en la tagordon de iuj landoj aŭ ĵus komencita.

## KONSTRUADO DE URBETOJ EN ĈINIO

Post la Liberiĝo tre rapide grandiĝis la nombro de la tuta landa loĝantaro kaj tiu de urboj de Ĉinio. Laŭ nepreciza kalkulo la nombro de ĉinoj atingos 1 200 milionojn en la jaro 2000. Se tiam la loĝantaro de la urboj konsistigos 25% de

*Arta insulo ĉirkaŭ tri kilometrojn sude de la urbo Kobe, Japanio*





tiu de la tuta lando, la urbanaro nombros 300 milionojn, kio estas 200 milionojn pli multe ol la nombro en 1980. Kiel racie loki urbojn estas grava problemo ankaŭ por Ĉinio en ĝia nacia ekonomio kaj konstruado de urboj kaj vilaĝoj.

Frue en 1956 la ĉina registaro jam difinis la principon "limigi la ekspansion de urbegoj kaj disvolvi urbetojn". Tamen, pro diversaj kaŭzoj oni ne bone plenumis tiun ĝustan principon en la tuta lando, kvankam nove konstruiĝis nombro da minejoj, urbetoj ĉe gravaj vojkruciĝoj kaj en ekonomiaj distriktoj kaj sate-litaj urbetoj ĉirkaŭ iuj urbegoj.

Por akordigi disvolviĝon de la urba kaj kampara ekonomioj, redukti diferencojn inter la urboj

kaj kamparo kaj bridi kreskadon de la urba loĝantaro, la ĉina registaro donis grandan atenton al konstruado de urbetoj. En la pasintaj kelkaj jaroj ĝi efektivigis la novan politikon pri disvolvo de la kampara ekonomio kaj akiris grandan sukceson en konstruado de loĝdomoj en la kamparo. La plankareo de loĝdomoj konstruitaj de 1978 ĝis 1980 en la ĉina kamparo estis 900 milionoj da kvadrataj metroj. Oni antaŭkalkulas, ke la plankareo de novaj kamparaj loĝdomoj en ĉiu estonta jaro atingos 500 milionojn da kvadrataj metroj. Nun, en la ĉina kamparo jam aperis urbetoj kun modernaj elektroprovizaj, akvoprovizaj kaj kulturaj instalaĵoj. Tia aranĝo faciligas kaj la produktadon kaj la vivon.



**Tarifo:** 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- \* 30-jara instruisto deziras korespondi kaj amikiĝi kun unu sanino el iu ajn lando de la mondo kiu ŝatus krei harmonian esperantan familion. Intereso: islamo, literaturo, muziko, vojaĝoj, sporto ktp. Adreso: Ahmed Kavazoviĉ, 78343 Stari Jajdan, Sanski Most, Jugoslavio.
- \* S-ro Josef Zitka, teknikisto de medicina laborejo, korespondas tutmonde, strato: Doktorsgatan 42, urbo: S-331 00 Varnamo, Sverige.
- \* HELPON (minimume tri IRK) por ŝildigi brazilajn stratojn

ESPERANTO danke komencos per elprovita celtrafigo kontraŭ kor-hepato-sekslamado pro nesufiĉa organisma elektro. KONSILANTO — Rua Esperanto sn° — 95760=Kai-Brazilo.

- \* BESTAMIKO! — Oportuno ĝojigi samulojn, propagandi Esperanton: Akcidento mortigis Brazilan Zoo-Virelefanton. Proponatas interŝanĝo, sudamerika animalo(j) kontraŭ anstataŭanto. Eltrovu ŝanĝeblecon. Informojn danke peras: Vaske, Rua Esperanto sn° — 95760=Kai-Brazilo.

Ĉinio havas 2 404 guberniojn kaj pli ol 54 000 popolajn komunumojn. En ĉiu komunumo sude de la rivero Jangzi troviĝas kelkaj urbetoj, sed en iuj komunumoj de nordokcidenta kaj sudokcidenta Ĉinio estas neniu urbe-to. Sub la nunaj ekonomiaj kondiĉoj la ŝtato ankoraŭ ne havas fortojn por grandskale entrepreni konstruadon de urbetoj. Pro tio Ĉinio devas fari konstruajn planojn unujn post aliaj kaj konstrui urbetojn kun modernaj instalaĵoj unue en tiuj lokoj, kie la kondiĉoj permesas. Specialistoj opinias, ke projektado kaj konstruado de tiuj urbetoj devas sin konformigi al la realaj kondiĉoj de la lokoj, ne imiti tiujn de mezgrandaj kaj grandaj urboj, havi naciajn stilojn kaj malmulte okupi agrojn.

Sarlanda Esperanto-Ligo informas vin pri siaj nov-eldonoj aperintaj en marto kaj aprilo 1982.

1) Reinhard Hauptenthal: **Johann Martin Schleyer**. Fest-prelego okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Schleyer, en germana kaj en Esperanto. (9,-DM)

2) Guy de Maupassant: **Boul de Suif**. Tradukis: Fernando de Diego (14,70DM)

3) Clelia Conterno Guglielminetti: **Unu tago post la alia**. Tradukis el la itala: Roger Bernard.

4) Karolo Piĉ: **Angoro. Poemaro**. (18,-DM)

5) Johann Wolfgang Goethe: **Ifigenio en Taurido**. Tradukis: Lazaro Ludoviko Zamenhof. Kun postparolo de Gaston Waringhien. Represo de la eldono Paris, Berlin 1908. (14,50DM)



# La templo Jin en stilo de ĝardeno

de XIAO SHENG

**T**IO estis antaŭ pli ol 3 000 jaroj en la Okcidenta Zhou-dinastio. Post kiam surtroniĝis la juna Ji Song, iutage ludante kun sia pli juna frato Shuyu, li prenis paŭlovnian folion, tondis ĝin en formon de jadplato portata de la princoj al la kortego, donis ĝin al Shuyu kaj diris: "Mi nomumas vin estro de Tang-regno." Laŭ la ĉina regulo la imperiestro ne devas doni ŝercajn vortojn. Poste Ji Song realigis sian promeson kaj Shuyu vere fariĝis la regnestro de Tang.

Oni ne estas certa, ĉu la rakonto estas fidinda. Sed estas fakto,

*La fonto Nanlao en la templo Jin*



ke Shuyu vere estis la regnestro de Tang. En Tang-regno fluis la rivero Jin, pro kio la regno poste alinomiĝis Jin. Post kiam Shuyu fariĝis regnestro, li alprenis serion da rimedoj por prizorgi la popolanojn, tiel ke prosperis la regno Jin dum 700 jaroj kaj Shuyu fariĝis respektata idolo. La posteuloj konstruis la Memordomon de Shuyu, alinome la templo Jin, ĉe la fonto de la rivero Jin ĉe la piedo de la monto Xuanweng, por lin honori.

La templo ĉirkaŭita de rivero kaj montoj situas 25 km. sudokcidente de Taiyuan, la ĉefurbo de la provinco Shanxi. Dum ĉirkaŭ 1 500 jaroj la popolo de diversaj dinastioj konstruis proksimume tridek halojn, kioskojn kaj pontojn en tiu arboriĉa regiono, tiel ke la templo fariĝis landfama ĝardeneca templo.

La konstruaĵaro de la templo konsistas el tri partoj: Norde la konstruaĵoj plejparte estas vicigitaj laŭ la tereno. Unu estas pli alta ol alia. Tie estas la Memordomo de Shuyu, kiu kun du kortoj rigardas suden. En la ĉefa halo en la malantaŭa korto troviĝas delikate skulptita sida statuo de Shuyu ene. Bele aspektas la statuo en princa vesto, kun blanka vizaĝo, barbo kaj lipharoj kaj kun jadplato en la manoj. Historiaj materialoj diras, ke la memordomo estis la ĉefa parto de la konstruaĵaro dum 500 jaroj, sed poste la ĉefa

pozicio de la templo transiris al la Halo de la Sankta Patrino, konstruita poste. La nuna Memordomo de Shuyu estis pligrandigita en 1871.

Sude staras altaj domoj kaj murmuris riveretoj. Ili impresas kiel ĝardeno en suda Ĉinio. Tie estas la du-etaĝa Domo de la Akva Diino, konstruita en 1563. Ĝi rigardas orienten al la fonto Nanlao. En la unua etaĝo troviĝas tri ŝtonkavernoj. En la meza kaverno sidas en urnoforma niĉo statuo de la Akva Diino kun nekombitaj haroj. La statuo prezentas simplan vilaĝaninon. Pri ŝi cirkulas bela rakonto: Ŝia familia nomo estis Liu. Ŝi, deveninta de kamparana familio, edziniĝis al iu montano ĉe Xuanweng. Pro sekegeco ŝi devis porti akvon de malproksime kelkfoje ĉiutage. Ŝia bopatrino malkontentis pri ŝia akvo, suspektante, ke en la malantaŭan sitelon falis polvo. Ŝi akceptis akvon nur de la antaŭa sitelo. Pri tio Liu neniom grumblis, sed daŭre portadis akvon por la familio. Foje ŝi apenaŭ atingis sian hejmon kun du siteloj da akvo, iu rajdanto petis de ŝi akvon por trinki sian ĉevalon. Ŝi malavare donis la tutan akvon al li, kiu, fininte la trinkigon, diris al ŝi: "Mi estas feo kaj antaŭlonge informiĝis pri via diligenteco kaj bonkoreco. Estas feliĉe, ke hodiaŭ mi renkontiĝis kun vi. Mi donacas al vi vipon el oraj fade-



noj. De nun vi ne bezonos porti akvon. Nur metu la vipon en urnon kaj poste milde ĝin tiru, tiam klara akvo plenigos la urnon. Sed bone memoru, ke neniam vi forte tiru la vipon.” Dirinte tion, la feo tuj foriris. Liu ne plu suferis de akvoportado. Sed iutage ŝi vizitis siajn gepatrojn. Ŝia bofratino petole ludis kaj forte eltiris la vipon el la urno. La akvo ŝprucadis senĉese. Informiĝinte pri tio, Liu tuj rapidis hejmen. Por savi la tutan vilaĝon, ŝi sidiĝis sur la urnon, tiel ke la akvo malrapide ekfluis tra la fundo de la urno kaj formiĝis klara fonto. Oni diris, ke tio estas la fonto Nanyang, unu el la fontoj de la rivero Jin. Pro tio Liu fariĝis Akva Diino respektata de la tieaj loĝantoj.

Meze estas la ĉefa parto de la templo. Tie ĉiuj konstruaĵoj impone staras sur la sama akso.

Ĉe la fino de la akso estas la Halo de la Sankta Patrino, konstruita en 1023-1032. Ĝi estas la plej antikva el la konstruaĵoj en la templo. La halo, ĉirkaŭita de galerioj, estas 19 metrojn alta, 27 metrojn longa kaj 12.9 metrojn larĝa. La antaŭa galerio havas larĝecon de sep mertoj. En la halo troviĝas malmultaj kolonoj, pro kio la halo kaj la antaŭa galerio aspektas pli vastaj. La ĉina ligna konstruo disvolviĝas de imponeco kaj forlikeco en la dinastioj Sui (581-618 p.K.) kaj Tang (618-907 p.K.) al ĉarmeco kaj malpezececo en la dinastioj Ming (1368-1644 p.K.) kaj Qing (1644-1911 p.K.). La dinastio Song (907-1279 p.K.) troviĝis ĝuste meze inter tiuj periodoj. La Halo de la Sankta Patrino estas majstroverko el la dinastio Song, sekve ĝi havas grandan valoron por

studi la historion de la ĉina arkitekturo.

En la halo estas 43 koloraj argilaj homfiguroj, kiuj ĉiuj estas skulptitaj en la dinastio Song escepte de du aldonitaj poste. Tie sidas la Sankta Patrino Yi Jiang kun krono sur la kapo. Ŝi, portanta veston kun perloj, aspektas trankvile kaj noble. Ŝi estis edzino de la reĝo Wu, la fondinto de la dinastio Zhou, kaj la patrino de la reĝo Cheng kaj Shuyu. En la feŭda Ĉinio la patrino ĝuis honoron pro alta posteno de sia filo kaj la edzino pro tiu de sia edzo. Tial estas facile kompreneble, ke niaj antaŭuloj kultis Yi Jiang en la templo Jin. Ĉirkaŭ ŝia statuo staras statuoj de 42 servistinoj, ĉiu kun io en la manoj por servi al ŝi. Iuj laboras kiel ŝiaj sekretarioj, aliaj kiel ŝiaj ĉambristinoj kaj prizorgantoj pri ŝia tualetto, triaj servas al ŝi en ŝia manĝado, en- kaj ellitiĝo, kaj la ceteraj dancas kaj kantas por ŝin distri. Inter ili estas tre bone skulptitaj tridek tri statuoj. Metiartistoj de la dinastio Song kun simpatio skulptis senliberajn belulinojn fermitajn en la palaco kaj perdintajn sian Junecon. La statuoj kun belkoloraj vestoj estas preskaŭ same altaj kiel la veraj homoj. Ili aspektas inter si malsame. Ĉu aĝaj aŭ junaj, dikaj aŭ sveltaj, kun vizaĝo karodika aŭ gracie malgrasa, kun mieno malgaja aŭ naiva, ĉiuj havas siajn apartajn trajtojn. Ili estas trezoroj de la antikva ĉina skulpt-arto.

Samtempe oni konstruis antaŭ la halo la Kvadratan Fiŝlageton kaj la Krucan Ponton, kiuj pliimponigas la halon. Iom poste aperis la Omaĝhalo, konstruita speciale por fari omaĝon al la Sankta Patrino. Antaŭ la Omaĝ-

halo, sur alta teraso staras kvar gardistoj mulditaj el fero. Pli poste, antaŭ la tereno oni konstruis la pompan Akvospegulan Scenejon. Mi iom prezentu la Kvadratan Fiŝlageton kaj la Krucan Ponton. La Kvadrata Fiŝlageto estas alia fonto de la rivero Jin. En la lageto staras 34 ok-angulaj ŝtonaj kolonoj, kun traboj supre por subteni la Krucan Ponton. La ponto, 19.6 metrojn longa kaj kvin metrojn larĝa en la orienta-okcidenta direkto, interligas la Omaĝhalon kun la Halo de la Sankta Patrino. Ĝi estas 19.5 metrojn longa kaj 3.3 metrojn larĝa en la suda-norda direkto. La tuta ponto aspektas kiel granda birdo preta flugi per la disetenditaj flugiloj. Similaj pontoj kun ŝtonaj kolonoj videblas nur en antikvaj pentraĵoj, tial la Kruca Ponto estas tre kurioza.


La templo Jin estas admirata pro sia ĉarma pejzaĝo kaj raraj historiaj objektoj. Nun ĝi jam fariĝis fama turisma loko alloganta ĉinajn kaj alilandajn vizitantojn.



## KOREKTO

1. Legu “nederlandan” anstataŭ “germanan” en la linio 14 (de supre), maldekstra kol., p. 48 n-ro 7.
2. Legu “Sur” anstataŭ “Sen” en la linio 15 (de malsupre), dekstra kol., p. 19 n-ro 9.
3. Forstreu “Ĉinaj Esp-istoj” sur la bildpaĝo post p. 36 n-ro 9.





La Memordomo de Shuyu de la regno Tang

# La templo Jin en Shanxi- provinco


Fotoj de ZHOU DONGYUAN

Bonvolu legi la artikolon "La Templo  
Jin en Stilo de Ĝardeno" en tiu ĉi numero.

Statuoj de servistinoj en la Halo de la  
Sankta Patrino faritaj antaŭ 600 jaroj



La templo Jin







Dancantaj grupoj

## Ruĝvertaj grupoj


Fotoj de XIN YINGYI kaj SHI JIUZHENG

En Zhalong, Heilongjiang-provinco, nordorienta Ĉinio, vivas ĉirkaŭ 200 ruĝvertaj grupoj. La loko estas tre taŭga por ilia vivado kaj generado, ĉar ĝi estas riĉa je marĉoj, kie prospere kreskas fragmitoj kaj abundas fiŝoj, salikokoj, ranoj kaj insektoj. Por protekti tiujn rarajn grupojn, la ĉina registaro difinis la marĉojn kun areo de 420 000 hektaroj kiel naturan rezervejon de akvobirdoj. Ĉiujrintempe la ruĝvertaj grupoj flugas tien el la sudo por pariĝi kaj meti ovojn. Kvar jarojn post sia naskiĝo ili maturiĝas kaj ekvolas amaton. Se paro da grupoj ekamas unu la alian, ili fariĝas dumvivaj kunuloj.

Petolas gridoj.

Elŝeliĝo





En flugado

Se unu el ili mortis, la alia vivas do ĉiam en soleco. Aprile la gruino demetas du ovojn. La gruino kaj virgruo kovas alterne: unu kovas kaj la alia gardas. Post tridek tagoj la idoj elŝeliĝas. La ĵus eloviĝinta gruido portas helbrunan koloron. Post kelkaj tagoj ĝi povas naĝi en malprofunda akvo. Ĝi elernas flugi en kvar aŭ kvin monatoj. En la lasta tagdeko de oktobro ĝi ekflugas kune kun siaj gepatroj al la meza aŭ malsupra baseno de Jangzi-rivero pli ol 2 000 kilometrojn fore por tie travintri. La sekvantan printempon la malgrandaj gruaj familioj reflugas al Zhalong, kie ili ripetas la samon kiel antaŭe. La unujara grueto tiam perdas la amon de siaj gepatroj, ĉar baldaŭ ĝiaj gefratoj venos en la mondon. Ĝi forlasas sian familion kaj komencas novan vivon.



Nutroserĉado

Gruido kun siaj gepatroj





